




Miklós Pál Gajdos



Csaba S Németh

LITERATURA VIVO



Numero 008

Februaro 2026

Enhavo de Literatura Vivo

Numero 008 • Februaro 2026

Vortoj por niaj legantoj (<i>Erika Godó & John Huang</i>)	4
Sento de Rekon' (<i>Wally du Temple</i>)	5
Uliso (<i>Alfred, Lord Tennyson (trad. Oswald Jones)</i>)	6
Antaŭ la dom' ... (<i>Hungara popolkanto (trad. Pál Miklós Gajdos)</i>)	9
Ho, brilanta stelar' ... (<i>Hungara popolkanto (trad. Imre Szabó kaj Gajdos Pál Miklós)</i>)	11
Intervjuo kun Miklós Pál Gajdos (<i>Erika Godó</i>)	12
Vivo de Miklós Pál Gajdos (<i>Miklós Pál Gajdos</i>)	14
Vintra dormo (<i>Erika Godó</i>)	15
2026 estas memorjaro de Kalocsay (<i>Erika Godó</i>)	16
Atendado (<i>Laimundas Abromas</i>)	17
La jaro du mil dudek kvin (<i>Moissey Bronshteyn</i>)	18
Kiel mi perdis mian feliĉon (<i>Oldřich Arnošt Fischer</i>)	19
Eta skarabo (<i>Lenke Szász</i>)	21
Kion ni faru por la fina venko? (<i>Lenke Szász</i>)	22
Novelo pri cigano, ursino kaj rondĉapelo (<i>Julian Modest</i>)	24
La plej bela poemo de la mondo (<i>Veniam János Varga (trad. Erika Godó)</i>)	28
Patrino diru (<i>Magdolna Kun (trad. Erika Godó)</i>)	29
Eksterordinara okazaĵo (<i>Roland Platteau</i>)	30
Eksterordinara okazaĵo en Neuville Saint-Vaast (<i>Louis Barthas (trad. Roland Platteau)</i>)	31
Brigitte Bardot (<i>Roland Platteau</i>)	33
La signifo de mia vivo (<i>Brigitte Bardot (trad. Roland Platteau)</i>)	34
La barita pordo (<i>Julio Cortázar (trad. Detlef Karthaus)</i>)	36
La burĝonaĝo de fraŭlino Johana Brodi (<i>Muriel Spark (trad. Detlef Karthaus)</i>)	43
Vento orienta – Vento okcidenta (<i>Pearl S. Buck (trad. Detlef Karthaus)</i>)	51
Fablo pri “fablo” (<i>Rita Mkrťjan</i>)	55
Mia kateno (<i>Angel Arquillos Lopez</i>)	56
Leteroj el la kosmo (2) / Sur la planedo “Frateco” (<i>Elena Popova / Nikolao</i>)	57
Aporio II (<i>Paulo P. Nascentes</i>)	62
Jaga (<i>Maksim Boĉkarev (trad. Sergei Isakov)</i>)	63
Ĉe mia katino (<i>Laure Patas d'illiers</i>)	69
La belkolora kobro, kobro... (<i>Vullnet Mato (trad. Bardhyl Adem Selimi)</i>)	72
Mi ne estas tiu (<i>Kumrie Avdyl Shala (trad. Bardhyl Adem Selimi)</i>)	73
Decembro (<i>Paulo P. Nascentes</i>)	75
Virino (<i>Paweł Szamborski (trad. Ryszarda Kwiatkowska)</i>)	76
Grajnoj de Tempo (<i>Paweł Szamborski (trad. Ryszarda Kwiatkowska)</i>)	77

Kristnaska Poemo (<i>Wojciech Młynarski (trad. Ryszarda Kwiatkowska)</i>).....	78
Pifu iras al Marso (<i>Csaba S. Németh</i>).....	80
Intervjuo kun Csaba S. Németh (<i>Erika Godó</i>).....	89
Viro (<i>Arjana Fetahu Gaba (trad. Bardhyl Adem Selimi)</i>).....	94
Esperanto ne falis de l' ĉielo (<i>Ieda Freitas</i>).....	95
Brokanta Ĉarmo (<i>Kinga Fabó (trad. István Ertl)</i>).....	96
Ĉiam estas tempo! (<i>Andreas Zervas</i>).....	97
Poemoj de gajnintoj de la tradicia konkurso de SEL (<i>trad. NOVAKOV ŽIVANKO kaj Lorijan Popi</i>).....	98
La Aldravio (<i>Cícero Carlos Oliveira da Silva</i>).....	101
La unua neĝo (<i>Jadranka Mirić</i>).....	103
Neĝeroj (<i>Yi Qiao</i>).....	105
Kontemplado dum Advento (<i>Yi Qiao</i>).....	106
Ĉevalo kaj bubalo (<i>Li Weilun</i>).....	107
Ĉu mi devas kviete iri for (<i>Zhang Fanglu (trad. Ardo)</i>).....	108
Neĝo sur la Rivero (<i>Liu Zongyuan (trad. Ardo)</i>).....	109
Ario de juneco (<i>Yin Jiaxin</i>).....	110
Feliĉo de du familioj (<i>Yin Jiaxin</i>).....	114
Florŝtelisto (<i>Kozawa Mami</i>).....	120
Unua leciono de Esperanto (<i>Ĉielismo</i>).....	122
2026 – Amu vin mem (<i>John Huang</i>).....	124
Ŝtona Konfeso (<i>Miao Hui</i>).....	125
Superante antaŭjuĝon por amo al la diferenco (<i>Ieda Freitas</i>).....	128
Neĝis (<i>Harri Ikonen</i>).....	129
River – Animo kaj Ĵuro (<i>Harri Ikonen</i>).....	130
Temas pri Morto (<i>Gajo</i>).....	131
La Sorto de Aina (<i>Ranja Zafinifotsy</i>).....	132
Mi estas (<i>Sabin Maruhe</i>).....	136
Kiam la jaro endormiĝas (<i>Jeroubaal Banyanga</i>).....	137
Momenteto (<i>Luo Shuigen</i>).....	138
La Ĝenoj de Kabi (2) (<i>Viktoria</i>).....	141
La instruisto estas lumturo (<i>Tang Danling (trad. Orpaco)</i>).....	145
La Lampo de Kazi (<i>Jeroubbesheth Banyanga</i>).....	146
Mia Foriro (<i>Gabriel Olubunmi Osho-Davies</i>).....	147
Rezultoj de la Internacia Konkurso de IKUE (<i>IKUE</i>).....	148
Rakonto de Georgo (<i>John Huang</i>).....	149
Taglibro de Pipi (<i>Pipi</i>).....	151
Regularo de la Internacia Traduk-Konkurso “Vejdo” (2026) (<i>UEA / Literatura Vivo</i>).....	155

Vortoj por niaj legantoj



Erika Godo



John Huang

Karaj amikoj kaj fidelaj legantoj,

Kun granda ĝojo ni prezentas al vi la februaran numeron de 2026. Dum la vintro ankoraŭ regas en multaj partoj de la mondo, niaj paĝoj floras per literatura diverseco, kunligante voĉojn el diversaj epokoj kaj landoj en la komuna lingvo Esperanto. Februaro alportas ankaŭ la tradician lunan Novjaron, la Feston de Printempo; ni deziras al ĉiuj niaj legantoj feliĉan kaj prosperan Jaron de la Ĉevalo!

Ĉi tiu numero estas speciala pro pluraj kialoj. Nia kovrilpaĝo kaj la centra intervjuo estas dediĉitaj al Miklós Pál Gajdos. Pere de la demandoj de Erika Godó, ni malkovras ne nur lian vivon, sed ankaŭ lian profundan ligon al la movado kaj lian riĉan artan spiriton. Krome, ni eniras la jaron 2026, kiu estas oficiala memorigjaro de la granda majstro Kálmán Kalocsay; ni invitas vin kune honori lian heredaĵon, kiu daŭre inspiras nian literaturon.

La poezia fako de ĉi tiu numero estas aparte riĉa. Ni vojaĝas de la klasika “Uliso” de Alfred Lord Tennyson, majstre tradukita de Oswald Jones, ĝis la melodiaj hungaraj popolkantoj. Modernaj versoj de Wally du Temple, Yi Qiao kaj Laimundas Abromas alportas nuntempajn sentojn pri amo, naturo kaj vivaj kontempladoj.

En la proza parto, ni prezentas mondfamajn nomojn kune kun talentaj originalaj verkistoj. Vi trovos la misteran mondon de Julio Cortázar en “La barita pordo” kaj la orient-okcidentan kulturkonfronton en la verko de Pearl S. Buck. Roland Platteau gvidas nin tra historiaj rememoroj de la Unua Mondmilito, sed ankaŭ surprizas nin per traduko de Brigitte Bardot.

Nia revuo ĉiam zorgas pri la tuta familio. En ĉi tiu numero, la aventuroj de “Pifu iras al Marso” de Csaba S. Németh (akompanataj de nia intervjuo kun li) kaj la amuza “Taglibro de Pipi” certe ridetigos kaj la junulojn kaj la korjunulojn.

Fine, ni volas direkti vian atenton al la fino de ĉi tiu numero. Tie vi trovos la regularon de la Internacia Traduk-Konkurso “Veĵdo” (2026), kunorganizata de UEA kaj nia revuo. Ni instigas ĉiujn tradukemulojn partopreni kaj montri la riĉecon de niaj naciaj lingvoj per manfaritaj, altkvalitaj tradukoj.

Ni esperas, ke la enhavo de ĉi tiu 155-paĝa numero fariĝos via agrabla kunulo dum trankvilaj horoj. Dankon pro via subteno, kiu ebligas al *Literatura Vivo* resti vigla fenestro al la mondo.


Bonan legadon!

Handwritten signatures of Erika Godó and John Huang in black ink.

Erika Godó kaj John Huang

Redaktoroj de *Literatura Vivo*

Sento de Rekon'



Wally du Temple

Kafdrinkas en aerodrom'
Atendi flugon hejmen
Aŭdas ritmon de metronom'
Ĉu karulo, apudvenen?

Ridetas la person'
Tremon sangatestas
Varmo de la ton'
Voĉo neaŭdeblas

Sento de rekon'
Emo apudesti
Preter la rezon'
Tempo animfesti

Koro ardgravitas
Alestas nekonato
Tamen rekonatas
El vualo de pasinto

Pensi ja nenion
Lasi amsugesti
Senti ja animon
Sopiras ja muziki

Deziras animsaluti
Flugo jam baldaŭas
Koro stumblas pensi
La lingvo apenaŭas



‘Uliso’ de Alfred, Lord Tennyson 1853

en la traduko de *OSWALD JONES*

Por kio mi, jam nenifara reĝo,
Ĉe dorma sojlo, inter nudaj rokoj
Apud edzino same aĝa sidu
Kaj donu leĝojn al sovaĝa gento,
Kiu avaras, dormas, manĝas, spitas?
Mi jam ne povas hejme resti, volas
Trinki vivon ĝis la lasta gut’: ĉiam mi
Multe ĝuis. Multe ploris, kaj sola,
Kaj kun kamaradoj – kaj surtere kaj
Sur muĝa maro, kiam la Hiadoj
La Pluvaj, regis inter nuboj flugaj.
Mi jam fariĝis nomo: mi, vaganto
Eterna, avidkora, multon vidis
Kaj konis – urbojn, morojn, regionojn,
Kortegojn – samrangulo inter ĉiuj.
Mi ĝoje vetbatalis kontraŭ fratoj,
Sur venta ebenaĵ’ de l’ fora Trojo.
De ĉio travivita mi fariĝis
Parto; sed ĉiu sperto estas ark’
Tra kiu lumas tiu nekonata
Mondo for, kies rando vualiĝas
Kun ĉiu paŝo preter atingeblo.
Ho! Tedas fari finon kaj rezigni,
Jam rusti skvame, ne pro uzo brili;
Kvazaŭ spirado estus vivo! Vivo



Eĉ plura ne sufiĉus, kaj el mia
Malmulto restas; ĉiu hor' savita
El tiu dorm' eterna povos ion
Novan alporti. Aĉe estus vere
Dum du-tri jaroj ŝpari kaj avari –
Kun griza pacienco, dum l'animo
Impetas sekvi scion kiel stelon
Falantan, trans la limon de atingo!
Jen mia filo Telemako,
Al li mi lasas sceptron kaj l'insulon;
Mildigi pacienco kaj prudente
Ĉi brutan rason, kaj po etaj gradoj
Eduki ĝin al bono kaj utilo.
Li virte okupiĝos en la sfero
De ĉiutagaj devoj, kaj skrupule
Plenumos servojn de kompata flego
Kaj deca rito al la domaj Dioj:
Mi iros do – li faru siajn devojn,
Kaj mi la miajn!
En haven' la ŝipo
Jam streĉas siajn velojn, kaj embuskas
La vasta sombra maro. Ho ŝipanoj,
Animoj, kiuj kun mi kunlaboris,
Suferis, strebis vigle kaj konkorde,
Kaj ĉiam ride, gaje renkontadis
Tondron kaj sunon kun libera koro
Kaj hela frunto – vi kaj mi maljunas;
Grandaĝo havas tamen dignajn penojn!
La mort' sigelas ĉion, sed ankoraŭ
Io fareblas – ia nobla verko
Deca por homoj, kiuj kun la Dioj



Luktadis! Trans la rif' la lumoj brilas,
La longa tago velkas, tede grimpas
La luno, kaj la mar' multvoĉe ĝemas.
Venu amikoj! Restas tempo serĉi
Pli novan mondon. Puŝu for la ŝipon,
Sidiĝu orde kaj kun ritma takto
Batu la sulkajn ondojn, ĉar ni tenas
Firme la celon, antaŭ morto voji,
Trans sunsubiron kaj la lokon, kie
La steloj dronas en la okcidento.
L'abismoj eble glutos nin, kaj eble
Ni trafos la insulojn de l'Feliĉo
Kaj jam revidos Aĥilon gloran.
Ni multon perdis, tamen multe restas,
Kaj ni mem, kvankam ne plu tiu forto,
Kiu skuadis teron kaj ĉielon,
Restadas tamen en esenco samaj:
Konkorda bando de heroaj koroj,
Lezita de la tempo kaj fatalo,
Sed forta en la volo strebi, serĉi
La celon, kaj obstini ĝis la trovo.



Mi rekomendas eldoni jenan tradukon de OSWALD JONES kiu aperis nur en la Kvarkera Esperantisto. Ĝi ne aperas en la du E-antologioj de Angla Literaturo.

El la Kvarkera Esperantisto, numero 73, Somero 1972, p-oj 16-18

La traduko estas eminenta sed ne facile havebla. [Wally du Temple](#)

Antaŭ la dom'...

Hungara popolkanto

Antaŭ la dom', mia kara panjo
altas bela morusarb';
Mi substaras, mia kara panjo
Mankas mia pluvopalt'.
Sub folioj segildentaj
ŝvebas bonodor';
Pro la fraŭlo, kara mia panjo,
ne malĝoju mia kor'!

Super la dom', mia kara panjo
brilas nokte la stelar';
Ankaŭ al mi, mia kara panjo,
enbriletas stelopar'.
Enviegas oni min pro tiu bela stel',
kiu brilas por amatin' kara
tra l' fenestro en vesper'.

2-a VERSIO:

Antaŭ la dom', kara patrineto,
estas robiniarbo.
Mi substaras, kara patrineto,
pro la densa pluvado;
Blanka estas la floraro,
logas bonodor';
Pro junulo, ho, patrino kara,
ne doloros mia kor'!



Pál Miklós Gajdos

Házunk előtt...

Házunk előtt, kedves édesanyám,
van egy magas eperfa.
Alá állok, kedves édesanyám,
hogy ne ázzak alatta.
Csipkés annak a levele,
sej, de jó szagú,
Egy legényért, kedves édesanyám,
sose leszek szomorú.

Házunk felett, kedves édesanyám,
ragyognak a csillagok.
Énhozzám is, kedves édesanyám,
egy pár csillag beragyog.
Éntőlem is irigyelik
azt a csillagot,
Amelyik a szobám ablakába
minden este beragyog.

Antaŭ la dom', kara patrineto,
 lumaj steloj ekbrilas;
 Tra l'fenestro, ho patrino kara,
 stel-duopo enbrilas;
 Enviegas oni min pro tiu bela stel',
 kiu brilas por amatin' kara
 tra l'fenestro en vesper'.





 An - taŭ la dom', ka-ra pat-ri-ne - to, es-tas ro-bi-ni - ar - bo.



 Sub ĝin sta - ras mi, ka-ra pat-ri-ne - to, pro la den-sa plu-va - do;



 Blan - ka es - tas la flo - ra - ro, lo - gas bon-o - dor';



 Pro ju - nu - lo, ho, pat-ri-no ka - ra, ne do-lo-ros mi - a kor'.


Hungara popolkanto

Ho, brilanta stelar'...

Ho, brilanta stelar'-lumo de ĉielo!
Montru vojon al la junul' via helo!
Montru vojon tie al la vilaĝfino,
Li ne trovas hejmon de la amatino.

Dio, mia Dio, kara Dio mia!
Kiam estos la viv' por mi bel-libera?
Belan vivon tiam libere mi havos,
Kiam karulinon ame brakumados.

Korto, mia korto, mia korto ronda,
Ne balaas vin jam mia brak' malforta;
Balais sufiĉe, sed plu ne balaos,
Amis mi, karulin', vin, sed ne plu amos!



Tradukis: *Imre SZABÓ* kaj
Gajdos Pál Miklós (Paŭlo Gajdoŝ)

Csillagok, csillagok...

Csillagok, csillagok, szépen ragyogjatok!
A szegény legénynek utat mutassatok!
Mutassatok utat a szegény legénynek;
Nem találja házát a szeretőjének.

Istenem, Istenem, én édes Istenem!
Mikor lesz énnékem szép szabad életem?
Akkor lesz majd nékem szép szabad életem,
Mikor a babámat kedvemre ölelem!

Udvarom, udvarom, szép kerek udvarom,
Nem söpör már többé az én gyöngye karom;
Söpörtem eleget, söpörjön hát más is,
Szerettelek, babám, szeressen már más is!



Intervjuo kun Miklós Pál Gajdos

Erika Godo



1. Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Mia avo, gepatroj, onklino kaj baptopatro, kiuj laŭtleĝis al mi fabelojn kaj legendojn, donacis al mi librojn ekde mia infanaĝo.

2. Kio plej allogis vin al tradukado?

Min allogis al tradukado la manko de tradukitaj hungaraj popolkantoj. Pli ĝuste, la ĉagreniĝo, ke okaze de E-kunvenoj oni ĉiam kantas nur “Vent’ printempa kirlas akvon, floreto, floreto” aŭ “Arbaro, arbaro, bela hungara arbaro”, kvankam Hungario havas plurcentmil popolkantojn...

3. Pri kiu traduko vi plej fieras, kaj kial?

Mi plej fieras pri la tradukitaj hungaraj popolkantoj (pli ol 100), kiuj legeblas en la *Libera Esperanta Kantaro* (www.kantaro.ikso.net). Mi fieras pri ili, ĉar la plejmulto el ili estas jam tre bonaj tradukaĵoj. Tra pluraj jaroj ili estis poluritaĵoj fare de mi kaj ankaŭ fare de gesamideanoj, kiuj kantis ilin kun mi.

4. Kiajn defiojn prezentas traduki hungarajn popolkantojn kaj preĝejajn kantojn en Esperanton?

Defioj antaŭ la tradukisto de kantoj estas:

- a) oni devas bone posedi Esperanton;
- b) oni devas scii kanti kaj posedi tonsenton;
- c) oni devas koni la poetikon almenaŭ mezgrade;
- d) oni devas akiri spertojn en tradukado;
- e) oni devas havi kritikistojn kaj helpemajn kantkamaradojn;
- f) oni devas aĉeti iom da vino, ĉar se ne estas benzino, ne funkcias la motoro...

5. Kiel vi rigardas la principon “fidelo, flueco kaj eleganteco” en esperanta tradukado?

Fidelo, flueco kaj eleganteco estas bezonataj ankaŭ en la tradukado de popolkantoj kaj ekleziaj kantoj. Tial la tradukisto devas plurfoje korekti la versojn, la ritmon, la rimojn kaj la tropojn.

6. Kion signifas literaturo por vi?

Literaturo estas por mi ege grava, ĉar mi ŝatas legi ekde mia infanaĝo, kaj mi estas instruisto de literaturo kaj hungara lingvo.

7. Kiaj interagoj kun aliaj Esperantistaj verkistoj havis la plej grandan efikon sur vi?

Plej multe efikis je mi mia kolego kaj amiko Szabó Imre, kiu estis poeto, tradukisto kaj E-instruisto, kaj prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio. Krome ankaŭ Mézes Gyöngyi, la nuna prezidantino de HEA, kiu multe helpis korekti la kantotradukaĵojn. Krome mia amiko Antono Samak en Debrecen kaj lia edzino Kata, kun kiuj mi plej multe kunlaboris en la korektado de kantoj. Mi kun Antono duope konkuras en la tradukado, helpante unu la alian.

8. Ĉu vi partoprenis literaturajn tradukkonkursojn kaj gajnis premion iam?

Mi neniam partoprenis literaturan konkurson.

9. Kiel ŝanĝiĝis la percepto pri Esperanto en Hungario dum la lastaj jardekoj?

La granda ondo en Esperanto-lernado dum la lastaj du jardekoj bedaŭrinde finiĝis pro ŝanĝiĝo de leĝo, sed mi kredas, ke ne malaperis la scio pri Esperanto en la hungara socio, kaj la disŝutitaj semoj ĝermas kaj ĝermos en multaj homoj.

10. Kion vi spertas: kiu plej interesiĝas pri Esperanto hodiaŭ?

Laŭ mia sperto, pri Esperanto plej interesiĝas pensiuloj, kiuj havas tempon viziti klubojn aŭ E-aranĝojn.

11. Kion signifas por vi la gvidado de la Debrecena Esperanta Klubo?

La gvidado de la Debrecena Esperanta Klubeto signifas por mi amuziĝon, kaj krome forumon, kie mi povas prezenti la kantotradukaĵojn, dank' al la Biblioteko Méliusz, kie oni senpage donas al ni grandan halon kun saĝa tabulo.

12. Kiel vi vidas la estontecon de Esperanto en la cifereca epoko?

En la cifereca epoko, kie regas la komputiloj kaj interreto, Esperanto havas pli grandan eblecon ol iam ajn por la pluivado, prospero kaj disvastiĝo, malgraŭ la apero de tradukmaŝinetoj kaj tujtradukiloj. (Ili estas multekostaj kaj, laŭ mi, iel nenaturaj.)

13. Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via tradukado?

Mi planas plu traduki kantojn kaj poemojn, eventuale unu-du el hungaraj romanoj.

14. Kion vi volus diri al legantoj de *Literatura Vivo*?

Al la legantoj de *Literatura Vivo* mi proponas legi plu Esperante ĉiutage almenaŭ dek minutojn! La nekonatajn vortojn notu sur slipon (paperpeceton), poste serĉu kelkajn el ili en reta vortaro. La plej bona reta vortaro estas elŝutebla sur telefonon: www.vortaro.hu/vortaro_ap/index.html ◆

Vivo de Miklós Pál Gajdos



Miklós Pál Gajdos estas esperantisto, instruisto pri la hungara lingvo kaj literaturo, bibliotekisto, ortodoksa kristana kantoro kaj leganto.

Li naskiĝis en Kölcse la 7-an de decembro 1951. Li maturiĝis ĉe la Mezlernejo Kölcsey Ferenc en Nyíregyháza en 1970. Inter 1970 kaj 1975 li studis teologion en la Grekkatolika Teologia Kolegio en Nyíregyháza.

En 1989 li ricevis diplomon pri Esperanto-lingvo kaj -literaturo en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en Budapeŝto. Li laboris kiel bibliotekisto kaj instruisto pri la hungara lingvo en bazlernejoj en Hajdúsámson, Nyíradony kaj Nagycserkesz. Ekde 2002 li estas ekzamenanto de Esperanto ĉe la centro por Plua Fremdlingva Edukado de ELTE.

Li lernis Esperanton en 1976 kaj komencis instrui ĝin en 1981. Komence li instruis Esperanton en specialaj grupoj de bazlernejoj, poste, ekde 2000, li instruas ĝin en kursoj kaj privataj lecionoj por universitataj kaj altlernejaj studentoj en Debrecen, Nyíregyháza kaj pluraj pli malgrandaj urboj.

Li estis estrarano de la Hajdú-Bihara Esperanto-Komitato. Li ankaŭ estis membro de la estraro de la Debrecena kaj Regiona Esperanto-Asocio ekde ĝia fondo ĝis ĝia dissolvo (1991–2002). Ekde 2004 li estas gvidanto de la Debrecena Esperanto-Klubo.

Li organizas ekumenajn diservojn en Esperanto en la kongresejo de Reformita Eklezio de Debrecen.

Tradukoj kaj verkoj

Sándor Giesswein: teologo, lingvisto, apostolo de la paco kaj de Esperanto / Gajdos Pál Miklós. – Budapeŝto: ELTE, 1989. Diplomblaboraĵo.

Árpád-epokaj Hungaraj sanktuloj. Biografioj publikigitaj en la retejo-ortodoxio.org, 2019.


Hungaraj kantoj en Esperanto: 105 popolkantoj, popularaj kantoj kaj ekleziaj kantoj en Esperanto. PDF, ISBN 978-615-6008-06-0, Copyright © 2022, tradukis Miklós Pál Gajdos. – Eldonita de Éva Lövey Varga.

VINTRA DORMO

La riveroj kaj akvo silente glaciigis,
sub travidebla kiraso ili endormiĝis.
La tempo haltas, la mondo kvietas,
la akvo ĝian vintran sonĝon gardas.
La bordo spiras en blanka nebulo,
kanoj konservas sekretojn sen vorto.
Ĉiu guto nun ripozon trovas,
en ĝia koro printempon ĝi portas.
Sub la glacio la vivo pulsadas,
pri vastaj vojoj ĝi sonĝas.
Dum la vintro la sonĝon ĝi protektas,
la akvo pacience vekigon atendas.



Erika Godó



2026 estas memorjaro de Kalocsay

Erika Godó



Kálmán Kalocsay forpasis antaŭ 50 jaroj, sed lia heredaĵo ankoraŭ vivas hodiaŭ, kaj la Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay okazos por la unua fojo ĉi-jare.

Malmultaj hungaraj aŭtoroj havis tiom da influo sur la naskiĝo de internacia literaturo kiel Kálmán Kalocsay. Gimnaziano, kiu trovis esperantan libron en Miskolc, fariĝis unu el la plej signifaj esperantaj poetoj, tradukistoj kaj lingvistoj de la 20-a jarcento - verkisto, kiu ne nur kreis verkojn, sed ankaŭ levis tutan literaturan lingvon al klasika nivelo.

La poezia kariero de Kalocsay komenciĝis per hungaraj poemoj, kaj li estis publikigita en Okcidenta (Nyugat) en juna aĝo. Tamen, lia vera verkaro estas ligita al Esperanto: post lia volumo Mondo kaj Koro publikigita en 1921, Streĉita Kordo en 1931 fariĝis mejloŝtono. Ĉi tiu volumo nun estas konsiderata la komenco de klasika esperanta poezio. Ne estas hazardo: Kalocsay evoluigis la ĝis tiam mankantan esperantan version, kiu teknike egaligis la poezion de naciaj lingvoj.


Lia poezio esprimas la plenan gamon de homaj sentoj - ĝojon, doloron, amon, esperon kaj dubon - per subtilaj nuancoj, maksimume utiligante la eblecojn de la lingvo. Liaj poemoj estas legeblaj en multaj naciaj lingvoj, de la angla ĝis la ĉina ĝis la vjetnama.

Kiel tradukisto, Kalocsay konstruis pontojn inter kulturoj. Johano la Brava de Petőfi, La Tragedio de la Homo de Madách, Infero de Danto kaj la dramoj de Shakespeare fariĝis parto de la esperanta mondliteraturo per liaj tradukoj. Liaj tradukoj estas ne nur lingvaj atingoj, sed ankaŭ literaturaj atingoj, kiuj altiris la atenton de ne-esperantaj profesiuloj.

Li ankaŭ faris daŭran impreson kiel lingvisto kaj redaktanto. La Parnasa gvidlibro kaj la Plena Gramatiko de Esperanto estas ankoraŭ bazaj verkoj hodiaŭ, kaj la revuo Literatura Mondo - kune kun Gyula Baghy - fariĝis la "Okcidento" de la esperanta literaturo.

Konsiderante ĉion ĉi, ne estas surprize, ke la memoro pri Kalocsay estas ankoraŭ vivanta temo hodiaŭ. Nove organizita Memorjaro de Kalocsay ne celas konkuri kun aliaj memorceremonioj, sed kompletigi ilin: per temaj programoj, iniciatoj celantaj junulojn, internaciaj kunlaboroj kaj daŭraj rezultoj - ciferecaj arkivoj, novaj tradukoj, komunumaj eventoj.

La verkaro de Kálmán Kalocsay ne estas fermita ĉapitro, sed heredaĵo, kiu ankoraŭ aktivis hodiaŭ. Ĝi apartenas al kreinto, kiu pruvis, ke la "komuna lingvo de la mondo" povas esti ne nur komunikilo, sed ankaŭ portanto de la plej alta nivelo de poezio. ♦



Atendado

Ĝi nestas en mia malnova poŝtkesto,
Dum tago, dum nokto deĵoras modeste.
Embuskas ĝi ion ĉe pordo, post pordo
Kaj strange ĝi gvatas, najbaras sen ordo.
Tra l' truo serura ĝi kaŝe observas,
Konstante apudas, atenton konservas.
En ĉambra angulo dum nokto deĵoras
Ĝis venas mateno kaj tag' ekaŭroras.
– Pro kio? – silente mi provas diveni.
Mi estas scivola, ĉar volas kompreni.
Ĉu timas ĝi perdi, kaj min ne plu trovos?
Ĉu ĝi foririnte reveni ne povos?
Pro tio ĝi ĉeas kaj mi ne plu miras,
Ke ĝi, kiel ombro, silente postiras.
Ĝi ĉiam apudas – en lito, surstrate,
Somere kaj vintre kaj tre akurate.
Kaj tamen ĝi povas influi neniom,
Nek iujn kunigi, disigi neniujn.
Kaj la atendado, ĉu ĝi – mia sorto?
Ĉu devos atendi mi ion ĝis morto?
Mi tamen atendas, sed kion- ne scias,
Kaj ne nervoziĝas, ĉar ĉion konscias.



Laimundas Abromas

La jaro du mil dudek kvin



Moissey Bronshteyn

La jaro du mil dudek kvin forpasas. Adiaŭu ĝin Mi kun respekto, eĉ se min ĝi traktis ne dorlote. Ĝi estas memorinda jar', ĉar estas mia ĝi, kaj ĉar en mia streĉa kalendar' ĉeestis ja allog' de

ideoj freŝaj por verkad',odoro de la nova plad' kaj tent' de nekonata pad' por ĝin esplori ire. Mirakloj vere mankis, sed ĉeestis kaŭzoj por konced' ke evoluas viv-proced' stumblete, tamen mire.

La jaro du mil dudek ses ĉesojele staras kun promes', ke pliboniĝos ĉio. Jes, mi restas kun espero pri firma pac' en nia mond', pri la ebleco por renkont' kun adorata mia rond' amika. Sur la tero.


Do restu sanaj mi kaj vi - tutmonda mia famili', aktivu plu kaj faru pli por aspirata celo. Vin imagante en lontan', Mi bondeziras al kompan', kunbatalant', samidean' plej kore -



2026

Kiel mi perdis mian feliĉon

Oldřich Arnošt Fischer



Kiam en la mondo aperis interreto, mi miris: „Interreto? Kio estas tio? Ĉu tio estas iu kabareto? Ja mi scias diferencon inter tabureto kaj minareto, sed la vorton interreto mi neniam aŭdis”. Eĉ kiam oni al mi priskribis historion kaj avantaĝojn de la interreto, mi longtempe obstine rezistis. Sed poste mi danke al la interreto trovis la unuan utilan informon kaj ekkomprenis, kiel multe avantaĝoj al mi la interreto povas doni. Mia horizonto plilarĝiĝis! Sed, sincere dirite, mi estas strangulo, kiu volas esti feliĉa, sed estas atentema. Kiel multe da proponoj de feliĉo mi sur la interreto trovis kaj tuj poste perdis!

Ekzemple politikistoj de unu el niaj politikaj partioj al mi rete promesis preskaŭ surteran paradizon, se mi donos al ili mian voĉon. Ili havas grandajn ambiciojn, spertajn ekspertojn, precipe ekonomojn, kaj jam bonege scias, kiel gvidi nian popolon al eterna bonstato. Certe ili faros grandajn ekonomiajn reformojn, danke al kiuj mi pagos malgrandajn impostojn. Mia emerita pensio ekkreskos. Dankon, sed ili ne skribis, kiel pro tiuj ŝanĝoj trovos monon. Pro tio mi balotis por alia partio kaj ĝis nun ne estas riĉulo. Tiel mia feliĉo perdiĝis.

Multe da feliĉo promesas reklamoj pri alkoholaĵoj. Vane, ĉar mi estas abstinulo.

Dum mia vivo mi ŝparis iun monon, ne multe, sed mi estas kontenta kun tio, kion mi havas. Kiel naiva mi estas! La interreto, fonto de la feliĉo, min informas, ke mi povas esti pli riĉa, eĉ fariĝi milionulo, se mi mian monon bone investos. Plej bone estos investi mian monon en la kompanio Honesta kaj Pli Honesta. Kruda petrolo, ebena ligno, diamantoj ktp. Mia mono ne kuŝu neutile en banko, sed kreu por mi pli multe da mono!

Bone, sed sur reto mi ankaŭ trovis informon pri juĝo kontraŭ ĉefo de menciita kompanio, kiu jam kelkajn monatojn pro fraŭdo spiras kvadratetan aeron kaj ĉiutage diligente fabrikas paperajn saketojn! Pro tio mi ĝis nun mian ŝparitan monon ne investis kaj neglektis mian feliĉon.

Surprizo! Bonaj homoj ankoraŭ ekzistas! Nekonataj amikoj el vilaĝo Paviana Vadejo, kiu situas en afrika ŝtato Rumbumburo al mi sendas urĝan retmesaĝon. Kio okazis? Nekredeble! Iu riĉa germana ĉasisto, kiu havis la saman familian nomon kiel mi, en afrika ĝangalo dum ĉasado de hipopotamoj tragike dronis. Lia boato hazarde renversiĝis... Oni trovis lian korpon nur kiam la rivero elsekiĝis... Kompatinda sinjoro Fischer havis neniujn heredantojn. Miaj amikoj scias pri milionoj da eŭroj kaj iom da oro, sed malbonŝance ili mem ne kapablas la monon preni el banko. Ĉu tio ne estas peĉo? En tiu mizera situacio ili ĝustatempe rememoris pri mi, kiu loĝas en Eŭropa urbo Brno

kaj certe al ili helpos. Kompreneble, ke kiam ili kun mia financa subteno la monon kaj oron akiros, ili juste kun mi dividos. Por necesa traktado kun la banko kaj doganistoj ili bezonos nur du milojn da eŭroj, kiujn mi sendos al banka konto... Precipe mi devas agi rapide kaj diri pri tio al neniuj. Mi ilin obeis kaj vere agis rapide, tio signifas, ke mi tuj retletere direktis ilian konduton en limojn normajn kaj konformajn. Kial mi perdis mian feliĉon? Se mi ne estus atentema, mi povus esti milionulo. Aŭ almozulo.



Mia vivo estas eventoriĉa. Venontfoje min feliĉigis foto de belega fraŭlino en kamufla uniformo. Ŝi estas usona soldatino kaj serĉas amikon. Do, mi estas feliĉe edziĝinta, sed se vere temus pri amika rilato... kial ne amikiĝi? Mi polite al ŝi respondis, ke ŝi estas en aĝo de mia nepino, sed se ni havos la samajn aŭ similajn interesojn, ni povos esti interretaj amikoj... Feliĉo al mi ekridetis! Jam post tri horoj mi retletere ricevis pluan informon. La fraŭlino estas usona subleŭtenantino. Ŝi jam tri monatojn servas en arma misio en Respubliko Kamelujo, interesiĝas pri trikado, pentrado, kuirado, astronomio kaj pafado, kaj ŝia komandanto estas kolonelo Charles Smith. Kion mi faris? Mi petis ŝin transdoni al la kolonelo mian sinceran saluton – kaj finis kun ŝi ĉiujn kontaktojn. Kial? Ŝi vere estis bela, sed antaŭ multe da jaroj mi servis en armeo, pro tio mi bone scias, ke vera soldato aŭ soldatino devas neniam al iu diri nomon de sia komandanto. Ne, verŝajne tiu fraŭlino pozis al fotisto en ies uniformo, sed ne estas soldatino. Denove mi perdis mian feliĉon!

Sed pensante pri ĉiuj miaj interretaj aventuroj mi demandas, ĉu sur la reto mi vere perdis mian feliĉon? Ne, mi estas nature feliĉa homo kaj ĝuas la vivon. Sur la reto ĉiuj bonkoruloj senĉese volas mian feliĉon. Mi ĝin donos al neniuj! ♦

Eta skarabo

Hejtlignon mi enportis
en la ĉambron vespere.
Pasis la nokto en agrabla varmo.

Mateniĝis. Mi ellitiĝis,
kaj subite iun verdan mi ekvidis
sur tapiŝo, antaŭ mia piedo!
Kio tio estas? Verda kaj briletanta - eta skarabo!
Eble kun la ligno mi enportis ĝin en domon.

Senkiale, instinkte mi timas la skarabojn,
precipe la flugantajn,
sed tiu magra pace rampas antaŭ mia piedo.
Mi estas grandegulo apud ĝi,
mi povus surtreti, mortigi ĝin...

Sed tiel bele ĝi briletas verde -
Ĉu ĝi estas samideano?
Eĉ se ne, sam-Terano,
kun unusola, kurta vivo.

Mi prenas per du fingroj,
kaj portas ĝin al la balkono.
Forflugu, iru en paco!



Lenke Szász



Kion ni faru por la fina venko?

Lenke Szász



Same kiel ĉiu ĝisosta verdulo, ankaŭ mi multe cerbumadis pri la „fina venko” de nia kara lingvo, Esperanto.

Dum multa cerbumado, mi ekhavis diversajn ideojn, kelkajn mi eĉ pruvis: Mi skribis gazetartikolojn, faris kursojn por instrui Esperanton, parolis pri Zamenhof, pri la bela „interna ideo”, faris ekspozicion el miaj esperantaj libroj, bildkartoj ktp, sed la fina venko ne alvenis. Post la kurso nur unu-du komencantoj ekpraktikis la lingvon per korespondado. Kion fari, kion plu fari?

Kiam oni endormiĝas kun iu penso en la kapo, foje okazas, ke la solvo venas dum sonĝo.

Io simila okazis ankaŭ al mi.

•Kiel disvastigi la lingvon de la amikeco tra la mondo? – mi demandis.

Respondis iu mistera aperaĵo, fantomo, spirito, mi ne scias, kiel nomi ĝin, kaj diris la jenon per stranga voĉo alimonda:

•Vi estas stulta kaj tute ne konas la homan naturon. Varbadi por tutmonda amikeco? Sensencaĵo! Oni ne deziras amikiĝi, mense kaj anime pliriĉiĝi, sed akiri potencon kaj riĉecon.

•Sed ... mi intermetis, ni, la esperantistoj estas pacamaj, amikemaj homoj.

La fantomo hahais: - Ĉu la esperantistoj estas pacamaj kaj amikemaj?! Legu iliajn akrajn disputojn, konstatu mem la malamikecon, la malemon al harmonio, kiel iuj intencas forpuŝi el la movadaj postenoj la „rivalon”, kaj ne parolu al mi pri „pacaj batalantoj”! Batali? Jes!

Sed vi devos fari alian himnon, alian standardon, alian devizon, se vi volas disvastigi Esperanton, precipe inter junularo. Ja la Movado bezonas aron da gejunuloj. La naive pacamaj (kaŝe/malkaŝe enviaj kaj intriĝemaj maljunuloj neniam kondukos al la fina venko.



Mi iom honte pensis, ke la vortoj de la fantomo enhavas iom da vero, kaj demandis timeme: - Sed kiu estu la devizo, kiu konkerus amase la junajn korojn?

Jen: MORTIGU LA MALAMIKOJN DE NIA INTERNA IDEO! EK AL BATALO! PEREU ĈIUJ, KIUJ MALSAMOPINIAS!

Tiamaniere vi varbos pli da homoj, ol per ŝafblekado pri amo kaj amikeco. - la fantomo aldonis malestime kaj malaperis en mallumo.

Nu certe tiu ne estis la spirito de Zamenhof. Kaj mia sonĝo fakte estis KOŜMARO. ◆

NOVELO PRI CIGANO, URSINO KAJ RONDĈAPELO

Julian Modest



Kiam mi veturas per vagonaro kaj kiam la kupeo estas plenŝtopita de homoj, ĉiam mi rememoras la historion pri la cigano kaj ursino.

Kial tiu ĉi historio renaskiĝas en mia konscio ĝuste en trajno ? Eble tial, ĉar iu kamparano rakontis ĝin dum mia longa veturado, aŭ eble tial, ĉar veturante per trajno mi ŝatas observi la homojn en la kupeo. Ili sidas unu apud la alia kaj silentas. Silente ili eniras la kupeon, silente eksidas, silentas dum tri aŭ kvar horoj kaj poste, same tiel silente, foriras. Sep aŭ ok homoj, dum horoj, kiel monumentoj sidas unu apud la alia. Martelas ritme la radoj, monotonas la pejzaĝoj, obskuras en la kupeo... La veturantoj gapas al la fenestro, klinas la kapojn, oscedas, kaj tiam en mia konscio aperas kaj aperas la historio pri la cigano kaj ursino.

La kamparano, kiu iam en iu vagonaro rakontis tiun ĉi historion, estis malalta, nek juna, nek maljuna, kun grizaj ruzaj okuletoj, vestita en malmoda, eluzita, sed urbana kostumo. Tiam li sidis en iu angulo de la kupeo kaj en la komenco de la veturado preskaŭ neniu rimarkis lin. Kiel ĉiuj, ankaŭ li horon aŭ du silentis, sed dubite li ekparolis. Eble tial, ĉar li ne povis kompreni, kial la homoj silentas, se ili kune sidas en tiel eta ejo kiel kupeo.

Unue tiu ĉi kamparano familiare demandis sian najbaron, la homon, kiu sidis apud li, kiu stacidomo sekvas. Poste la kamparano ŝerce rimarkigis, ke la trajno, kiel kutime, denove malfruas, kaj mi ne scias kial, sed li, kvazaŭ al si mem, komencis rakonti la historion pri la cigano kaj ursino. Kelkaj kunveturantoj ironie ekridetis, aliaj moke alrigardis la senceremonan kamparanon, tamen li tute ne rimarkis tiujn ĉi rigardojn kaj trankvile daŭrigis sian rakontadon.

Tiam eĉ mi ekridetis, sed la historio pri la cigano kaj ursino restis en mia subkonscio kaj ĉiam, kiam mi veturas per trajno, ĝi reaperas nove kaj denove. Mi jam komencas dubi, ĉu vere mi aŭdis ĝin aŭ iam tre antaŭlonge mi mem travivis tiun ĉi historion, kaj strange, veturante per trajno mi sentas bezonon rakonti al iu pri la cigano kaj ursino.

La radoj martelas, la trajno kuregas, kaj antaŭ miaj okuloj aperas kaj aperas la cigano kaj ursino. La ursino estas malgrasa, nigra – la cigano estas juna, eble tridekjara, vestita en ĉifonoj, kun truaj, deformitaj ŝuoj kaj malpura, makulita rondĉapelo. Lia vizaĝo flavas kiel seka aŭtuna folio, sed liaj okuloj eligas esperon. Cetere tiu espero ludas en ĉiuj ciganaj okuloj, kaj sole tiu espero akompanas la ciganojn dum iliaj longaj senfinaj vagadoj.

De kie venis la cigano kun ursino ? Mi ne scias. Tion eble neniu iam ekscios. Estis somera posttagmezo, kiam la cigano kaj ursino lacaj, polvokovritaj eniris montaran vilaĝeton. La suno subiris kaj malforta vento alblovis de la proksima arbaro. Post la longa labortago la vilaĝanoj ŝvitaj revenis hejmen. Kiel kutime, la virinoj, por eta ripozo, eksidis antaŭ la domoj – la viroj ekiris al la drinkejo.

En la pigra posttagmeza silento eksonis tirata cigana melodio. Skrapante la solan kordon de sia olda guzlo la cigano vigle kriis :

- Hej, vilaĝanoj, venu vidi kion povas fari la saĝa ursin' Maria, fraŭlin'. Nu, Maria fraŭlin', nun montru kiel dancas baletistin' !

La malgrasa ursino stariĝis peze, sendezire kaj, balancante sian longan, nigran korpon, ekpaŝis ronde. La cigana melodio jen tiriĝis, jen vigliĝis, sed eble laca kaj malsata estis la ursino kaj mallonge daŭris ŝia danco.

- Nu, Maria fraŭlin', nun montru, kiel geamatoj kisas unu la alian ! – raŭke kriis la cigano, ritme skrapis lia arĉo, gaje fluis la cigana melodio, sed nek viro, nek virino venis al la placo, kie nur kvin kokinoj vagis tien-tien, bekfrapante ion.

Nur antaŭ la drinkejo silente staris kelkaj vilaĝanoj, kiuj senmove kaj suspekto observadis la dancadon de la vila « baletistin' ».

- Hej oĉjoj bonaj, sen tim' venu al proksim' de Maria fraŭlin' ! – ridetis voĉe la cigano, brilis liaj silikokoloraj dentoj, sed neniu el la vilaĝanoj ekpaŝis pli antaŭen. La cigano tamen, same kiel fama cirkartisto, deprenis per eleganta gesto kaj metis sian rondĉapelon sur la teron. Eble li esperis, ke post minuto la vilaĝanoj venos pli proksimen, kaj abunda pluvo da moneroj plenigos lian makulitan, deformitan rondĉapelon.

- Nu, Maria fraŭlin', nu montru kiel geamantoj kisas unu la alian ĉar delonge jam tiuj oĉjoj forgesis doni kison al la edzin' – kriis la cigano, ruzete rigardis la vilaĝanojn, sed ili staris kiel arboj, apogitaj al la muro de la drinkejo.

La ursino ekgrumblis malkontente, leviĝis peze, faris paŝon, malfermis larĝe manegojn kvazaŭ ŝi subite ĉirkaŭbrakos kaj sufokigos iun.

De ie, kiel brua birdaro, alvenis kelkaj scivolemaj, kirloharaj knaboj, sed tuj post ili alkuris kolerega patrino kaj kiel kato disigas paserojn, tiel ŝi forpelis la infanojn.

- For hejmen, ja vi ne scias, ke la cigano prenos kaj forportos vin.

- Ehstimata virin' ! Mi ehstas bona hom' . Dio gardu min. Mi manĝas panon, ne infanon.

Sed la knaboj malaperis kiel fumo, la silentemaj, suspektemaj vilaĝanoj eniris la drinkejon, kaj sur la placo solaj restis la ursino, cigano kaj lia malplena, makulita rondĉapelo.

De la proksima arbaro, kun la malvarmeta vento, nesenteblo, kiel svelta junulino alŝteliĝis la vespero, stela kaj trankvila. Aŭdigis fora rido, kokokrio kaj soleca voĉo de radio :

« bonan vesperon karaj geaŭkultantoj. Estas la sesa horo. Ni diros la novaĵojn. La pafbataloj inter Irano kaj Irako daŭras. Hodiaŭ en Romo, membroj de la Ruĝaj Brigadoj pafmortigis la kolonelon Giovanni Ferrari. La internacia konferenco pri... » La voĉo de la parolanto silentiĝis, eksonis melodio, kaj iu malŝaltis la radion.

Subite klukoj, kriegoj, batoj de bastono fendis la silenton. La vilaĝanoj, kiel korkoŝtopiloj de ĉampana vino, elflugis el la drinkejo.

Sur la placo, ĉirkaŭ la ursino kaj cigano disflugis plumaro, plumoj kaj sub la peza ursina manego, en marĉeto de varma sango, konvulsiis kokino. Sango gutis de la ursina buŝego.

La cigano blasfemis, sakris, kriegis, batis per la kornusbastono la ursinon.

- Diablo prenu cin Maria fraŭlin'. Ni ehstas ne ŝtelistoj.

La vilaĝanoj tuj ĉirkaŭis la ciganon.

- Pagu la kokinon ! – minace ekkriegis la drinkeja mastro, dika, grasa vilaĝano kun porkaj okuletoj.

- Pagu la kokinon ! - kriis ankaŭ la aliaj.

- Eĉ moneron mi ne havas... - lispis la cigano.

- Ne mensogu, ci aĉulo. Nur ŝteli ci scias !

- Ne ŝtelist'. Dresist' mi eĥstas, oĉjoj bonaj, ne ŝtelist' ...

- ha, ha, ha ...

- For, aĉulo ! – ekkriis ebria, alta junulo.

- For ! – reeĥis la aliaj.

- Oĉjoj bonaj, hodiaŭ, hieraŭ, manĝis mi nehnion – balbutis la cigano.

- Manĝu la kokinon ! – ekkriis la ebria, juna viro, kaj li forte batis per piedo la ciganon ĉapelon, kiu ankoraŭ staris sur la tero.

Timeme la cigano gestis levi la ĉapelon, sed alia vilaĝano pli forte piedfrapis ĝin. La ĉapelo falis sur la piedon de la tria, kiu tuj direktis ĝin al sia najbaro. Simile al simio, la cigano saltis de unu al alia vilaĝano, sed vane. La ĉapelo flugis en la aero, kaj tondraj ridegoj akompanis ĝin. Post minuto la cigano svingis mane, ekblasfemis cigane, ektiris la ĉenon de la ursino kaj foriris.

Ridegoj, ridoj, rikanoj longe eĥiĝis sur la placo.

Venontan tagon, ĉirkaŭ tagmeze, en la drinkejon venis la arbargardisto kaj diris, ke en la arbaro, proksime de la vilaĝo, li trovis la ciganon mortigitan de la ursino.

En la drinkejo estiĝis bruo kaj tumulto.

- Tuj fusilon ni prenu kaj iru persekuti la ursinon, ĉar ĝi minacas la vilaĝon ! – spirege diris la arbargardisto, sed eĉ unu vilaĝano ne ekiris por sia ĉasfusilo.

En la drinkejo komenciĝis arda diskuto pri ursoj kaj ursinoj.

- La ursino nepre estis karnomanĝa – kompetente diris iu.

Aliaj tuj aldonis, ke ili bone faris, ke ili forpelis la ciganon.

- Ja la ursino povus mortigi eĉ homon.

La tria voĉe miris, ke besto ĉiam restas besto.

- Ja la ursino dancis, eĉ komprenis la vortojn de la cigano, sed besto restas besto.

Iu detale klarigis, ke la ursoj estas tre venĝemaj, kaj se iu iam batas urson, la urso ne forgesos tion. Alia vilaĝano komencis longan historion, kiel iam lia avo nur per tranĉilo ĉasis ursojn. Neniu kredis, ke iu nur per tranĉilo ĉasis ursojn tamen ĉiuj aŭskultis atente. La vilaĝanoj longe parolis, rakontis pri ursoj, ursinoj, kaj neniu eĉ vorton diris pri la cigano, kies makulita rondĉapelo ankoraŭ estis antaŭ la drinkejo.



- Homoj, la ursino atendas nin en la arbaro. Kiu venos kun mi ? – ekkriis la arbargardisto., sed neniu aŭdis lin.

Mi ne memoras, ĉu oni pafmortigis la ursinon. Eble tiam en la vagonaro mi ne aŭdis la finon de la historio, aŭ eble ankaŭ en la kupeo oni komencis paroli, rakonti, diskuti pri ursoj, ursinoj, vulpoj, lupoj...

Delonge mi ne vidis ciganon kun ursino. Eble tial, ĉar en niaj montaroj la ursoj iom post iom malaperas. Tamen mi ofte renkontas ciganojn. Multaj el ili estas bone vestitaj, sed strange preskaŭ ĉiu cigano havas makulitan deformitan rondĉapelon. ♦

La plej bela poemo de la mondo

Ho, se nur mi povus verki la plej belan poemon de la mondo!
Tiun, kiu resanigus la animon de l' homaro.
Ĝi prilumus per amo la koron de ni ĉiuj,
Forviŝus ĉiun malpuran pekon de nia tera vivo.

Ho, se nur mi povus verki la plej belan poemon de la mondo!
Tiun, kiu redonus al homoj ilian kredon.
Ĝi alportus en ilian vivon dian pacon,
Forgesigus la dolorajn memorojn de ĉiu malbono.

Ho, se nur mi povus verki la plej belan poemon de la mondo!
Tiun, kiu povus malfermi la okulojn de l' homoj.
Tiam ili fine vidus la planon de la mensogoj,
Kaj neniam plu trinkus la venenon de la malico.

Ho, se nur mi povus verki la plej belan poemon de la mondo!
Tiun, kiu forviŝus la larmojn de l' homoj.
Ĝi bandaĝus ĉiun vundon de la sanganta korpo,
Kaj tenus la forlasitan manon de la soluloj.

Ho, se nur mi povus verki la plej belan poemon de la mondo!
Tiun, kiu protektus la animon de l' homoj.
Ĝi redonus al niaj infanoj estontecon kaj esperon,
Kaj por ĉiam alportus la tempon de feliĉo.



Veniam János Varga



Trad.: *Erika Godó*



Patrino diru

Patrino diru,
jen ĉirkaŭ Kristnasko,
kio estas trans tie,
ĉu brilaj globoj ornamas
la branĉojn de piceoj.
Ĉu la anĝeloj ekbruligas
stelajn sparkilojn supre,
kiam en la silento de l' nokto
forvelkas la surteraj ĝemoj.

Patrino diru,
ĉu neĝas krispe, scintile,
sub viaj paŝoj,
kaj ĉu vi frostas, kiam la prujna gelo
al viaj vangoj algluiĝas.
Kiam la vento disŝiras la molan, silkan
vual-korpon vian,
ĉu ankaŭ vi tremetas en timo.

Patrino diru,
ĉu en viaj koroj ankoraŭ vivas
belaj pensoj
pri tiuj, kiujn sur la tero
vi lasis orfaj,
kaj kiuj, de tiam, atendas,
tiom fervore atendas,
ke eble iam, en bela tago,
vi denove frapos
ĉe la pordo de l' vivo.



Magdolna Kun



Trad.: Erika Godó



Eksterordinara okazaĵo

Roland Platteau



Vi povos legi ĉi sube la raportadon de eksterordinara evento okazinta en decembro 1915 : fraterniĝo inter malamikaj soldatoj (francaj kaj germanaj) de la Unua Mondmilito de 1914-1918.

En sia raporto la ĉeestinto Louis Barthas (naskiĝinta la 14-an de julio 1879 en Homps, departemento Aude, barelfabrikisto) pri la interfratiĝo de Neuville-Saint-Vaast en decembro 1915, esperas, ke iam oni konstruos monumenton en tiu loko por memofesti tiun okazaĵon. Post esti leginta ĝin en taggazeto en la jaroj 1990-aj, mi mem skribis al la urbestro de la vilaĝo sugestante, ke li faru tion, li eĉ ne respondis al mi. Kelkajn jarojn poste, la kinoreĝisoro Christian Carion (naskiĝinta unu 4-an de januaro en Cambrai), fama kaj certe kun reto de gravaj konatuloj, estis male aŭskultata (tamen li devis batali plurajn jarojn por tio) kaj finfine atingis, ke tia monumento estu starigita. Oni anoncis ties inaŭguron en decembro 2015. Mi pensis iri vidi tion (la vilaĝo kuŝas 10 kilometrojn for de ĉe mi), kaj ne dubis, naive, ke tia ceremonio estos publika, sed mi eksciis, ke ĝi estos privata kaj rezervita por certaj gastoj. Epoko... Etoso...

Kelkajn jarojn poste mi povis iri vidi ĝin. Nu, ĝi estas "monumento" en la modo nuntempa : malbela, kaj tute ABSTRAKTA. Sed aparato estas disponigita por la turistoj, kiu ebligas ilin aŭdi virinon legi la faman tekston de Louis Barthas. Sed ... Jen la tikla afero!

Bone atentu! Tiu teksto estas la plej unua, kiun mi tradukis en Esperanton (en printempo 2000, estis Annie Vanwalleghem, kolegino de la Akademia Inspektejo, kiu tajpis ĝin por mi, ĉar mi ne jam havis komputilon tiutempe. Ni komencis interamikiĝi. En julio 2001 tiu Annie, kies broŝurojn, kiujn ŝi lasis en la kafejo de mia laborejo, konvinkis min lerni E-on. Estinte trovinta gazetartikolon pri Esperanto (ŝi laboris en la dokumenta servo de la Inspektejo) fotokopiis ĝin por mi kaj donis ĝin al mi aldoninte de ŝia mano: "Bone feriu! Ĝis baldaŭ!" Mi feris kun mia karulino Jacqueline en Skotlandon, kie ni havis aŭto-akcidenton, post tre peniga kaj angoriga repatrujigoperacio per asekuro "Europe-Assistance", ni finfine troviĝis antaŭ mia domo, mi tiam unue malfermis mian leterkeston kaj tie mi trovis... funebran anoncon, kiu anoncis al mi, ke Annie ĵus mortis en Saint-Flour, kie ŝi iris por ripozi (ŝi estis trafinta poliomyeliton, kaj restis handikapita).

Do ĉi tiun tekston mi konas preskaŭ parkere, kaj kion mi aŭdas?! Mankis du frazoj,

ili estis **fortranĉitaj, cenzuritaj!!** 1° la frazo, kie li diris, ke germana soldato rompis sian fusilon, kio ekigis manplaŭdon de la soldatoj ambaŭflanke, kaj, eĉ pli malbone. 2° tiu, kie li diris, ke ambaŭflanke oni tiam ekkantis *La Internacion!*

*Leviĝu, proletar' de l' tero,
Leviĝu sklavoĵ de malsat'
La Vero tondras en kratero,
eksplosos por finfara bat'.
La paseon plene ni forviŝos,
amasoj, marŝu, kresku ni!
La mond' en fundament' ŝanĝiĝos,
ne nul', sed ĉio estu ni!*

|: *Por batal', por la lasta
unuiĝu nia front',
internacia estos
la tuta homa mond' !:*

|: *Por batal', por la lasta
unuiĝu nia front',
internacia estos
la tuta homa mond' !:*

*Ni, laboristoj, ni, kampuloj,
partio granda de l' labor'!
Al ni la ter' laŭ justreguloj,
nenifarul' sin portu for!
Ja grasigos multajn nia karno,
sed malaperos ĉe l' aŭror'
la korva kaj vultura svarmo,
eterne brilos suna glori!*

*Ne estas super ni defendo,
nek reĝ', nek Dio, nek patron'.
Kreantoj, ni nin savu mem do,
dekretu por komuna bon'!
La rabajon preni de l' rabisto,
spiriton savi de l' karcer',
ni blovu fajron kun persisto,
kaj batu ni, dum ardas fer'!*

|: *Por batal', por la lasta
unuiĝu nia front',
internacia estos
la tuta homa mond' !:*

Do, tio estis politika cenzuro!
Ĉi tio devas esti malkaŝita!

EKSTERORDINARA OKAZAĴO EN NEUVILLE SAINT-VAAST

La jena pripensiga okazaĵo disvolviĝis niaregione decembre 1915, en Neuville-Saint-Vaast, ĉe loko nomita « Abri Mercier », sur fronto de la tiama terura milito. La rakonto estas eltirita el la taglibro de militisto el Suda Francujo. kiun li skribis sur kajeron dum la milito, kaj kiun liaj idoj malkovris en la jaroj 1980-aj.

Pluvegis de pluraj tagoj, kaj la militistoj estis lacaj batali kontraŭ inundo en la tranĉeoj.

-« La 10-an de decembro, en multaj lokoj de la unua linio, la francaj militistoj devis eliri el la tranĉeoj por ne droni ; la germanoj nepre devis fari same, kaj oni vidis tiam tiun strangan vidaĵon : du malamikaj armeoj unu antaŭ la alia kaj sen pafi iun ajn pafon. Samaj komunaj suferoj proksimigas la korojn, solvas la malamojn, naskas simpatian inter indiferentaj homoj, eĉ inter kontraŭuloj. Tiuj, kiuj neas tion, nenion scias pri la homa psiĥologio. Francoj kaj germanoj interrigardis unu la aliajn ; ili vidis, ke ili estas viroj ĉiuj egalaj. Ili alridetis unuj la aliajn ; paroloj interŝanĝiĝis, manoj etendiĝis kaj interpremiĝis ; inter si, oni partigis la tabakon, kruĉetojn da kafo aŭ da vino. Ha! Se ni parolus la saman lingvon!



Iun tagon, altstatura germana militisto supreniris monteton kaj faris paroladon kies vortosencon komprenis nur la germanoj, sed kies signifon ĉiuj komprenis, ĉar li kolere rompis sian pafilon kontraŭ arbotrunkon. Manplaŭdoj ekbruis el unu kaj alia flankoj, kaj “La Internacio” aŭdiĝis. Ha! Vi devus tie stari, vi, frenezaj reĝoj, sangavidaj generaloj, senkompate militemaj ministroj, ĵurnalistoj mortkriegantaj, patriotistoj ekster la danĝero, por ke vi meditrigardu tiun noblegan vidaĵon!

Dume, niaj ĉefoj estis koleregaj. Ho dioj, kio okazos se la militistoj rifuzos mortigi unu la aliajn! Ĉu la milito tiel frue finiĝos? oni do ordonis al niaj kanonistoj pafi kontraŭ ĉiuj indikitaj homamassiĝoj, kaj mortigi tute egale francojn kaj germanojn, ĝuste kiel en la antikvaj cirkoj oni buĉis la sovaĝajn bestojn, kiu estis sufiĉe inteligentaj por rifuzi interbuĉiĝi kaj formanĝi unuj la aliajn; Cetere, tuj kiam oni povis pli-malpli rekrei la unulinian tranĉeon, oni malpermesis, sub minaco de tuja ekzekuto, forlasi tiun tranĉeon, kaj oni ordonis ĉesigi iun ajn familiarecon kun la germanoj.

Estis la fino, dua universala diluvio estintus necesa por haltigi la militon, pacigi la furiozon kaj sangeman frenezon de la regantoj.

Kiu scias? Eble iam, sur tiu terangulo en Artozo, oni starigos monumenton por memorfesti ĉi tiun impeton de frateco inter viroj kiuj malamegis la militon, kaj kiujn oni devigis intermortigi sin malgraŭ sia volo». ♦

(esperantigis Roland PLATTEAU - printempo 2000. En la teksto, *La Internacio* estis esperantigita de Kálmán Kalocsay.)

Brigitte Bardot



Roland Platteau

"La popoloj ĝuas nur la gradon da libereco, kiun ilia aŭdaco ebligas ilin konkeri super la timo"

(Stendhal)

La 28an de decembro de la pasinta jaro mortis la kinostelulino Brigitte Bardot. Sed ŝi estis ne nur stelulino kaj epokfara seksymbolulino, sed defendanto de la bestoj, kiu sin sentis fratino de ili, kaj ankaŭ rare kuraĝa kaj liberparola virino.

Jen la artikolo kiun mi dediĉas al ŝi, verkita pasintan jaron.

Estis tempo kiam ŝi estis la plej fama kinostelulino en la mondo. Samtempe ŝi incitadis multajn pro ŝia troa sukceso, kaj ties seksallogeco, kiu nur komencis esti konsentita en ŝia epoko. En 1973 je la mirego de ĉiuj ŝi metis finon al sia kina kariero, por dediĉi sin al la defendo de la mistraktitaj bestoj.

En tiu nova rolo ŝi estis ofte mokata, eĉ insultata. Sed ŝi ĉiam tenis kuraĝe kaj kun verva libera parolo. Jam en 1962 ŝi montriĝis escepte kuraĝa : tiam ĉiuj famaj kaj riĉaj personoj de la « show-business » en Francujo ricevis minacantajn leterojn senditaj de la OAS (terorista movado de tiuj, kiuj volis ke Alĝerio restu franca) : vi donu al ni tiom da mono, se ne ni eksplodigos vian apartamenton per bombo , kaj ĈEFE diru al neniuj, ke vi ricevis ĉi leteron. B. B. estis la ununura kiu publikigis la leteron kaj rifuzis pagi!

Nun vivanta maljuna, malbela kaj lama en sia domo « *La Madrague* » sur la mediteranea marbordo ŝi plu estas kuraĝa, ĉar si estis preskaŭ la ununura ano de la «show business» je publike manifesti subtenon al la « Flavveŝtuloj » manifestantaj en Francujo!

En 2017 ŝi publikigis libron « Miaj larmoj de batalo », mi esperantigis kelkajn paĝojn el ĝi, elektitaj hazarde, ĉar ĝi estas tre interesa kaj ĉefe tre kortuŝa libro, kaj fervoriga, tiom plena de kortuŝaj konfesoj kaj valoroj. Sekve al ties legado mi sendis al ŝi unu ekzempleron de mia esperantigo de la plej minca (pro pigreco mi elektis tiun, kiu havis malplej de paĝoj por

Une lettre de forces et d'espoir.
Si le message passe, alors mes larmes n'auraient pas été versées pour rien.
Je vous remercie pour le livre d'Elion-J. Finbert mais je ne comprends rien d'« l'Espéranto » !!
La couverture de cet ouvrage serrera à chien sur son cœur, me rappelle qqch chose!
Avec toute mon amitié
Dr. Finbert

traduki!) libro de viro, kiun ŝi devus certe kompreni kaj admiri: Elian-J Finbert, « La plej belaj rakontoj pri hundoj », kiun eldonis Vilhelmo Lutermano kun sia eldonejo « Libro de MAS », kun mallonga letero. Ŝi afable respondis al mi sur karteto:

do jen kelkaj fragmentoj el ŝia libro :

La signifo de mia vivo

Mi ne estas parto de la homa specio. Mi ne volas esti parto de ĝi. Mi sentas min malsama, preskaŭ nenormala. Tiom longe kiom la besto estos konsiderata kiel pli malsupera specio, kaj ke oni suferigos al ĝi ĉiuspecajn malbonojn kaj torturojn, ke ni mortigos ĝin pro niaj bezonoj, nia libertempo kaj niaj plezuroj, mi ne estos parto de ĉi tiu aroganta kaj sangavida raso. Kaj cetere mi ĉiam sentis min tre malproksima el ĝi. Mi dividas tre malmultajn aferojn kun plej el la homoj, kaj, male, multon kun kelkaj unuopuloj. En maloftaj momentoj de mia vivo, mi trovis min sur la sama ondolongo kun homoj, en kiuj mi rekonis la saman ribelon, naŭzon similan al la mia. Sed ĝenerale mi ne trovas agorde en ĉi tiu mondo de sukceso, supraĵeco, konkurenco, manko de profundo kaj sentoj, kiujn mi povas observi ! Mi estas, kaj tion mi volonte konfesas, longtempe vivinta en ĉi tiu malprofundeco. Sed ĝi tre malfeliĉigis min. Mi neniam adaptiĝis al ĝi, ĉiam estis por mi penado. Mi spertis unikan ekzistadon, de famulo, foje monduman. Sed profunde mi ne estis tiel. Mi neniam sentis min tiel harmonia je mi mem kiel hodiaŭ, preskaŭ sola en *La Madrague*. Mi ĉiam strebis al tia vivmaniero, sobra kaj proksima al la naturo. Mia unua parto de vivo estis kiel la skizo de mia ekzisto, estis tiam en ĝermo, ĉion, kio konsistigas mian vivon hodiaŭ. De mia adoleska periodo tra mia laboro pri kinejaj artoj mi ĉiam estis allogita al bestoj, sentema al ilia estanteco, ilia estonteco. Laŭ tio, kion mi povas memori, mi havis ĉi tiun furiozan senton, ke la homo devas protekti ilin kaj ne manipuli ilin, kiel ili ŝajnis fari. Hodiaŭ mi povas diri, ke mia elekto estis la ĝusta. Lasante kinejon en 1973, dediĉante miajn tagojn kaj noktojn al kreado de strukturo, kiu helpus bestojn.

..... ..

La plej bela virino en la mondo

Mi neniam sentis min bela. Ĉi tiun faman belecon malantaŭ mia sukceso, mi komencas konsciigi nur nun. Mi kreskis, vivis kaj maturiĝis en abomena dubo pri mi. Kiam ajn mi devis eliri, ĉio estis fonto de hezito: fari vestadon, stiligi miajn harojn, sinteni min, paroli


..... ..

Miaj intimaj luktoj Mi respektas la vivon senkondiĉe. Besta vivo, vegeta vivo, minerala vivo. Estas nenio pli bela ol la vivo, ĝi estas la sola afero, kiun la homo ne povas krei. Mi ne parolas pri infanoj, kiuj venas al la mondo, mi parolas pri vivo ĝenerale. Tiu, sendepende de ni, kiun ni heredis, el kiuj ni estas garantiuloj kaj luantoj. Kiam mi pensas pri la mistero de la vivo, mi povas droni en demandoj. Kiam io mortis, la vivo ne povas esti reinstigita de homo. Ĝi estas finita. Homo povas mortigi, sed li ne povas restarigi vivon. Estas io sankta, mistera por mi en la vivo. Ofte, mi vidis ĉi tiun strangan aferon : korpo vivas, ĝi movas. Kaj jen abrupte ĉi tiu malgranda umo, kio estis interne, ne plu estas. Kaj kio estas ĉi tiu umo?

2019 - Brigitte Bardot vizitas neatendite kunvenon de flavveŝtuloj:



Ŝia domo « La Madrague »:



En La Madrague kiam ŝi estis ankoraŭ bela:



La barita pordo

Verkis: *Julio Cortázar*, originala titolo
La puerta condenada.



elhispanigis *Detlef Karthaus*

Al Petrono plaĉis la hotelo Cervantes por kialoj, kiujn aliaj trovas malplaĉaj. Estis hotelo malhela, trankvila, preskaŭ dezerta. Iu ĵuskonato rekomendis ĝin al li, dum li transis la riveron en la pramŝipo, dirante ke ĝi estas en la centra zono de Montevideo. Petrono akceptis ĉambron kun banĉambro en la dua etaĝo, tuj apud la enirej-halo. Per la ŝlosiltabulo en la pordistejo li eksciis ke ne estas multaj homoj en la hotelo; la ŝlosiloj estis kunigitaj al pezaj diskoj de bronzo kun la ĉambra numero, kio estis malmalica maniero de la direktantaro malebligi al la klientoj meti ĝin en la poŝon.

La lifto troviĝis vid-al-vide de la akceptejo, kie estis vendotablo kun la lastaj tagĵurnaloj, kaj la telefona konektotabulo. Li bezonis marŝi nur kelkajn metrojn por atingi sian ĉambron. La akvo fluis bolante, kaj tio kompensis la mankon de suno kaj de aero. En la ĉambro estis fenestreto per kiu oni ekvidis la platan tegmenton de la apuda kinejo; iufoje kolombo preterflugis tie. La banĉambro havis pli grandan fenestron, kiu malfeliĉe malfermis al muro kaj al fora peceto da ĉielo, preskaŭ senutila. La mebloj estis bonaj; superfluis tirkestoj kaj bretoj. Kaj estis multaj vestarkoj, kutime sufiĉe raraj.

Evidentiĝis poste ke la direktisto estis viro alta, maldika kaj tute kalva. Li uzis okulvitrojn kun ora framo kaj parolis kun voĉo forta kaj laŭta kiel tiuj de la urugvajanoj. Li diris al Petrono ke la dua etaĝo estis tre trankvila, kaj en la ununura apuda ĉambro loĝis sinjorino sola, kiu laboris ie, kaj revenis al la hotelo en la malfrua vespero. Petrono renkontis ŝin la sekvantan tagon en la lifto. Li rekonis ŝin per la ŝlosilnumero kiun ŝi tenis en la mano kvazaŭ grandega ora moner-ofero. La pordisto prenis la ŝlosilon kaj tiun de Petrono kaj pendigis ilin sur la tabulo, kaj daŭrigis paroli kun la virino pri kelkaj leteroj. Petrono havis tempon vidi ke ŝi ankoraŭ estis juna, nerimarkebla, kaj malbone vestita, kiel ĉiuj virinoj de la orienta parto de tiu lando.

La kontrakto kun la fabrikantoj de mozaikoj bezonus eble unu semajnon. En la posttagmezo Petrono aranĝis la vestaĵojn en la ŝranko, ordigis siajn paperojn sur la tablo, kaj post bani sin eliris promeni en la centro atendente la horon por iri al la oficejo de la kompanianoj. La tago pasis en konversacioj, interrompita nur per aperitivo ĉe Pokitos, kaj vespermanĝo en la domo de la ĉefa kompaniano. Kiam ili lasis lin en la hotelo estis post la unua. Lacigita, li enlitiĝis kaj tuj ekdormis.

Kiam li vekigis estis preskaŭ la naŭa, kaj en tiuj unuaj minutoj kiam daŭrigas la efekto de la nokto kaj de sonĝo, li pensis ke en iu momento, ĝenis lin la plorado de iu infano. Antaŭ eliri li parolis kun dungito kiu prizorgis la akceptejon kaj kiu parolis kun germana akĉento. Dum li informigis pri rutoj de aŭtobusoj kaj nomoj de stratoj, li rigardis distrite la grandegan halon ĉe kies fino estis la pordo de lia ĉambro kaj tiu de la sinjorino sola. Inter la du pordoj estis piedestalo kun aĉa repliko de la Melosa Venuso¹. Alia pordo ĉe la flanko muro kondukis al elirejo kun la devigaj brakseĝoj kaj revuoj. Kiam la dungito kaj Petrono silentigis la silento de la hotelo ŝajnis koaguliĝi, fali kiel cindroj super la mebloj kaj kaheloj. Kompare, la lifto estis bruega, kiel ankaŭ la folioj de gazeto kaj la skrapado de alumeto.

La kunvenoj finiĝis je noktiĝo kaj Petrono promenis laŭ la strato 18-a de Julio, antaŭ ol eniri en unu de tiuj tavernoj de la Placo de Sendependeco. Ĉio iris glate, kaj eble li povus reiri al Bonaero pli frue ol li unue pensis. Li aĉetis argentinan gazeton, paketon da cigaretoj² kaj lante promenis ĝis la hotelo. En la apuda kinejo prezentigis du filmoj, kiujn li jam vidis, kaj fakte li ne emis iri ien ajn. La direktisto salutis preterpasante kaj demandis ĉu li bezonas pli da littukoj. Ili babilis dum momento, fumante cigareton, kaj ĝisis.

Antaŭ ol enlitiĝi Petrono ordigis la paperojn, kiujn li estis uzinta dum la tago, kaj legis la ĵurnalon sen aparta intereso. La silento de la hotelo estis preskaŭ troigita kaj la bruo de unu aŭ alia tramo laŭ la strato Soriano nur ĉesis dum momenteto sufiĉe longe por prepari sin kontraŭ la bruo de la venonta. Senzorge, sed iom nepacience, li ĵetis la gazeton en la korbon, kaj malvestis sin dum li distre rigardis en la spegulon de la ŝranko. Estis ŝranko jam malnova, kaj oni estis metinta ĝin kontraŭ pordo kiu kondukis al la apuda ĉambro. Estis surprizo por Petrono malkovri la pordon kiun li ne estis notinta dum la unua ĉirkaŭrigardo de la ĉambro. Unue li supozis ke la konstruaĵo estis planita kiel hotelo, sed nun li konsciis ke ĉi tie okazis io kiel en multaj hoteloj senluksaj, establitaĵoj en

antikvaj kontoroj aŭ familiaj domoj. Bone pripensante la aferon, en preskaŭ ĉiuj hoteloj kiujn li ekkonis en sia vivo – kaj estis multaj – la ĉambroj havis iun pordon baritan, foje videblan, sed ĉiam kun vestoŝranko, aŭ tablo, aŭ vestohokoj antaŭ ĝi, tiel ke ĝi ricevis etoson de ambigueco, de honta deziro kaŝi sian ekziston kiel virino kiu kredas kaŝi sin kiam ŝi ŝirmas kun la manoj sian ventron aŭ brustojn. Ĉiuokaze la pordo estis tie, elstaris de la nivelo de la ŝranko. Iam homoj estis en- kaj el-irinta per ĝi, klakante aŭ duonfermante ĝin, donante al ĝi vivon, kiun oni povis ankoraŭ detekti en ĝia ligno tiom malsame al tiu de la muroj. Petrono imagis ke ĉe la alia flanko estus ankaŭ ŝranko, kaj la sinjorino de tiu ĉambro samopinius pri la pordo. Li ne estis laca sed endormiĝis volonte. Pasis eble tri aŭ kvar horoj, kiam li estis vekigita de sento de malkomforto, kvazaŭ io okazis, io ĝena kaj koleriga. Li ŝaltis la lumon, vidis ke estas la dua kaj duono, kaj malŝaltis. Tiam li aŭdis en la apuda ĉambro ploradon de infano.

En la unua momento li ne tuj konsciis pri tio. Lia unua emocio estis kontentigo; poste li certis ke en la antaŭa nokto knabeto turbis lian ripozon. Ĉio klarigita, estis pli facile re-endormiĝi. Sed poste li pensis pri la aliulo kaj eksidis en la lito aŭskultante, sen ŝalti la lumon. Li ne trompis sin, la plorado venis de la apuda ĉambro. La sono estis aŭdebla trans la pordo barita, kaj estis lokita en tiu parto de la ĉambro en kiu troviĝas la piedo de la lito. Sed ne povis esti ke en la apuda ĉambro estas infano; la direktisto klare diris al li ke la sinjorino loĝas sole, ke ŝi restas preskaŭ la tutan tagon ĉe sia laboro. Dum unu sekundo Petrono ekpensis ke eble ĉi nokte ŝi zorgas pri infano de iu parenco aŭ amikino. Li pensis pri la antaŭa nokto. Nun li estis certa ke li ja aŭdis la ploradon ĉar estis plorado ne facile konfuzebla, estis pli precize serio de neregulaj ĝemetoj, de plendaj singultoj sekvitaj de mallonga snufploro, ĉio ĉi malforta, minimuma, kvazaŭ la infano estus tre malsana. Devis esti suĉinfano, aĝa de nur kelkaj monatoj, kvankam ĝi ne ploris kun la akresono kaj la subitaj klukadoj kaj sufokiĝoj de ĵusnaskito. Petrono imagis la infanon, knabon –li ne sciis kial– malfortan kaj malsanan, kun marasmigita vizaĝo kaj senvivaj movoj. Ĝi plendis dum la nokto, per pudora plorado, sen tro altiri al si la atenton. Se ne ekzistus la pordo barita, la plorado ne estus aŭdebla tra la forta muro, kaj neniu sciis ke en la apuda ĉambro estas ploranta infano.

En la mateno Petrono pripensis iomete la aferon dum li matenmanĝis kaj fumis cigareton. Malbone dormi estis neoportune pro lia taglaboro. Dufoje li vekigis en la mezo de la nokto, kaj en ambaŭ kazoj pro la

plorado. Je la dua fojo estis pli malagrabla, ĉar krom la plorado, oni aŭdis la voĉon de virino kiu provis trankviligi la infanon. La voĉo estis tre mallaŭta, sed havis plen-zorgan tonon, kio havis teatran efekton, susuro kiu transiris la pordon tiom forte kvazaŭ krio. La infano cedis dum momentoj pro la lulado kaj la petado; sed poste rekomencis kun leĝera plendeto interrompita, kun nekonsolebla animstato. Kaj refoje la virino murmuris nekompreneblajn vortojn, la sorĉvortojn de patrino kiu trankviligas sian bebon turmentitan korpe aŭ anime, ĉar ĝi vivas aŭ estas minacata de morto.

“Nu, bonete, sed la direktisto mensogis al mi” pensis Petrono elirante sian ĉambron. Ĝenis lin tiu mensogo kaj li ne kaŝis la ĝenon. La direktisto fiksrigardis lin.

“Infano? Vi trompis vin. Ne estas etaj infanoj en tiu etaĝo. Apud via ĉambro loĝas sinjorino sola, mi kredas ke mi jam diris al vi.”

Petrono hezitis antaŭ ol paroli. Aŭ tiu mensogis stupide aŭ la akustiko de la hotelo trompis lin. La direktisto rigardis lin iomete oblikve, kvazaŭ li mem koleriĝus pro la plendo. “Eble li kredas min timema kaj ke mi intencas trovi pretekston por ŝanĝi ĉambron”, li pensis. Estis malfacila situacio, kaj iom absurda insisti kontraŭ tia klara malkonfirmo. Li ŝultrolevis kaj petis la gazeton. “Verŝajne mi sonĝis” li diris, perturbita ke li diris tion, aŭ ke li sentis sin devigita diri io ajn.

La kabaredo estis mortige teda kaj la gastigantoj ne ŝajnis tro entuziasmaj, tiel ke estis facile por Petrono preteksti laciĝon kaj lasis konduki sin al la hotelo. Oni devis nur subskribi la kontrakton la venontan posttagmezon; la negoco estis pli malpli finita.

La silento en la akceptejo de la hotelo estis tiom granda ke Petrono senvole ŝteliris piedpinte. Oni lasis por li vespergazeton apud la lito; estis ankaŭ letero de Bonaero. Li rekonis la skribmanieron de lia edzino.

Antaŭ enlitiĝi li estis rigardanta la ŝrankon kaj la elstaran parton de la pordo. Eble se li metus siajn du valizojn super la ŝranko, por bloki la pordon, la sonoj de la apuda ĉambro mallaŭtiĝus. Kiel ĉiam je tiu horo, nenio estis aŭdebla. La hotelo dormis, homoj kaj aferoj dormis. Sed Petrono, jam en malbona humoro, konsciis ke la fakto estis la kontraŭo, ke ĉiuj estis vekaj, impete vekaj en la centro de la silento. Lia neagnoskita maltrankvileco devis transiĝi al la domo, al la homoj en la domo, doni al ili la econ de insido, de malkuraĝa vigilo. Amaso da stultaĵoj.

Li preskaŭ ne prenis ĝin serioze kiam la plorado de la infano revenigis lin al la estanteco, je la tria matene. Sidiĝante en la lito li demandis sin ĉu pli bonus voki la noktogardiston por havi atestanton de la neebleco dormi en tiu ĉambro. La infano ploris tiom malforte ke dum momento oni ne povis aŭdi ĝin, kvankam Petrono sentis ke la plorado estis tie, daŭris, kaj baldaŭ estus aŭdebla refoje. Pasis dek aŭ dudek longaj sekundoj; tiam singulto korta, plendo apenaŭ aŭdebla kiu daŭris malbrue ĝis eki en vera plorado. Li ekbruligis cigareton kaj demandis sin ĉu li devus diskrete frapi la muron por ke la sinjorino trankviligu la infanon. Lastatempe kiam li pensis pri tiuj du, la sinjorino kaj la infano, li ekkonsciis ke li ne kredis je ili, li absurde ne kredis ke la direktisto mensogis al li. Nun oni povis aŭdi la voĉon de la virino, kio komplete kovris la ploron de la infano kun ŝia fascina sed diskreta konsolo. La virino lulis al la infano, konsolis ĝin, kaj Petrono povis imagi ŝin sidanta ĉe la piedo de la lito, movante la infanliron aŭ tenante la infanon en ŝiaj brakoj. Sed malgraŭ tiom kiom li volis, li ne sukcesis bildigi al si la infanon, kvazaŭ la eldiro de la hotelisto estus pli certa ke la realeco kiun li estis aŭskultanta. Iom post iom, dum pasis la tempo, kaj la malfortaj plendoj alternis aŭ kreskis inter murmuroj de konsolado, Petrono komencis suspekti ke tio estis ŝerco, ridinda kaj terura ludo, kiun li ne povis klarigi. Li pensis pri malnovaj rakontoj pri virinoj sen gefiloj, kiuj sekrete organizas kul-ton de pupoj, fantaziita kaj kaŝita patrineco, mil foje pli malbone ol la dorlotaĵo de hundoj, katoj, aŭ nevoj. La virino imitis la ploradon de ŝia infano frustrita, konsolante en la aeron kun malplenaj manoj, eble kun la vizaĝo malseka de larmoj, ĉar la ploro kiun ŝi ŝajnigis estis samtempe ŝia vera ploro, ŝia groteska doloro en la soleco de hotelĉambro, protektita per la indiferenteco kaj per la frumateno.

Ŝaltante la noktolampon, nekapabla re-endormiĝi, Petrono demandis sin, kion li faros. Lia malbonhumoro estis malica. Li kontaĝus sin en tiu etoso kie subite ĉio rivelas sin artifiko, fantazio, falseco: la silento, la plorado, la lulo, la ununura realaĵo de tiu horo inter nokto kaj tago mistifikis lin kun ĝia neeltenebla mensogo. Frapi la vandon ŝajnis al li nesufiĉe. Li ankoraŭ ne estis tute vekiĝinta kvankam estus neeble al li refoje endormiĝi; sen scii kiel, li trovis sin movi iom post iom al la ŝranko ĝis la polvoplana pordo malpura sin rivelis. En piĝamo kaj sensŭe, li fiksis sin al ĝi kiel miriapodoj, kaj alproksimigante la buŝon al la pin-tabuloj li komencis imiti kapvoĉe kaj nepercepteble, plendon kiel tiu kiu venis de la alia flanko. Li altigis la tonon, ĝemis, kaj plorĝemis.



Ĉe la alia flanko fariĝis silento, kiu estus daŭrinta la tutan nokton, sed en la antaŭa momento, Petrono povis aŭdi ke la virino kuris tra la loĝejo, kun batoj de pantofloj, kaj tuja ekkrio seka, kaj komenco de ekkriego estis tuj tranĉita kiel streĉita kordo.

Kiam li preterpasis la akceptejon estis post la deka. Inter sonĝoj post la oka, li aŭdis la voĉon de la dungito kaj de iu virino. Iu estis irinta en la apuda ĉambron kaj movis aferojn. Li vidis kofron kaj du grandajn valizojn proksime al la lifto. La mieno de la direktisto ŝajnis al Petrono konfuzita.

“Ĉu vi bone dormis?” li demandis, kun tiu profesia tono, kiu apenaŭ kaŝis sian indiferecon.

Petrono levis la ŝultrojn. Li ne volis insisti, nun kiam restis al li nur unu nokto en la hotelo.

“Ĉiukaze, ekde nun estos pli kvieta,” diris la direktisto, rigardante la valizojn. “La sinjorino forlasos nin ĉe tagmezo.”

Li atendis komenton, kaj Petrono komplezis lin kun la okuloj. “Ŝi restis dum longa tempo ĉi tie, kaj nun subite ŝi hastas for. Oni neniam scias kun virinoj.”

“Ne,” diris Petrono. “Oni neniam scias.”

En la strato li sentis kapturiniĝon sed tian kiu ne estas fizika. Englutante amaran kafon, li komencis pripensi la aferon, forgesante la negocon, indiferente al la splenda suno, estis lia kulpo ke la virino foriris de la hotelo, frenezigitate de timo, de honto aŭ de kolero. Ŝi estis tie dum longa tempo...Ŝi estis flegistino, laŭdire, sed sendanĝera. Ne ŝi, sed li estus devinta forlasi la hotelon Cervantes. Estis lia devo paroli kun ŝi, pardonpeti, kaj peti ŝin ke ŝi restu kun promeso de diskreteco. Li faris kelkajn revenajn paŝojn kaj duonvoje haltis. Li timis ridindigi sin, timis ke la virino reagu strange aŭ en maniero neantaŭvidebla. Jam estis la horo por renkonti la kompanianojn kaj li ne volis atendi ilin. Nu, ke ŝi restu ĝenata. Ŝi estis frenezulino kaj trovus alian hotelon kie ŝi povus zorgi pri sia imaginara infano.

Sed en la nokto li refoje sentis sin malbone, kaj la kvieto de la ĉambro ŝajnis al li jam pli densa.

Enirinte la hotelon li ne povis malhelpi rigardi la ŝlosiltabulon, kie mankis tiu de la apuda ĉambro. Li interŝanĝis kelkajn vortojn kun la dungito, kiu oscedis atendante la horon por hejmeniri, kaj li eniris sian ĉambron kun malmulte da espero povi dormi. Li havis la vesperajn gazetojn kaj unu krimromanon. Li okupiĝis per aranĝo de siaj valizoj, ordigo de siaj paperoj. Estis varme, kaj li malfermis la fenestreton. La lito estis bone farita, sed li trovis ĝin malkomforta kaj malmola. Finfine li havis tiom da silento kiom li bezonis por profunde dormi, kaj ĉagrenis lin. Li turnis sin, kaj turnis sin, kaj sentis sin venkita per tiu silento kiun li estis inside postulinta, kaj kiun oni koncedis al li komplete kaj venĝe. Ironie li pensis ke mankas al li la plorado de la infano, ke tiu perfekta trankvilo ne sufiĉis por endormiĝi kaj malpli por resti veka. Li sentis la mankon de la ploranta infano, kaj kiam multe pli malfrue li aŭdis ĝin, softe sed nekonfuzeble tra la pordo barita, super ĉiu timo, super ĉiu penso pri fuĝo en meza nokto, li eksciis ke la virino ne estis dirinta mensogon, ke ŝi ne mensogis kiam ŝi lulis la infanon por silentigi ĝin tiel ke ili povus endormiĝi. ♦

1 La **Melosa Venuso** estas fama greka statuo. Ĝi prezentas Afroditon, la helenan diinon de beleco kaj amo. Ŝia romia nomo estas Venuso. -Vikipedio

2 La hispana 'cigarillo' signifas eta cigaro. Kvankam ĝi aspektas kiel cigaredo, ĝi estas rulita en tabakfolio kaj ne en cigareda papero.



aŭtorino, *Muriel Spark*
(Skotlando)

LA BURĜONAĜO DE FRAŬLINO JOHANA BRODI DE MURIEL SPARK (1)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 007*



elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

Ĉapitro 2

Mary Macgregor, kvankam ŝi vivis ĝis sia dudek-kvara jaro neniam vere konsciiĝis pri tio ke la konfidencejoj de Johana Brodi ne estis dividitaj kun la cetera instruistaro, kaj ke ŝia amrakonto celis nur la orelojn de ŝiaj lernantoj. Ŝi ne multe pensis pri Johana Brodi, certe neniam malŝatis ŝin, kiam unu jaro post la eksplodo de la dua mondmilito, ŝi aliĝis al la Reĝaj Helpmaristinoj, kaj estis mallerta kaj nekompetenta, kaj estis multe kulpigita. Je unu okazo de vera mizero – kiam ŝia unua kaj lasta koramiko, korporalo, kiun ŝi konis dum nur du semajnoj, forlasis ŝin, per neapero ĉe la renkontiĝloko, kaj kiu ne plu alproksimiĝis al ŝi – ŝi retrorigardis sian vivon por eltrovi ĉu ŝi estis iam vere feliĉa. Ŝi tiam konsciis, ke la unuaj jaroj kun f-ino Brodi, kiam ŝi sidis aŭskultante ĉiujn tiujn rakontojn kaj opiniojn, kiuj neniel rilatis al la ordinara mondo, estis la plej feliĉa tempo de ŝia vivo. Ŝi pensis tion dum kurta momento kaj ŝia menso neniam plu referencis f-inon Brodi, sed ŝi venkis sian mizeron kaj refalis en sian kutiman lantan konfuzitecon, antaŭ ol ŝi mortis, dum forpermeso en Cumberland, en incendio en la hotelo. Tien kaj reen tra la koridoroj kuris Mary Macgregor, tra la densiĝanta fumo. Ŝi kuris laŭ unu direkto, tiam turnis al la alia direkto, kaj je ĉiu flanko la gisforneca fajro renkontis ŝin. Ŝi ne aŭdis kriojn, ĉar la muĝo de la fajro sufokis la kriojn; ŝi ne eligis kriojn, ĉar la fulmo sufokis ŝin. Ŝi kuris kontraŭ iu je ŝia tria turno, stumblis kaj mortis. Sed je la komenco de la mil-naŭcent-tridekaj jaroj, kiam Mary Macgregor havis dek jarojn, jen ŝi sidis senesprime inter la lernantoj de f-ino Brodi. ‘Kiu disverŝis la inkon sur la plankon – ĉu estis vi Mary?’

‘Mi ne scias, f-ino Brodi.’

‘Mi forte supozas, ke estis vi. Mi neniam renkontis tian mallertan knabinon. Kaj se vi ne povas interesiĝi pri kion mi diras, bonvolu almenaŭ trompe pretendi.’

Ĉi tiuj estis la tagoj, kiujn Mary Macgregor, dum rememorado, taksis la plej feliĉajn de sia vivo.

Sandra Stranger havis la senton, ke tiuj tagoj devus esti la plej feliĉaj de ŝia vivo, kaj je ŝia deka naskiĝtago ŝi diris tion al sia plej bona amikino Ĵenja Gray, kiu estis invitita al temaĝo ĉe la domo de Sandra. La specialaĝo de la festo estis ananasaj kuboĵoj

kun kremo, kaj la specialaĵo de la tago estis, ke oni lasis ilin solaj. Al Sandra, la nekutima ananaso havis la aŭtentikan guston kaj aspekton de feliĉo, kaj ŝi precize enfokusigis la etajn okulojn sur la palajn orajn kubojn antaŭ ol ĉerpi ilin per ŝia kulero, kaj ŝi opiniis ke la akra gusto sur la lango estis la gusto de aparta feliĉo, kiu neniel rilatis al manĝado, kaj malsamis de la feliĉo de ludado, kion oni ĝuas senkonscie. Ambaŭ knabinoj lasis la kremon ĝis la fino kaj tiam manĝis ĝin plenkulere.

‘Knabinetoj, vi estos *la crème de la crème*,’ diris Sandra, kaj Ĵenja kraĉetis sian kremon en sian poŝtukon.

‘Vi scias,’ Sandra diris, ‘ke oni supozas, ke ni nun spertas la plej feliĉajn tagojn de nia vivo.’

‘Jes, ili ĉiam diras tion,’ diris Ĵenja. ‘Ili diras, profitu pleje de via lerneja tempo, ĉar oni neniam scias kio okazos poste.’

‘F-ino Brodi diras, ke la burĝontempo plejbonas,’ diris Sandra.

‘Jes, sed ŝi neniam edziniĝis, kiel niaj patrinoj kaj patroj fariĝis geedzoj.’

‘Ili ne ĝuas burĝonjarojn,’ diris Sandra.

‘Ili koitas,’ Ĵenja diris.

La knabinetoj paŭzetis, ĉar tio estis ankoraŭ impona koncepto, kiu nur lastatempe malkaŝiĝis al ili; la frazo mem kaj ĝia signifo estis novaj. Estis tute nekredeble. Tiam Sandra diris, ‘Al s-ro Lloyd naskiĝis bebo lastsemajne. Li estus devinta sekskuniĝi kun sia edzino.’ Ĉi tiu ideo estis pli facile digestebla kaj ili kriĉe ridis en siajn rozkolorajn buŝtukojn. S-ro Lloyd estis la artinstruisto por la pliaĝaj knabinoj.

‘Ĉu vi povas bildigi tion al vi?’ flustris Ĵenja.

Sandra malgrandigis la okulojn eĉ pli por vidi per sia menso. ‘Li supozeble portis piĝamon,’ ŝi flustris responde.

La knabinoj ŝanceliĝis pro gajeco, pensante pri la unubraka s-ro Lloyd, solene marŝante en la lernejon.

Tiam Ĵenja diris, ‘Oni faras tion neantaŭplanite. Tiel tio okazas.’

Ĵenja estis fidinda fonto de informo, ĉar junulino, dungito en la manĝaĵbutikoj de ŝia patro, lastatempe troviĝis graveda, kaj Ĵenja kaptis fragmentojn de la agitiĝo, kiu sekvis. Konfidinte ŝiajn trovaĵojn al Sandra, ili komencis programon de esplorado, kiun ili nomas ‘Esplorado’, kunmetante pecojn de indicoj el konversacioj kontraŭregule subaŭskultataj, kaj frazojn el grandaj vortaroj.

‘Ĉio okazas fulmrapide,’ diris Ĵenja. ‘Tio okazis al Teenie, kiam ŝi faris promenon ĉe Puddocky¹⁹ kun sia koramiko. Ili devis geedziĝi.’

‘Oni pensus, ke la seksurĝo estus definitive febliĝinta dum la tempo bezonata por *demeti la vestaĵojn*,’ diris Sandra. Per ‘vestaĵoj’ ŝi certe celis kalsonon, sed ‘kalsono’ estis kruda en ĉi tiu scienca kunteksto.

‘Jes, tion mi ne povas kompreni,’ diris Ĵenja.

La patrino de Sandra rigardis ĉirkaŭ la pordo kaj diris, ‘Ĉu vi amuzas vin karaj?’

Super ŝia ŝultro aperis la kapo de la patrino de Ĵenja, ‘Ho ĉielo,’ diris la patrino de Ĵenja, vidante la te-tablon, ‘ili manĝis bonapetite!’

Sandra sentis sin ofendita kaj malnobligita pro tio; kvazaŭ la ĉefa celo de la festo estus la manĝaĵo.

‘Kion vi ŝatus fari nun?’ diris la patrino de Sandra.

Sandra ĵetis kaŝan, akran rigardon al sia patrino, kio signifis: vi promesis lasi nin tute solaj, kaj promeso estas promeso; vi scias, ke tre malbonas rompi promeson al infano; vi povus ruinigi mian tutan vivon per via rompita promeso; estas mia naskiĝtago.

La patrino de Sandra retiriĝis kaj kuntiris la patrinon de Ĵenja. ‘Ni lasu ilin solaj,’ ŝi diris. ‘Simple amuzu vin, karuloj.’

Sandra estis kelkfoje embarasita pro tio ke ŝia patrino, anglino, vokis ŝin ‘karulo’, malkiel la patrinoj de Edinburgo, kiu diras ‘kara’. La patrino de Sandra posedis pompan vintromantelon kun lanuga vulpopelto kiel posedas la Dukino de Jorko, dum la aliaj patrinoj portis tvidon²⁰ aŭ maksimume ondatran²¹ pelton, tiel fortikan, ke ili ne povus eluzi ĝin ĝis la fino de siaj tagoj.

Estis pluvanta kaj la grundo estis tro malseka por finfosi la truon al Aŭstralio, tial la knabinoj portis la tetablon kun ĉiuj festrestaĵo ĝis la angulo de la ĉambro. Sandra malfermis la kovrilon de la pianista benketo kaj eltiris kajeron el inter du muzikfolioj. Sur la unua paĝo de la kajero estis skribita,

LA MONTA AGLONESTA KABANO
de
Sandra Stranger kaj Ĵenja Gray

Ĉi tiu rakonto, ankoraŭ en la procezo esti verkata, temis pri la amanto de f-ino Brodi, Hugo Carruthers. Li ne estis mortigita dum la milito, tio estis eraro en la telegramo. Li revenis el la milito kaj faris enketon pri f-ino Brodi ĉe la lernejo, kie la

unua persono, kiun li renkontis estis f-ino Mackay, la lernejestro. Ŝi informis lin, ke f-ino Brodi ne deziris vidi lin; ŝi amis iun alian. Kun amara, raŭka ridado, Hugo iris kaj setlis en ia monta aglonesto, kie volvita en leda jako, li estis malkovrita unu tagon de Sandra kaj Ĵenja. Je la nuna stadio de la rakonto Sandra restis kaptita de Hugo sed Ĵenja eskapis dumnokte, kaj provis trovi sian vojon malsupreniri en la mallumo. Hugo preparis persekuti ŝin.

Sandra prenis krajonon el tirkesto en la telermeblo kaj daŭrigis:

‘Hugo!’ Sandra petegis lin, ‘Mi ĵuras al vi, antaŭ ĉio, kiun mi taksas sankta, ke f-ino Brodi neniam havis alian amanton, kaj ŝi atendas vin malsupre, preĝante kaj esperante en sia burĝonaĝo. Se vi liberigos Ĵenja, ni kondukos vian amantinon Johanan Brodi al vi kaj vi vidos ŝin per viaj propraj okuloj kaj vi tenos ŝin en viaj brakoj post dek longaj jaroj kaj unu tago.’

Lia nigra okulo brilis en la lampa lumo de la kabano. ‘For knabino!’ li kriis, ‘kaj ne baru mian vojon. Mi bone scias, ke tiu knabino Ĵenja raportos mian kieon al mia mokanta tiama fianĉino. Bone mi scias, ke vi ambaŭ estas spionoj senditaj de ŝi por moki min. Forigu vin de la pordo, mi diras!’

‘Neniam!’ diris Sandra, metante sian junan, suplan korpon rekte antaŭ la ŝlosilo kaj sian brakon tra la riglilo. Ŝiaj larĝaj okuloj brilis per blua lumo de allogo.

Sandra donis la krajonon al Ĵenja. ‘Estas via vico,’ ŝi diris.

Ĵenja skribis: *Per unu movo li ĵetis ŝin al la plej fora fono de la kabano kaj paŝis eksteren en la lunlumon kaj la amasiĝinta neĝo ne estis barilo al liaj grandaj paŝoj.*

‘Skribu pri liaj botoj,’ diris Sandra.

Ĵenja skribis: *Liaj altaj botoj brilis en la lunlumo.*

‘Estas tro da lunlumoj,’ Sandra diris, ‘sed ni povas aranĝi tion poste por la eldonado.’

‘Ho, sed tio estas sekreto, Sandra!’ diris Ĵenja.

‘Mi scias,’ diris Sandra. ‘Ne zorgu, ni ne eldonos ĝin ĝis nia burĝonaĝo.’

‘Ĉu vi pensas, ke f-ino Brodi iam sekskuniĝis kun Hugo?’ demandis Ĵenja.

‘En tiu okazo ŝi estus naskinta bebon, ĉu ne?’

‘Mi ne scias.’

‘Mi ne pensas, ke ili faris ion tian,’ diris Sandra. ‘Ilia amo superis ĉion tian.’

‘F-ino Brodi diris, ke ili alkroĉis sin unu al la alia kun pasia senĝeno dum lia lasta forpermeso.’

‘Tamen ili ne malvestiĝis, mi pensas,’ diris Sandra, ‘ĉu vi?’

‘Ne. Mi ne povas imagi tion,’ diris Ĵenja.

‘Mi ne ŝatus sekskuniĝi,’ Sandra diris.

‘Nek mi. Mi edziniĝos kun pura persono.’

‘Prenu tofean bonbonon.’

Ili manĝis siajn dolĉaĵojn, sidantaj sur la tapiŝo. Sandra metis iom da karbono sur la fajron kaj la lumo saltis supren, respegulante sur la bukloj de Ĵenja. ‘Ni estu sorĉistinoj apud la fajro, kiel ni estis dum la antaŭvespero de Ĉiuj Sanktuloj.’

Ili sidis en la krepuska duonlumo manĝante tofeon kaj sorĉkantante. Ĵenja diris, ‘En la muzeo estas helena dio staranta sen vestaĵoj. Mi vidis ĝin pasintan dimanĉon posttagmeze sed mi estis kun Onklino Kate, kaj ne estis eble al mi rekte rigardi.’

‘Ni iru al la muzeo venontan dimanĉon,’ Sandra diris. ‘Estas esplorado.’

‘Ĉu vi ricevos permeson iri sola kun mi?’

Sandra, kiu fifamis por malpermeso eliri sola sen akompananta plenkreskulo, diris, ‘Mi pensas, ke ne. Eble ni povus konvinki iun akompani nin.’

‘Ni povus peti f-inon Brodi.’

F-ino Brodi ofte kondukis la knabinetojn al artgalerioj kaj muzeoj, do tio ŝajnis farebla.

‘Sed supozu,’ diris Sandra, ‘ke ŝi ne permesos al ni rigardi la statuon, se ĝi estas nuda.’

‘Mi opinias, ke ŝi eĉ ne notos ĝian nudecon,’ diris Ĵenja. ‘Ŝi simple ne vidus ĝian birdeton.’

‘Mi scias,’ diris Sandra. ‘Tiaĵo ne koncernas fraŭlinon Brodi.’

Estis tempo por Ĵenja hejmeniri kun sia patrino, la tutan vojon per tramo tra la fantomeca, novembra krepusko de Edinburgo, trans la Ponto Dean. Sandra mangeste adiaŭis de la fenestro, kaj demandis sin ĉu ankaŭ Ĵenja havis la senton konduki duoblan vivon, ŝarĝita kun malfacilaĵoj, kiujn eĉ milionulo ne devas alfronti. Estas bone konate ke milionuloj kondukas duoblan vivon. La vesperan gazeton oni klake ŝovis en la leterkeston kaj subite regis etoso de sesa horo en la domo.



Fraŭlino Brodi deklamis poezion al la klaso je kvarono antaŭ la kvara, por altigi iliajn mensojn antaŭ la hejmeniro. La okuloj de f-ino Brodi estis duonfermitaj kaj ŝia kapo estis ĵetita malantaŭen:

‘La vento orienta ŝtormanta²²,
La forsto flava paliĝanta,
La riverbordo brue blekanta
Dum la peza ĉielo estas pluvanta
Jen super Kameloto.’

Sandra rigardis fraŭlinon Brodi tra siaj etaj, palaj okuloj kuntiritaj eĉ pli malgrande kaj premante la lipojn.

Roza Stanley estis tiranta fadenojn el la zono de sia gimnastika tuniko. Ĝenja estis fascinita de la poemo; ŝiaj lipoj estis apartaj; ŝi neniam enuis. Sandra neniam enuis, sed ŝi devis konduki duoblan vivon por neniam enui.

‘Ŝi subvenis trovante kanuon
Flosantan sub saliko,
Kaj pentris sur la pruon:
La Damo de Ŝaloto.’

‘Sed per kio via sinjorina moŝto skribis tiujn vortojn?’ Sandra mense demandis kun lipoj ferme fermitaj.

‘Estis poto de blanka farbo kaj peniko, kiu hazarde troviĝis sur la herba rando,’ afable respondis la Damo de Ŝaloto. ‘Sendube ĝi estis lasita de iu senatenta membro de la Ligo de Senlaboruloj.’

‘Ho ve, kaj en tiu pluvo!’ diris Sandra pro manko de io alia dirinda dum la voĉo de f-ino Brodi soris ĝis la plafono, kaj kurbiĝis ĉirkaŭ la piedoj de la pli aĝaj knabinoj en la supera etaĝo.

La Damo de Ŝaloto metis blankan manon sur la ŝultroj de Sandra, kaj fiksrigardis ŝin dum iom da tempo. ‘Ke iu tiel juna kaj bela povus esti tiel malbonŝanca rilate amon!’ ŝi diris per mallaŭta, trista tono.

‘Kion tiuj vortoj povas signifi?’ kriis Sandra alarmite, kun ŝiaj okuletoj fiksitaj sur fraŭlinon Brodi, kaj ŝiaj lipoj premfermitaj.

Fraŭlino Brodi diris: ‘Sandra, ĉu io dolorigas vin?’

Sandra aspektis surprizite.

‘Vi knabinoj,’ diris f-ino Brodi, ‘devas kultivi trankvilan mienon. Estas unu el la plej bonaj atutoj de virino, la esprimo de trankvilo, en ajna cirkonstanco. Rigardu la bildon de Mona Lisa tie!’

Ĉiuj kapoj turniĝis por rigardi la reproduktajn, kiun f-ino Brodi akiris dum siaj vojaĝoj kaj alpinglis sur la muron. Mona Lisa, en sia burĝonaĝo, ridetis kun neŝanceligebla mieno, kvankam ŝi ĵus revenis de la dentisto kaj ŝia malsupra makzelo estis ŝvelinta.

‘Ŝi estas pli maljuna ol la ŝtonoj sur kiuj ŝi sidas. Mi bedaŭras, ke oni ne donis al mi la respondecon pri vi knabinoj kiam vi aĝis sep jarojn. Mi foje timas ke nun jam estas tro malfrue. Se mi estrus vin je la aĝo de sep, vi nun estus *la crème de la crème*. Sandra, venu kaj legu kelkajn strofojn kaj lasu nin aŭdi viajn vokalsonojn.’

Sandra, estante duon-anglino, pleje valorigis siajn vokalojn, ĉar ŝi ne famis pri io alia. Roza Stanley ankoraŭ ne estis fama por sekso, kaj ne estis ŝi, sed Eŭnike Gardiner, kiu alproksimiĝis al Sandra kaj Ĵenja kun Biblio indikante la vortojn, ‘*la infaneto ĝoje eksaltis en mia ventro*²³.’ Sandra kaj Ĵenja diris ke ŝi estas obscena kaj minacis denunci ŝin. Ĵenja jam famis pro sia beleteco kaj ŝi posedis dolĉan voĉon, tiel ke s-ro Lowther, kiu venis por instrui kantadon, admire rigardis ŝin dum ŝi kantis ‘Venu kaj vidu kie la or-kora printempo ...,’ kaj li tuŝetis ŝiajn buklojn eĉ pli aŭdace, pro tio ke f-ino Brodi ĉiam restis kun siaj lernantoj dum la kantoleciono. Li tuŝetis ŝiajn buklojn, kaj rigardis al f-ino Brodi kiel infano kiu montras siajn trukojn kaj kvazaŭ inciteti fraŭlinon Brodi por vidi ĉu ŝi fariĝus konspiranto pri lia ne-Edinburga konduto.

S-ro Lowther estis malgranda, kun longa torso kaj mallongaj kruroj. Lia hararo kaj lipharoj estis ruĝe oraj. Li metis kurbigitan manon malantaŭ sia orelo kaj klinis la kapon al ĉiu knabino por testi ŝian voĉon. ‘Kantu ah!’ ‘Ah!’ kantis Ĵenja, alta kaj pura kiel la marjunulino de la Hebridaj Insuloj, pri kiu Sandra estis parolanta²⁴. Sed ŝiaj okuloj ruliĝis direkte al Sandra por kapti ŝian atenton.

Fraŭlino Brodi gvidis la knabinojn el la muzikĉambro, kaj arigante ilin ĉirkaŭ si, ŝi diris, ‘Vi knabinoj estas mia alvokiĝo. Se mi morgaŭ ricevus edziĝopromeson de la Moŝta Estro de Blazonoj²⁵ mi malakceptus ĝin. Mi dediĉas min al vi dum mia burĝonaĝo. Metu vin ansero-vice, unu post la alia, nun, mi petas, kaj marŝu kun kapo rekta, *rekta* kiel Sybil Thorndike, virino kun nobla mieno.’

Sandra, kun kapo klinita reen kiel ardeo, direktis sian lentugan nazon en la aeron, kaj kun siaj porketaj okuloj fiksrigardis la plafonon dum ŝi marŝis en la anserovico.

‘Kion vi faras, Sandra?’

‘Mi marŝas kiel Sybil Thorndike²⁶, fraŭlino.’

‘Unu tagon, Sandra, vi troige preterpasos la limojn.’

Sandra aspektis vundita kaj perpleksa.

‘Jes,’ diris ŝi Brodi, ‘Vi ne eskapas mian atenton, Sandra. Mi observas frivolan naturon. Mi timas, ke vi neniam apartenos al la elito en la vivo, aŭ kiel oni diras, al *la crème de la crème*.’

Post kiam ili revenis al la klasĉambro, Roza Stanley diris, ‘Mi havas inkon sur mia bluzo.’

‘Iru al la scienca klasĉambro por forigi la makulon, sed memoru ke tio estas tre malbona por la kverkraŭpa silko.’²⁷

◆ (*daŭrigota*)

19 Puddocky estas loko laŭ la rivero nomata "*The Water of Leith*", kiu fluas tra Edinburgo.

20 tvido = skotdrapo. Lanaĵo kun fibroza surfaco k malgranda desegno, el fadenoj mez- aŭ mal-fajnaj en kepra plekto. PIV

21 ondatr/o Ronĝulo (Ondatra zibethicus) el N Ameriko, kun naĝhaŭto inter la piedfingroj, flanke plata vosto, tre valora felo k muskoglandoj; enkondukita al Eŭropo, kie ĝi rapide disvastiĝis. PIV

22 El longa poemo *The Lady of Shalot* de Alfred, Lord Tennyson

23 Nova Testamento, Sankta Luko 1:44 "Ĉar jen kiam la voĉo de via saluto venis en miajn orelojn, la infaneto ĝoje eksaltis en mia ventro.”

24 "*La Marjunulino*", angle *The Sea-Maiden*, estas skota ferakonto kiu troviĝas en kolekto de John Francis Campbell, kiu estis specialisto pri la gaela lingvo.

25 Angle: *Lord Lyon King-of-Arms* – Tio estas alta registara posteno en Skotlando kies okupanto decidas pri la uzo de familiaj blazonoj.

26 Sybil Thorndike 1882-1976 – fama angla aktorino sur scenejo kaj filmo. George Bernard Shaw verkis sian teatraĵon "St Joan" (Sankta Johana) precipe por ŝi.

27 Angle "Tussar silk" kun diversaj skribmanieroj Tussah, Tushar, Tassar, Tussore, Tasar, Tussur, Tusser estas farita de la noktpapilio *Antheraea pernyi*.



aŭtorino, *Pearl S Buck*
(Usono)

Vento orienta – Vento okcidenta (9)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 007*



elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

ĈAPITRO 12

Hodiaŭ la matena krepusko okazis sub trankvila, griza ĉielo. La aero pezas pro malfrua varmo kaj plenas de humido. La infano maltrankviliĝas, sed mi trovas nenian malsanon en li.

La servanto, reveninte de informpeto ĉe la domo de mia patrino, raportis ke mia patro estas alveninta. Laŭŝajne Ŭang Da Ma kuraĝe decidis sendigi al li leteron per la helpo de profesia skribisto, kiu sidas ĉe la enirejo de la templo, humile petante ke li hejmenvenu, ĉar la forto de mia patrino ne pliiĝas. Tagon post tago ŝi sidas en sia ĉambro. Ŝi ne povas manĝi. Mia patro, ricevinte la leteron, estas veninta hejmen dum du tagoj.

Tial mi decidis viziti lin. Mi vestigis mian filon ruĝe. Estus la unua fojo, ke mia patro vidus lin.

Mi trovis mian patron sidantan apud la baseno en la Korto de la Orfiŝoj. Pro tio ke la aero estis varmega, kaj li estas nun treege dika, li sidis ĉe la baseno vestita nur per sia submantelo, kaj pantalono el somera silko, pala kiel la akvo sub la salikoj. La Dua Sinjorino staris apud li, ventumante lin, kvankam ŝvito ruliĝis tra ŝiaj propraj vangoj pro la nekutima fortostreĉo; kaj sur liaj genuoj sidis unu el liaj infanoj feste vestita por lia reveno.

Kiam mi eniris la korton li klakis per la manoj kaj kriis:

“Aha, aha, jen venas la patrino kun sia filo!”

Li forprenis sian infanon de la genuoj, kaj petis mian filon alproksimiĝi, allogante lin per mallaŭta voĉo kaj ridetoj. Mi profunde kliniĝis, kion li kapkline agnoskis, dum liaj okuloj restis sur mia filo. Tiam mi kunmetis la manojn de mia filo kaj petis lin kliniĝi. Tio tre plaĉis al mia patro.

“Aha, aha” li ripetadis mallaŭte. Li levis mian filon al siaj genuoj kaj palpis liajn rondajn brakojn kaj kruojn, kaj ridis pri liaj grandaj, mirigitaj okuloj.

“Tia viro!” li kriis feliĉe. “Petu sklavon alporti dolĉaĵon por li! Oni alportu kandidatajn persimonojn, kaj la etajn lardkuketojn.”

Mi estis konsternita. Mia infano ne havas pli multe ol dek dentojn. Do kiel li povus manĝi persimonojn?

“Ho mia honorata patro!” mi petegis. “Konsideru lian junan aĝon. Lia stomaketo alkutimiĝis nur al mola manĝaĵo. Mi petegas vin”.

Sed mia patro svingis la manon por silentigi min, kaj parolis al la infano. Mi estis devigita cedi.

“Sed vi estas viro! Kaj ĉu via patrino ankoraŭ nutras vin per kaĉo? Mia filino, mi jam havis filojn – multajn filojn, kvar aŭ kvin? Mi ne povas memori. Ĉiuokaze mi scias pli pri filoj ol patrino de nur unu filo, eĉ unu kiel tiu!” Li laŭte ridegis kaj daŭrigis: “Ah, mi deziras ke mia filo, via frato, generus al mi tian, kiel ĉi tiun, per la filino de Li, por adori miajn maljunajn ostojn!”

Pro lia mencio de mia frato mi sentis min sufiĉe aŭdaca por demandi:

“Sed se li edziĝos kun fremdulino, mia patro? Estas tiu timo, kiu konsumas la koron de mia patrino, tiel ke ŝia korpo febliĝas tagon post tago.”

“Ĉit! Li ne rajtas”, li respondis “Kiel li povas edziĝi sen mia konsento? Tio ne estus laŭleĝa. Via patrino senbezone maltrankviliĝas pri la tuta afero. Mi fakte diris al ŝi ĉi-matene:

“Ne plu sensece afliktiĝu. Lasu la junulon ludi kun sia fremdulino. Li aĝas dudek kvar jarojn, kaj lia sango urĝas lin. Je lia aĝo mi havis tri kantistinojn, kiujn mi amis. Lasu al li lian plezuron. Kiam li laciĝos de ŝi, ni diru, post du monatoj, aŭ se ŝi vere estas belulino, en kvar aŭ kvin, tamen mi ne atendas tion, li pli volonte akceptos sian aranĝitan edziĝon. Ĉu ni rajtas supozi, ke li vivos kiel monaĥo dum kvar jaroj, eĉ se li loĝas en fremda lando? Ĉu fremdaj virinoj ne estas malgraŭ ĉio virinoj?”

“Sed via patrino estis jam delonge malkomprenema. Ekde la komenco ŝi estis posedita per ia stranga intenseco. Ne, mi ne parolas malbone pri ŝi. Ŝi estas saĝa, kaj sub ŝiaj manoj mia oro kaj arĝento ne estas senzorge elspezitaj. Mi ne plendas. Ŝi neniam vortovipas min kiel iuj virinoj. Kelkfoje mi deziras, ke ŝi ja faru tion, tiel ke mi ne devas alfronti tiun silenton, kiu eĉ en la komenco mistifikis min. Ho, tio ne ĝenas min nun, tio tute ne gravas. Neniu komprenas la kapricojn de virinoj. Sed ekde sia junaĝo ŝi havis tiun mankon, tiun seriozecon tro intensa por komforto en la ĉiutaga vivo. Kaptas ŝin ia pensaĵo, iu imagita devo, kaj tiam en ŝia menso, tio fariĝas la vivo mem. Tio streĉas onian paciencon.”

Li rompis sian paroladon pro irito, kiun mi neniam antaŭe vidis ĉe li. Li prenis la ventumilon el la mano de la Dua Sinjorino kaj komencis bruske ventumi sin. Li metis mian filon sur la teron kaj ŝajnis forgesi lin. Li daŭrigis preskaŭ kolere:

“Kaj nun ŝi havas ian strangan, virinan ideon, ke la unua kuniĝo de nia filo produktu nepon, pro superstiĉa ideo, ke la infano estus tial pli riĉe dotita de la ĉielo. Ho, virinoj estas obstinaj! Kaj eĉ la plej bonaj el ili estas nesciantaj, pro ilia malkontakto kun la mondo.”

Li fermis la okulojn kaj silente ventumis sin dum kelkaj momentoj, kaj lia kolero foriĝis. Lia kutima paca mieno kaj ridetanta bona humoro pasis sur lia vizaĝo. Li malfermis la okulojn kaj trudis kuketojn al mia filo, dirante:

“Manĝu mia etulo! Kial tio gravas? Ne maltrankviliĝu mia filino. Ĉu filo povas malobei sian patron kaj vivi? Nenio povas maltrankviligi min.”

Tamen mi ne estis kontenta, kaj dum iom da silento, mi devis komuniki plie.

“Sed kio, mia patro, se li rifuzos edzinigi sian fianĉinon? Mi aŭdis pri tiu ebleco en ĉi tiuj ŝanĝitaj tempoj.”

Sed mia patro ne volis aŭdi tion. Li leĝere svingis sian manon kaj ridetis.

“Rifuzos? Mi nenie aŭdis, ke filo povas rifuzi ion al sia patro. Trankviliĝu, mia filino. En unu jaro li estos generinta filon laŭ la leĝo, kun la filino de Li; tian filon kiel vi, mia vireto!”

Kaj li palpis la vangojn de mia filo.

Mi rakontis al mia edzo, kion mia patro diris, kaj li aŭdis kaj respondis penseme.

“La problemo en ĉi tiu afero povas esti ke la fremdulino ne volonte akceptos suban pozicion. Ne estas la kutimo en ilia lando por viroj aldone havi malĉefajn edzinojn.”

Mi havis nenian tuĵan respondon. Senpense mi neniam konsideris ŝian vidpunkton, kion ŝi pensus pri niaj kutimoj. Ĉu ŝi ne sukcesis delogi mian fraton? Kion pli ŝi povus deziri? Ĝis nun mi pensis nur pri mia frato kaj pri lia devo al siaj gepatroj.

“Ĉu vi sugestas, ke ŝi atendos esti la ununura edzino de mia frato dum ŝia tuta vivo?” mi demandis.

Mi eĉ indignis iomete. Kiel ŝi povus atendi malpermesi al mia frato tion, kio estas lia laŭleĝa rajto en lia propra lando? Kiel ŝi povus postuli pli de li, ol mia honorinda patrino siatempe postulis de mia patro. Tion mi diris al mia edzo.

“Estas tre simple, mi pensas”, mi konklude diris. “Se ŝi edziniĝos kun viro de nia raso, ŝi devas doni al li la liberecon al kiu li al kutimiĝis. Ŝi ne povas trudi siajn fremdajn morojn ĉi tie.”

Mia edzo rigardis min kaj strange ridetis. Mi ne komprenis la signifon. Tiam li parolis:

“Supozu ke mi anoncus, ke mi volas preni edzineton – konkubinon?”

Io frida frapis min kiel neĝo ĵetita kontraŭ mia nuda brusto. Mi flustris:

“Ho ne mia sinjoro – tion vi ne povus fari – ne nun! Mi donis al vi filon!”

Li salte leviĝis, kaj mi sentis liajn brakojn ĉirkaŭ miaj ŝultroj. Li murmuris:

“Ne, ne, mia koreto – tion mi ne volas – certe mi ne povus.”

Sed liaj vortoj estis tro subitaj. Ekzistas vortoj, kiujn ne malmultaj virinoj timas, kaj eĉ atendas, sed ne mi, ĉar li amas min. Nun, sen averto, li trudis en mian koron ĉiun angoron de mia patrino kaj la angoron de cent generacioj da virinoj kiuj amis sian sinjoron kaj perdis lian favoron. Mi subite ekploris kaj ne povis regi min.

Tiam mia edzo konsolis min tenante miajn manojn kaj murmurante, sed mi ne povas riveli liajn vortojn, Fratinjo. Ripeti ilin hontigus min. Mi fariĝas sinĝena kiam mi pensas pri ili. Ili reprezentas amon la plej dolĉan. Mia plorado kvietigis kaj mi estis konsolita.



Post kiam ni estis silentaj dum iom da tempo, li demandis min:

“Sed kial vi ploris?”

Mi mallevis la kapon kaj sentis la kurantan sangon kuregi al miaj vangoj. Per ambaŭ manoj li levis mian kapon:

“Kial, kial?” li insistis, kaj kiel ĉiam responde al liaj demandoj, la vero venis al miaj lipoj.

“Ĉar mia sinjoro loĝas en mia koro”, mi balbutis, “kaj tute plenigas ĝin, kaj mi – ”

Mia voĉo de si mem silentiĝis, sed liaj okuloj respondis. Tiam li diris mallaŭte kaj plej tenere :

“Supozu ke ŝi tiel amas vian fraton? Ŝia naturo ne malsamas de la naturo de ĉiuj virinoj nur ĉar ŝi hazarde naskiĝis aliflanke de la okcidentaj maroj. Vi estas virinoj, kaj vi similas en via spirito kaj viaj deziroj.”

Tiel mi neniam pensis pri ŝi. Mi vidas, ke mi nenion komprenis klare. Estas ĉiam mia edzo kiu instruas min.

“Ho mi timas, timegas! Mi komencas kompreni iom nun. Kion ni faru se ekzistas tiu amo inter la fremdulino kaj mia frato?”

◆ (*daŭrigota*)

Fablo pri "fablo"

Rita Mkrtĉjan



La hundo estis tre malsata,
Vagadis, serĉis laŭ stratoj,
Feliĉ! Ekvidis la afiŝon -
"Por ĉiuj bestoj - viando, fiŝoj".

Saltante, ĝoja hund' alkuris
Kaj "viandon" iom ĝi gustumis
Denove la afiŝon spektis
En gust' de viando, viand' forestis.

Sed pensis hundo, -Eble trovos
En lok' alia mi manĝaĵon
La nova loko, la skribaĵo
"Senpagan viandon manĝi povos".

La hund' pro sperto malsukcesa
Demandis, ĉu la viando estas?
Respond' eksonis, kiel ĉie, jesa
Kaj kion fari, hundo manĝi pretas.

Ekmanĝis kaj komprenis hundo
Elekt' ne eblas kaj ne estas grava
Ĉu manĝi tion aŭ ne manĝi tute
Ne ĉiam nom' konformas al enhavo.

...
En viv' ni ofte kredas al la nomo
Certigas ĉiuj- saĝa homo,
Paroli povas homo multe
Ne gravas, bonan aŭ stultan.

Se la pentraĵon laŭdas ĉiuj
Ni ne hezitu kaj admiru.

Ni povas verki, ve, sensencan ion
Nur nomi tion "poezio",
Kaj ni "gustumos" tiun ion
Kiel plej belan Poezion.




Mia kateno

Angel Arquillos Lopez



Ĉio silentas,
triste noktiĝas.
Mia kateno, tro multe pezas,
kaj mi tristiĝas.
En mia ĉelo, malgranda truo
estas la pordo de entrudiĝanto:
malgranda muso,
kiu, ĉiutage,
manĝas maltrankvile,
ĉiujn restaĵojn.
Mi ne komprenas,
kial ĝi foriras,
kiam mi volas tuŝi karese
ĝian dorseton.
Mi koleriĝas, ĉar ĝi kuretas
kaj malaperas,
kaj mia menso,
denove nervas,
kaj mi sekigas,
per naztuketo,
varman larmeton
kaj post momento
mi endormiĝas.
Ĉi rakonteto,
ĉiam okazas,
kiam noktiĝas,
kaj vento haltas
kaj mi rigardas
kun granda sento,
mian katenon.



LETEROJ EL LA KOSMO (2)



Daŭrigante la enhavon de numero 007

Elena Popova

SUR LA PLANEDO "FRATECO"

Saluton amiko,

Estis nokto. La ĉielo kaj la maro kunfandiĝis en profundan malhelbluan infiniton. Poste aperis luliloj. Ili estis faritaj el radioj kaj brilis kiel oro. Sur ili staris du estaĵoj, similaj al ni, la homoj. Mi staris sur la strando kaj rigardis. Iu lulilo haltis antaŭ mi kaj mi sentis, ke mi devas pluiri. Do, la magia lulilo prenis min al la planedo "FRATECO". Ĝi estis tiel bela, kiel edeno. La lulilo faligis min sur herbejon. Starante inter la arboj mi kredis, ke mi estas en la ĉielarko – ili estis tiel belaj.

Estas Printempo! – Mi aŭdas flustron ĉirkaŭ mi, aŭ pli ĝuste mi sentas ĝin. Kaj ĝi povus esti eĥo de miaj pensoj, mi ne scias.

Mi ne scias ĉu hazarde aŭ intence mia gvidisto kondukis min ĝuste ĉi tien, kie nova infanĝardeno malfermiĝis hodiaŭ. Mi preskaŭ restis kun malfermita buŝo surprizite – la infanoj de la bestoj staris unu apud la alia kaj mi komprenis, ke ili estas geamikoj. Ili sidas sur seĝetoj, antaŭ ĉiu estas tablo, ĉiu elektita de la infano kaj estas pli bela kaj unika ol la aliaj. La bestoj estis malgrandaj, ne laŭ niaj surteraj nocioj.

La Instruisto komencis:

- Infanoj, tio, kion ni faros hodiaŭ estas kantado, pentrado, sporto, kulturo de la rilatoj. Nia unua horo estas pentrado.

Bonvolu desegni tion, kion vi plej ŝatas. Li donis al ili foliojn kaj kraĵonojn.

La instruisto marŝas de tablo al tablo kaj ĝuas la lerton de la infanoj.

- Nu, kiu donas al mi sian desegnaĵon, provu kanti kanton aŭ reciti poemon, por ke ni pli bone konu ĝin. La vulpeto komencis:
- Mi scias ruzecon de mia patrino, kiel trovi nutraĵon – kiam mi kuras kontraŭ la vento, malamiko min ne flaros. Mi scias, ke la spuroj estas kaŝitaj, kiam ilin ni viŝas per la vosto.
- Kio vi volas iĝi? – Skoltisto! – Kaj kion Bonon vi faris hieraŭ? – Hieraŭ mi balais la vojnon antaŭ nia domo kaj purigis la ĉambrojn... – fanfaronis la vulpeto.
- Tio estas devo de ĉiu infano. La Skoltistoj devas havi ankaŭ aliajn kvalitojn, krom la laboro.

Urseto ekstaris. Ĝi pentris sin sur scenejo. En sia maldekstra manego ĝi tenas premion – poton kun surskribo: “Mielo por la venkinto”.

- Mi estas malrapida sed amuza. Mi nepre studos bone, por sukcesi. Mia voĉo ne estas tre bona, pro tio mi dancos.

Kaj la urseto, starante sur siaj malantaŭaj kruroj, ĉirkaŭpaŝis, balanciĝis. Ne estis ĉeno, ne estis ordonoj, ĉio venis el ĝia koro.

- Panjo kaj Paĉjo estas artistoj, do mi estos kiel ili. Al mi plaĉas esti sur la scenejo... Ĉiuj estas feliĉaj kaj ili gratulas vin...
- Estas necesa multe da laboro antaŭ la aplaŭdo de la vizitantoj...– diris la instruisto.

Unu post alia, la infanoj leviĝis, transdonis siajn desegnaĵojn kaj prezentis sin. Apenaŭ Kuniklo ekstaris, Pasero sonorigis, ke la horo finiĝis.

Gaja muziko aŭdiĝis ĉi tie kaj Pasero invitis ilin:

- Tiu horo estis mallonga, ĉar vi pentris plezure. Venu matenmanĝi, mi petas!

La infanoj tuj viciĝis kaj direktis sin al granda arbo. Ĉi tie la abeloj transdonis al ili po glason da teo kun mielo. Post tio, ĉiuj direktis sin al la sportaj kampoj.

- Amiko, vi verŝajne volus scii, kiel bestoj kaj birdoj, malamikoj sur la tero, lernas kaj ludas kune. Jen la respondo de la instruisto:
- Kion signifas malamikoj? Ĉi tie ni ĉiuj amas unu la alian kaj ni estas geamikoj.



Mia restado finiĝis. Mia gvidanto telepatie diris al mi, ke ni forlasu la infanĝardenon. Ĉe la foriro, mi vidis signon: “Bona faro estas via enira vizo.”

Ĉu vi ne aŭdis la kredon, ke tiu, kiu iras sub la ĉielarko, estos feliĉa? Multe pli feliĉa estas tiu, kiu povas atingi ĉi tiun planedon kiel mi. Mi ne nur rigardis kaj aŭskultis, sed kvazaŭ parto de la bonkoreco de ĝiaj loĝantoj penetris min. Do, mi revas reveni ĉi tien, kie la timo estas nekonata, kaj la rideto estas signo de amikeco, kie ne ekzistas malamo. Tio estis bonega leciono por mi ...

Via amiko Nikolao

SUR LA PLANEDO FLORKRONO

– Saluton, amiko, mi provos sendi al vi miajn impresojn pri iu bela planedo, kiun mi malkovris dum mia interstela flugo.

En la fadeno de pensado, mi antaŭ nelonge translokiĝis ĉi tien. Ĉu vi venas kun mi?

"Kiel hele ... Kiel bele!" – mi ekkriis mire, kiam mi alteriĝis. Ĉi tie la aero mem brilas – ne estas nokto kiel sur la Tero. Estas milda radianto, kiam la suno malproksimiĝas de la planedo kaj tiam ĝiaj loĝantoj fermas siajn okulojn kaj dormas.

Kvieta, milda kanto flosis proksime al mi, sed mi ne povis vidi la kantiston. La kialo estis lia mallonga staturo, kiel tiu homo de fabeloj kaj pro la speciala koloro de liaj vestoj.

Vojaĝante, mi konstatis, ke la rakontoj estas tute veraj, se io ne estas en nia bela Tero, ĝi estas aliloke en la vasta mondo.

Jen ĉi tiu homo kliniĝas kaj atente rigardas la teron:

“Kresku, kresku floro, vi, planeda ido!”

Mi scivolemis: – Pardonu min, sed al kio vi rigardas, kion mi ne vidas kaj al kiu vi kantas?

– Mi rigardas, kiel la semo naskiĝas, mi aŭdas ĝin kreski kaj ĉu ĝi bezonas helpon ... Se vi restos kun mi iom da tempo, ankaŭ vi vidos tion...

Li rigardis min, kaj mi konstatis, ke liaj okuloj senprokraste legas mian tutan teran biografion.

– Vi ne aŭdas kaj vidas, ĉar vi venas de alia planedo. Kiam vi kantas al la semoj kaj parolas al ili kun amo, ili kreskas pli rapide. Se vi prenas ĉi tiujn semojn en vian manon, varmigis ilin, kaj kantas aŭ parolos kun ili, eĉ mense, vi rimarkos kiom rapide ili ĝermos, kreskos kaj floros...

Estas kosma leĝo, –diris la malgranda viro – La motoro estas amo. Se vi vidas ĉi tiujn florantajn kampojn, ĉio semas kaj kreskas kun amo. Mia filo kaj miaj fratoj estas tie, kie oni kolektos la semojn. Aliaj preparas la grundon por semado en novaj lokoj. Homoj, kiel mi, estas specialistoj pri semado kaj elkreskado de plantoj...

– Do, vi estas agronomo?

– Jes!

Mi rigardis, kiel mi povis vidi, la kampojn plenajn de la ĉielarkaj koloroj. La malaltaj loĝantoj de la planedo ne videblis, sed aŭdiĝis mallaŭta kantado, kvazaŭ miloj da abeloj flugis al sia laboro.

– Pardonu min, ĉu ne estas knabinoj kaj virinoj sur via planedo? Antaŭ ol mi povis fini miajn vortojn, li komencis respondi:

–Kompreneble estas...

Li daŭre parolis pri la floroj kaj la aliaj kreskaĵoj:

–La floroj aŭdas, komprenas kaj memoras. Ili suferas, kiam vi rompas, ŝiras kaj piedpremas ilin. Ili suferas ankaŭ, kiam vi estas malĝoja aŭ malsana, ili sentas ĉion ...

–Ni uzas ilin por ornamado kaj medikamentoj faritaj el ili. Ni donacas ilin al proksimuloj. Kiel ni ne uzu ilin? –Unue petu ilin, pardonpetu antaŭ ol disŝiri ilin, danku ilin... Ni ankaŭ uzas ilin – ni portas iliajn semojn tra la Kosmo por semi ilin ĉie, sed ili scias tion anticipe kaj konsentas. Nenio estas farata ĉi tie per forto, ĉiuj scias sian devon kaj ĝoje plenumas ĝin.

La viro rigardis min, kaj mi volis malpliigi kaj eĉ malaperi, sciante kiel ni traktas plantojn. Ni ĝuas la belan bukedon kaj la floroj mortas sekiĝante tagon post tago.



Li denove legis mian penson kaj, skuante sian manon, diris: "Vi lernos, sed ĝis tiam vi suferos kaj kaŭzos doloron al la estaĵoj ĉirkaŭ vi."

Li klinis sin por daŭrigi sian laboron, kaj mi dankis lian atenton kaj foriris.

Mi flugis pli rapide kaj havis la okazon vidi malproksimen.

Mi sentis min malpeza kaj lerta.

Ĉe la supro de ne tre alta monteto estis observejo.

–Ĝi estas konstruita alte...– alia viro klarigis al mi, probable konstruisto, – ĉar de tie oni povas aŭdi kaj vidi ĉion plej bone. Ĉiuj pensoj kaj petoj de la floroj povas esti tuj kaptitaj de la homoj.

Mi komprenis, ke ili ne bezonas metiistojn por antaŭdiri kia estos la vetero, kvankam tio estis necesa por ĉiu kampo. Ĉi tiuj malgrandaj agronomo– meteorologoj povas alporti nubojn kaj pluvon per siaj mensoj, kiam la floroj kaj herboj petas ilin, kaj ree forigos ilin. Ili ankaŭ prizorgas la herbojn, ĉar ili ankaŭ estas floroj. Neniu malestimas aŭ piedpremas ilin.

–Ĉiu herbo estas bona kaj necesa por iu, oni diris al mi.

Mi jam komencis paroli pri ili. Iliaj domoj estas malgrandaj kaj tre belaj. Ili estas faritaj el branĉoj de arboj, kiel la malriĉuloj de la Tero iam faris siajn domojn el la malmolaj branĉoj de arboj. Kaj la domoj odoras kiel ĉio ĉirkaŭe. Ĉi tio pensigas min, ke verŝajne la "branĉoj" ne estas tranĉitaj, ĉar ili sekiĝus. Mi certas, ke neniu ĉi tie suferas sendormecon ...

–Ĉu vi ne enuas pri ĉi tiu monotoneco – nur floroj vidiĝas ĉie? – Mi demandis antaŭ florejo.

Juna virino respondis al mi: – Kion signifas enuo? Estas nia devo al la planedoj, kiuj atendas niajn florojn. Ankaŭ al via Tero ni sendas ... Se vi bone konas la florojn, vi rimarkos, ke ĉiu floro estas malsama ... Novaj specioj estas kreitaj ĉi tie. Kaj oni devas doni iom da amo al ĉiu floro, same kiel al infanoj.

Ŝi rigardis min kaj blueco fluis el ŝiaj okuloj–la purpura koloro de lavendo de ŝiaj vestoj, kiuj ankaŭ odoris je floroj. De interne de la domo mi aŭdis trankvilan kanton, akompanatan de instrumento, kiel gitaro. Rimarkinte, ke mi aŭskultas, la virino diris: – Nun mi invitos mian filinon paroli kun vi ...

Tre bela knabino staris antaŭ mi: – Bonvenon al nia planedo!

La knabino kliniĝis iomete, plena de respekto.

- Kion vi studas en la lernejo? Ĉu tie ĉi la homoj estas nur agronomoj? – mi rapide demandis.
- Ne, juna sinjoro, ni lernas la ĉefan profesion sur nia planedo –floristikon, sed ni lernas ankaŭ poezion kaj muzikon. Sen ili, ni ne povus esti kompletaj en nia laboro. Ni studas ankaŭ meteorologion, astrologion, astronomion ... Kompreneble matematikon. Ni akiras diversajn teknikajn sciojn, sen kiuj nenie en la spaco eblas. Kaj tiuj el ni, kiuj volas kontakti kun alia planedo, lernas ĉion pri ĝi. Estas devigaj kaj laŭvolaj temoj.
- Ĉu la homoj ne malsanas ĉi tie?...

Tiam ŝia patrino intervenis: –Ĉi tio okazas tre malofte, kaj kiam iu revenas de alia planedo, li eble malsanas. Ĉi tie la kuracistoj preparas medikamentojn nur el herboj.

- Ĉu vi havas tempon por ludi? –Mi restis kun la impresoj, ke post lernejo vi laboros en la kampo.
- Jes! –La knabino ridis, ŝia voĉo sonis per la sono de la gitaro, kiun mi ĵus aŭdis. – Kompreneble ni havas liberan tempon. Nun mi lernis miajn lecionojn kaj mi komponis novan kanton pri miaj plej ŝatataj floroj. Mi kantas ĝin al ili ĉivespere, mi scias, ke ili estos feliĉaj. Ni dancos kune ...

Nun mia miro estis tiel granda, ke la patrino komprenis kaj ridis: – Niaj infanoj ludas kun la Spiritoj de la floroj... Ili povas voki ilin, vidi ilin kaj paroli kun ili. Se vi volas paroli kun iu,

kiu venis al via planedo, mi povas inviti mian avon...

Mi dankis kaj rezignis, mia Tero estas tiel konata... Mi legis pri floroj, kiuj rekonas ŝtelistojn kaj tiujn, kiuj rompas siajn branĉetojn... Poste mi bedaŭris, ke mi ne renkontis ĉi tiun avon, kiu devas aspekti juna, ni devas lernigi nin rigardi aferojn per la okuloj de aliaj homoj...

Mi adiaŭis miajn novajn amikojn kaj forflugante diris: – Mi amas vin, Planedo de Floroj!

Responde,odoro de floroj atingis min.

Ĉio estis tiel bela, ke mi promesis al mi reveni iun tagon..

Nikolao

◆ (daŭrigota)

APORIO II


Jen tiu haŭto ardas, jukas,
murdantaj manoj, ungoj,
sennoma freneza kolero
tiu multmortigo

Ektimiga rigardo de l' knabo
preskaŭ junul', ŝvito, penado
por esti la unua de l' klaso
ha! se parolus la junulo:
kial tioma konfuzo?
kie la fino de l' puto?
kie finfine la solvo
de tiuj, tiomaj bataloj?
al la unua de l' klaso
restas la brusto, medaloj,
ĉiu profito, kredito
en tiu milita devizo: al la unua ulo
"honoro al merito"

Al la knabo plej bonon deziras mi
al junul' malpli da konfuz'
al junul', nun plenkreskul',
ĉi-Kristnaske, la amnestion:
iĝi kompato, matura amo
mi multe sentas, min pardonu, dankeme amas vin,
mi multe sentas, multe sentas!



PAULO P NASCENTES





Aŭtoro: [Maksim Bočkarev](#)

Jaga (10)

*Daŭrigante la enhavon de
numero 007*



elrusigis [Sergei Isakov](#)

Parto IV

Nova plago

Grandega grizhara strigo sidis sur la disvastiĝantaj branĉoj de maljuna pino, nenio nekutima. Nur birdo sidanta kaj rigardanta homojn porti ŝtipojn. Ili smirgis la ŝtipojn, verŝas ian solvaĵon el grandega kaldrono kaj metas ilin en grandegan palisaĵon. Eĉ ne palisaĵo, sed grandega muro. Tiajn murojn ŝi neniam vidis. Jaga lernis fariĝi strigo antaŭ ĉirkaŭ jarcento kaj duono. Kaj ŝi ne povis rezisti la tenton flugi enen kaj vidi kiel vivis la posteuloj de la homoj de ŝia tribo. Aperis la unuaj urboj en la senco de la vorto, al kiu ni kutimas. Ŝia tribo fariĝis pli kaj pli multnombra. Kaj, verŝajne, ĝi ne plu estas tribo, sed nacieco, se ni aplikas modernajn konceptojn kompreneblajn por la respektata leganto.

Setlejoj evoluis pli kaj pli rapide, iĝante similaj al la unuaj grandurboj. La limoj kreskis, absorbante pli kaj pli novajn tribojn kaj naciecojn. Kio ankaŭ multe surprizis Jaga estis la ŝanĝoj en lingvo. Ŝi ŝajnis kompreni ĉion, sed dum la pli ol du jarcentoj, kiam ŝi ne aperis en sia naskiĝlando, la lingvo de ŝiaj parencoj prenis novajn formojn. Aperis vortoj pruntitaj de aliaj triboj, sed tradicioj estis sankte observitaj. Kaj la magiistoj ankoraŭ konservis la idolejon senmanke en ordo. Jaga estus surprizita se iu dirus al ŝi ke ŝia tribo oferis kuntribanojn. Kaj, verŝajne, ŝi eĉ ne surpriziĝis, sed koleris. Ĉar ŝiaj parencoj vivis el boneco, kiel ordonis la leĝo de iliaj prapatroj.

La strigo iom pli rigardis la konstruistojn, taksis la kvaliton de la muro kiel pozitivan kaj silente flugis al la alia fino de la emerĝanta urbo. De tie aŭdiĝis bruo de piedpremado, henado de ĉevaloj kaj laŭtaj krioj. Ŝi ne povis kompreni duonon de ĉi tiuj krioj, kiujn ili parolis en lingvo, kiun ŝi ne komprenis; La strigo sidiĝis en la ombro de la baldakeno de malplena gardoturo kaj komencis rigardi kaj aŭskulti.

Kiel mi diris antaŭe, okazis ŝanĝoj en la sinsekvo de potenco en ŝia tribo. La plej aĝa infano de la estro de la tribo iĝis la heredanto, sendepende de la sekso de la infano.

Nun la emerganta nacio estis regata de la parenco de Jaga, juna princo. Li perdis siajn gepatrojn frue, sed la kuratoreca sistemo funkciis bone de generacio al generacio. La maljunuloj instruis al la juna reganto ĉiujn komplikaĵojn de regado de la popolo kaj militado. Jaga ŝatis lin. Iel li rememorigis al ŝi la duonforgesitan grizharan Stav. Same fieraj kaj memvola, sed saĝo ne estis fremda al li.

La novvenintoj, kies lingvon Jaga ne povis paroli, havis pli malhelajn harojn kaj haŭton ol ŝiaj parencoj. Ili parolis rapide kaj plejparte guturale, kaj la maljunulo tradukis ilian parolon. Lia vizaĝo estis kovrita de cikatroj, lia barbo estis blanka kiel neĝo. Estis klare, ke la maljunulo estis nobla militisto en sia junaĝo. Sed ne liaj cikatroj montris lin maljuna militisto, sed lia aspekto kaj porteo. Kaj dum la tuta tempo li tenis per la maldekstra mano la neekzistantan tenilon de la glavo. Ĉi tiu kutimo estis konservita inter la viraj militistoj de tiu tempo por la tuta vivo asignita al ili.

“Granda fluganta drako venis al iliaj landoj! Ĝi kraĉas fajron! Formanĝis iliajn ŝafarojn! Kaj disĵetis gregojn da iliaj ĉevaloj trans la stepon!” - tradukis la maljuna militisto.

“Pri kio li parolas!? Kia drako? Ĉu vi ĉion ĝuste komprenis? — la juna princo ekscitiĝis. Li komprenis, ke vane komenci ĉi tiun interparolon sur la strato li devus ricevi la senditojn en la domo; Sed lia varma sango ne permesis al li plenumi la regulojn de gastamo kaj diplomatio. Lia avo, kiun la princo respektis kiel sian patron, mortis en bataloj kun la militistoj de la tribo, kies senditoj nun staris antaŭ li.

“Demandu denove! Vi certe forgesis ilian lingvon, maljunulo!” — la juna reganto ne cedis.

“Mi volonte forgesus! Sed dum la tri jaroj, kiam mi sidis en la kavo vizitante ilian princon, li rememoris tiun lingvon dum sia tuta vivo!” - respondis la maljunulo digne.

“Demandu, kion ili volas de ni?” — ordonis la princo. Li ne ŝatis tiujn, laŭ lia opinio, sovaĝulojn.

“Ili volas pacon dum dek jaroj. Ili volas lasi la mezan filon de sia princo al vi por ke vi eduku!” — la maljunulo montris al knabo proksimume sepjara, kiu fiere sidis sur blanka ĉevalino en la centro mem de la delegacio.”

“Ili ankaŭ petas vin sendi taĉmenton de viaj plej bonaj militistoj por ĉasi strangan beston. Oni diras, ke viaj kiraso kaj kaskoj kun maskoj povos elteni la fajron de tiu lacerto. Ilia leda vesto ne protektas ilin kontraŭ la pikanta kraĉo de la reptilio!” — tradukis la maljunulo, kaj li mem ne kredis, kion li diris al la princo.

“Ordonu nutri kaj trinkigi la gastojn! Mi pensos! Jes, loĝigu ilin ie ĉi tie, en la periferio. Ne lasu lin eniri la vilaĝon, ne lasu lin rigardi la murojn! Se iu malobeas, li galopos hejmen senkapa!” - severe diris la juna princo. Li akre turnis sin kaj, akompanate de siaj onkloj, foriris.

La maljuna interpretisto tradukis ĉion preskaŭ vorto post vorto. Precipe la lastan frazon. Ĝi estis tre severa por la nomadoj. Ilia militisto ne estu enterigita sen kapo, ĉar tiam li ne vidos siajn prapatrojn. Kaj lia spirito estos kondamnita al eterna vagado inter la mondo de la vivantoj kaj la mortintoj.

La gastoj iris ripozi de la vojo, kaj la princo kolektis konsilojn. Jaga en la formo de strigo, aŭdis ĉion, kion homoj diris. Al iu ajn, sed por ŝi ĉio estis klara. Ĉi tie klare estis kelkaj reptilioj, kies dormon protektis ŝia instruisto Alaj. Nur unu afero estis al ŝi neklara: kial la Kreinto ne intervenis? Kaj kio okazos al Alaj nun? Li eble ne estas pardonita pro ĉi tiu renkontiĝo de du epokoj.

Ŝi senbrue elflugis el sub la baldakeno kaj direktiĝis al la Koro de la Arbaro.

La plano de Leŝij

Leŝij kaj Vodjanoj aŭskultis la rakonton de Jaga sen interrompi. Ili tre bone sciis, pri kio kapablas la estaĵoj el la jam forpasinta epoko de gigantoj. Kaj tiam Leŝij, kiel oni diras, eksplodis: “Kion li pensas? Ĉu li povas eskapi ĉi tion? Li ĉiam estas tiel kompatema, kaj ni ĉion purigos!”

"Ne insultu, ni pripensu tion!" - Vodjanoj trankviligis sian amikon.

Kaj surprize, Leŝij eksilentis. Li komencis rondiri ĉirkaŭ la kampeto. Lia vizaĝo estis serioza, kaj Jaga komprenis, ke li havas planon, kaj li diris: "Mi scias kion fari kaj mi faros ĝin sola!"

Jaga kaj Vodjanoj rigardis lin demande.

“Fidu min! Kaj demandu nenion!” - Neatendite trankvile deklaris Leŝij.

“Mi kunprenos Skor-on, kaj vi, Jaga, zorgos pri miaj havaĵoj! Mi avertos la pli maljunajn kaj junajn spiritojn, ke ili obeu vin senkonteste!” - li aldonis.

"Almenaŭ diru al mi, por kio ni estu pretaj?" - demandis Vodjanoj sian amikon. Li demandis sen premi min, bonmaniere.

“Kaj nun, Vodjan, vi devas esti preta por io ajn! La mondo renversiĝis! Renkontiĝis epokoj, kiuj neniam estis destinitaj renkontiĝi! Kaj kiu, se ne ni, denove prenos la ĉefan baton!” - tre malklare respondis Leŝij.

"Se Alaj subite aperas, diru al li, ke mi kulpigas lin pri nenio!" - Leŝij finis sian monologon malgaje.

"Ĉu vi planas morti?" - Jaga ne povis rezisti kaj intervenis.

Leŝij nenion respondis, silente turnis sin kaj iris en la densejon, de kie Skor, kiu aperis ĉe lia voko, jam elrigardis.

Leŝij lasis Jagan kaj Vodjanoj-n en profunda konfuzo kaj piediris pli kaj pli profunden en la densejon per longaj paŝoj. Skor ne kutimis diskuti kun aĝestroj kaj daŭrigis kun Leŝij, murmurante ion sub sia nazo.

La Leŝij haltis abrupte, turnis sin al Skor kaj demandis fronte: "Ĉu vi adiaŭis Lejan?"

Per sia demando li klare konfuzis Skoron. Finfine, ĉi-lastata tute timis neniun en ĉi tiu mondo, principe, kaj kiam apud li estas unu el la plej potencaj Superaj Spiritoj de la Tero, do kial entute maltrankviliĝi? Tial li ne tuj respondis: "Mi ne ĝenis ŝin ĉagreni! Kion ni faros dum longa tempo, aŭ kion?"

La Leŝij ne insultis. Ĝenerale, hodiaŭ li estis tre trankvila: "Nu, ĝuste! Kial vane ĝeni? Ni revenos, kompreneble!"

Post tiuj ĉi vortoj Skor komencis dubi la unuan fojon en la sennombraj jaroj de sia surtera vivo. Ne, li certe ne ektimis! Timo estis nekonata al li. Li estis nur perdita en pensoj. Dum la tuta tempo, ke li helpis al Leŝij en liaj aferoj, unuafoje li vidis la "ĉefon" tian...

Tial, konante la malmolan karakteron de siaj superuloj, li faris neniujn demandojn. Kiam venos la tempo, ĉiuj diros al vi. Intertempe, li rapidis post la larĝe paŝanta Leŝij, piediranta pli kaj pli profunde en la densejon. Kaj ŝajnis, ke Skor komencis kompreni kien ili iras.



Ĝis hodiaŭ, nur tri homoj sciis pri ĉi tiu loko: li, Leŝij kaj Vodjan. En nekredible profunda densejo inter antikva picearbaro, de antikva tempo estis vere mirinda loko. Eĉ sovaĝaj bestoj ne vagis tie, por ne paroli pri homoj. Antaŭ longe, eĉ nombrante la spiritojn, Leŝij ĵetis la plej potencon sorĉon kiun li povis sur ĉi tiuj teroj. Kaj eĉ la Supera Spirito de la ne povus penetri ĉi tien sen la permeso de Leŝij.

Kiel mi jam diris, ĉi tiu loko estis ĉirkaŭita de antikvaj piceoj. Kaj ĝi aspektis kiel grandega ŝtona pelvo, ĉe kies fundo el apenaŭ rimarkebla fendeto ŝprucis malgranda, preskaŭ nerimarkebla fonto. Ĝi plenigis tre malgrandan tranĉeon en la mezo kaj disvastiĝis en fendojn en la ŝtona bovlo.

Skor sciis, ke ĉi tiu miraklo formiĝis kiam grandega ŝtono falis el la ĉielo. Kaj kiam la vento kaj pluvo forlavis la pli molan kaj lozan rokon, tiu ĉi tute ronda pelvo restis ĉe la loko, kie falis la ĉiela ŝtono. Kaj la fonteto, kiu aperis en la mezo, havis miraklajn ecojn. Se vi ĉerpas akvon el ĝi en la ĝusta tempo de la jaro kaj en la ĝusta horo, tiam la akvo fariĝas "viva" kaj povas meti iun ajn sur siajn piedojn kaj doni forton, ĉu ĝi estas iu vivanta estaĵo aŭ la spirito de la Tero.

Baldaŭ ĝustatempe li malkovris ĉi tiun lokon. Kaj Vodjan divenis pri la mirindaj proprajoj de la fonto. Kaj ĉiuj tri faris teruran ĵuron: neniam rakontu al iu ajn pri ĉi tiu loko kaj ĝiaj proprajoj, kaj uzu la miraklan akvon nur en la plej ekstremaj kazoj. Ja nur la Kreinto povas doni kaj forpreni vivon. Neniu alia sur la Tero havas tian potencon, kaj tiuj, kiuj malobservas ĉi tiun leĝon, estas ĉiam severe punitaj.

Do Skor konjektis, ke Leŝij decidis malobei ĉi tiun ĉefan leĝon de ekzisto, sed tio ne timigis lin. Li estis preta doni eĉ sian vivon por Leŝij.

La du Spiritoj de la Tero frostiĝis, kiel ŝtonaj statuoj super fendego, el kiu fluis rojeto. Ili ne parolis. Ili staris silente kaj atendis la ĝustan momenton, kiam la akvo akiros mirindajn ecojn. Ili havis nenien por rapidi. Ili povus stari tiel dum jarcentoj, ĉar la tempo ne estas la esenco por ili. Sed, kompreneble, ĝi ne daŭris tiom longe. Nur kelkaj tagoj pasis, kaj por ili estis nur mallonga momento, kaj la leda botelo estis plenigita.

La Leŝij silente rigardis en la okulojn de Skor. Ili ne bezonis vortojn, ĉar penso por la spirito de la Tero havas la saman klaran kaj kompreneblan formon kiel vortoj por homoj. Kaj Skor nevole ekstremis, ĉar tio, kion li aŭdis, estis nepensebla en lia kompreno, sed, kiel mi diris supre, li estis fidela al Leŝij ĝis la fino.

Kara leganto, kompreneble, estas perpleksa, kion Leŝij diris al Skor? Nu, bone, mi konsentas. Ni bezonas iom da klareco ĉi tie.

Leŝij laŭvorte elpensis la jenon: memorante perfekte la duan civilizon kaj kiel la gigantoj rezistis al la venenaj lacertoj (kiuj, kiel vi memoras, estis eligitaj), Leŝij decidis "elbati kojnon per kojno." Li decidis fari nekredeble riskan (ĉefe por si) paŝon. Trovu kaj veku unu aŭ plurajn inteligentajn loĝantojn de la dua civilizado kaj per tio ekvilibrigu la potenc-ekvilibron. Li tute bone komprenis, ke homoj sole ne povas plu vivi, kaj ilia civilizado simple estus kondamnita al formorto, kiel ĉiuj vivaĵoj. Sed li ne povis simple lasi siajn belajn havaĵojn denove pereji. Leŝij estis romantikulo! Kaj li estis preta aperi antaŭ la tribunalo de la Plejaltulo, sed ne lasi siajn ŝatatajn arbarojn malaperi.

Skor ĉion ĉi perfekte komprenis. Li estis huligano kaj bruemulo. Sed la volo de la Plejaltulo! Hmmm! Ĉi tio estos lia plej riska ludo dum lia surtera vivo. Rapide digestinte ĉion ĉi, li faris nur unu demandon: "Kien ni iru kaj kiel ni venos tien?"

Leŝij ridetis. Li atendis nenion malpli de sia fidela Skor.

"Kaj ni uzos la afablan permeson de Alaj. Li iam donis al mi la permeson uzi siajn subterajn instalaĵojn se necese! Li eĉ diris karajn vortojn por moviĝi laŭ ĝiaj strangaj riveroj!" - gaje respondis Leŝij. Ne estis dubo. Proksime estas fidela asistanto, do antaŭen!

"Mi scias, ke estas unu descendo en la posedaĵojn de Alaj proksime!" - Leŝij montris per mano direkton kaj movis antaŭen. Skor rapidis post li. Estas multe da malfacila laboro antaŭe, ni devas rapidi.

Trovinte la descendon en la penatojn de Alaj, ne sen malfacileco, Leŝij kaj Skor multe laboris por penetri tien. Alaj defendis siajn havaĵojn konsciencie. Eĉ sciante la trezoran pasvorton, la du spiritoj elspezis multe da energio, sed kiel rezulto ili okazis subteraj. Kaj nun restis nur trovi "veturilon", kaj tiuj, kiel vi memoras, estis "boatoj". Flosante sur tia boato, ŝajnus, tre sensignifa distanco, la vojaĝanto trovis sin tre, tre malproksime de la loko, kie li suriris la ŝipon. Por mortuloj tio estis, kompreneble, miraklo, sed niaj vojaĝantoj, feliĉe, ne estis tiaj, kaj tiaj movoj en la spaco estis ordinaraj por ili. En la domajno de Leŝij, tiaj "portaloj" (laŭ homaj esprimoj) estis kavaĵoj en grandaj arboj. Kaj la spiritoj de la arbaro tiel facile kovris vastajn distancojn.

Jen rivera transporto estis trovita. Kaj Leŝij kun Skor komencis sian subteran vojaĝon. Estis nekutime por ili esti en la mallumo de la tera internaĵo, ĉar ambaŭ el ili kutimis al arbaraj vastaĵoj kaj lumo, eĉ lunlumo kaj stellumo, sed lumo. Kaj ĉi tie regis mallumo kaj silento. Kvankam la Leŝij estis la Supera Spirito, li tamen tre timis, ke ili maltrafis la ĝustan lokon, sed, kompreneble, li ne montris tion. Aŭtoritato antaŭ subuloj devis esti konservita.

Kaj tiam Leŝij rimarkis, ke ili preskaŭ venis. Necesis iri borden. Ĉirkaŭe estis nepenetrebla mallumo. Sed por la spiritoj de la Tero tio ne estas problemo. Eĉ se ili al kutimiĝis al la lumo, se necese, ili povis vidi en la mallumo ne pli malbone ol arbaraj katoj. Plue la vojo kuŝis laŭ la perpendikulara al la rivero kaj kaverno. La Leŝij sentis, ke ili iras ĝuste, sed li ne povis kompreni nur unu aferon — kiel la gigantoj de la dua epoko trapasis tiel mallarĝajn trairejojn? Estis du ebloj: aŭ la terkrusto suferis ŝanĝojn, aŭ estis alia vojo. Nu, jes, estos klare, kion diveni nun. Kun ĉiu turniĝo la kaverno fariĝis ĉiam pli altnivela labirinto. Alaj faris ĉion glorie. Estis simple neeble por hazarda vojaĝanto veni ĉi tien. Longe ili serpentumis laŭ senfinaj ŝtonkurboj kaj fine ili alvenis. ♦

Ĉe mia katino

Laure PATAS D'ILLIERS



Mia katino nomiĝas Glut ĉar mi taksas ĝin glutema. Ŝajnas ke ĝi ne konsentas pri tio, ĉar ĝi neniam venas kiam mi vokas ĝin laŭnome. Krom kiam mi vokas al manĝo, kompreneble.

La urba administracio konstruigis grandan domon kiu enhavas multajn malmultekostajn loĝejojn por studentoj, metilernantoj kaj junaj laborantoj. Hodiaŭ Glut kaj mi enhejmiĝas. Mi alvenas tien, portante en unu mano la vimenan kaĝon de Glut kaj trenante mian rulvalizon per la alia mano. Miaj paŝoj eĥas en la silenta enirhalo. Sur muro afiŝiĝas detala regularo pri la domo. La teretaĝo estas komuna, ĝi enhavas enirhalon, ejon por la diverstipaj rubuoj, ejon por bicikloj kaj skutiloj. Respektu la celon de ĉiu ejo! La konstruaĵo enhavas sep etaĝojn, po ses loĝejoj en ĉiu etaĝo, krom en la sepa etaĝo, kie estas nur du. Via loĝejo estas rigore unupersona. Ĝi estas meblita kaj ekipita de ĉiaj necesajoj por ĉiutaga vivo, vi rajtas nek aldoni, nek ŝanĝi nek forigi ion ajn, ekzemple ne prempinglu bildojn. Sur la muro apud la regularo, petolulo skribis per larĝa ruĝa feltokrajono "kaj estas malpermesite skribaĉi sur la muroj".

Laŭ la mesaĝo ricevita de la urbodomo, mi ricevas loĝejon numero 37. Facila kalkulo komprenigas min ke mia celo kuŝas en la sepa etaĝo. Atinginte ĝin, anhele mi pensas ke mi ne bezonos iri al sportejo: la ĉiutaga ŝtupargrimpado sufiĉos kiel sporto. La sepa kaj lasta etaĝo estas malvasta kaj enhavas du pordojn kun etiketoj 37 kaj 38. Mia loĝejo estas unuĉambra, malgranda, kun dekliva plafono, sed hela kaj kvietita. Glut ĉie esploras kaj flaras kun malfida paŭto. Poste ĝi elektas surŝrankan observejon, kie ĝi buliĝas. Mi malfermas la fenestron por aerumi. Ekstere estas eta balkono, nur sufiĉe larĝa por ke mi povu stari. Mi kubutapogiĝas. Maldekstre videblas la samaspekta fenestro de la najbara loĝejo. Malgrandas la interspaco inter la du balkonaj balustradoj. Ne eblas vidi ene de la alia fenestro ĉar la kurtenoj estas fermitaj.

Kiel ĉiuj katamantoj, mi loĝas ĉe mia katino, ne ĝi ĉe mi. Bonŝance Glut iom post iom alkiutimiĝas al sia nova hejmo. Ankaŭ mi sentas min bone ĉi tie.

Iun nokton, mi vekigiĝas pro bruo. Mi algluas mian orelon al la muro. Aliflanke, en la najbara loĝejo, iu paŝas. Ĝis nun mi aŭdis nenion kaj kredis la loĝejon vakan. Videble enhejmiĝis novulo. Sekvamatene mi frapas ĉe la pordo 38 por konatiĝi. Mi scivolemas. Ĉu ina, ĉu malina? Kiel ri aspektas? Ĉu simpatia? Sed mi frustrigiĝas ĉar ne estas respondo kaj neniu bruo aŭdiĝas. Poste neniam plu aŭdiĝas bruo, nek nokte nek tage.

Iun vesperon, malŝlosinte mian pordon, mi surpriziĝas ĉar Glut ne aliras min, kiel kutime, ronronante kaj frotante sin al miaj piedartikoj. Ĉu ĝi frakasis ion kaj kaŝiĝas por eviti punon? Neniu katino sub la lito, nek en la aliaj katkaŝejoj. La fenestro estas duone malfermita, probable mi malzorge fermis ĝin ĉi-matene. Mi panikas, ĉu Glut trafenestre

falis? Mi kuras, tutmalfermas, ĉirkaŭrigardas. Fu! Jen ĝi! Glut estas sur la najbara balkono. Ĝi saltis de mia balkono al la najbara. Mi vokas ĝin. Ĝi respondas per malforta ĝemo. Per dolĉa voĉo mi provas trankviligi kaj venigi ĝin. Vane. Ĝi tro timas por salti revenen. Eĉ balailo traŝovita inter la du balustradoj ne sufiĉas por rekuraĝigi la tremantan katinon. Kion fari?

Mi eliras el mia loĝejo sur la etaĝan plataĵon. Mi frapas kaj frapegas sur la pordo. Nenio okazas. La najbaro malĉeestas. Mi nepre malfermu tiun damnan pordon! Se hazarde... Mi prenas mian propran ŝlosilon, enigas ĝin en la seruron, movas ĝin hazarde, ade, ĝi frotas, skrapas, knaras, ho! La seruro malfermiĝas! La seruroj de la du pordoj tre similas, ĉar la urbodomo probable instaligis malmultekostajn serurojn dum konstruado. Mi eniras la loĝejon, kuras, malfermas kurtenojn kaj fenestron kaj enbrakigas mian kompatindan katinon.

Glut kaj mi sidiĝas sur la tiean liton por kvietiĝi post la fortaj emocioj. Glut ronronas kaj mi karesadas ĝian kapon kaj dorson. Mi senpripense ĉirkaŭrigardas. Mi havas la strangan impreson esti ĉe mi, ĉar ĉiuj mebloj kaj objektoj ekzakte samas. Mi sentas min hejme kaj komforte. Laciĝo invadas min kaj mi endormiĝas.

Kiam mi vekigis, mi ne tuj komprenas ke mi estas dorminta ĉe la najbaro. Ĉirkaŭ mi ĉio aspektas kiel ĉiumatene. La ora sunbrilo gaje heligas la loĝejon. Glut trankvile dormas kontraŭ miaj kruroj. Mi stariĝas, paŝas al la enirpordo, vokas: He Glut! Ek hejmen! Glut ne sekvas min. Ĝi etendas la antaŭajn krurojn antaŭ si, alte levas postaĵon kaj voston, longe streĉiĝas... kaj rebuliĝas sur la lito. Ĝi malfermas okulon. Ni restu ĉi tie, diras la impertinenta rigardo. Kion fari?

Kion volas kato, tion ankaŭ volas katamanto. Mi iras en mian ĝisnunan loĝejon, deprenas niajn aĵojn kaj alportas ilin en nian novan loĝejon. Tio sufiĉe rapidas, ĉar ni malmulte posedas. Ordigante niajn aĵojn, mi rimarkas ke la najbaro alportis nenion. Fakte, estas neniu spuro de iama loĝanto.

Kelkaj tagoj pasas. Glut kaj mi feliĉe vivas en nia nova loĝejo. Mi rapide forgesas ke mi antaŭe loĝis en la alia loĝejo. Mi eltiras la pordajn etiketojn 37 kaj 38 kaj inverse remetas ilin. Tiel, mi konservas mian numeron kaj same faros la najbaro, kiam ri revenos. Se ri iam revenos.

Iam, profunde en la nokto, mi aŭdas bruon sur la etaĝa plataĵo. Ĉu finfine revenas la najbaro? Mi ne aŭdacas malfermi mian pordon kaj montriĝi. Sen ŝalti la lumon, mi kliniĝas kaj gvatas tra la ŝlosiltruo. Glut silente staras ĉe mi kaj volvas sian voston ĉirkaŭ unu el miaj kruroj. Ekstere staras du fortikaj homiĉoj. Unu surŝultre portas ledan brunan sakon, kiu aspektas kiel ilarosako de manlaboranto. Ambaŭ staras kaj murmuris, inspektante la pordojn. Ili iras al la alia pordo. Dum unu minuto aŭdiĝas metalaj sonoj.

Ĉu ankaŭ ili havas malfacilaĵojn kun la seruro? Ĉu domŝtelistoj? Ne, en tia domo estas nenio valora por ŝteli. Finfine, la du homiĉoj malaperas en la alian loĝejon. Nun multaj bruoj aŭdiĝas tra la muro. Oni bruske frapas lignon, faligas aĵojn. Mi timegas. Espereble la du brutuloj ne venos ĉi tien! Post tempo kiu ŝajnas al mi longega, sed probable daŭris nur kelkajn minutojn, mi aŭdas ke la du entrudintoj foriras, fermfrapante la pordon. Tra la ŝlosiltruo mi vidas iliajn dorsojn. Ili kunportas nur la ledan sakon.

La sekvantan matenon, mi ne certas, ĉu la afero vere okazis aŭ ĉu temas pri sonĝo. Ĉirkaŭ mi ĉio estas tiel silenta kaj agrabla kiel kutime. Nepras kontroli. Glut ne sekvas min kaj obstine restas hejme. Ĉirkaŭ la seruro de la alia pordo, la metalo estas iomete difektita. Do mi ne sonĝis. Mi malfermas per mia ŝlosilo. La tuta loĝejo estas en kaoso! Ĉiu meblopordo estas malfermita, ĉiu tirkesto renversita kaj la enhavo surplanken ĵetita. La kusenego kaj matraso de la lito estas disŝiritaj kaj kotonaj pecoj kovras la plankon. Mi staras meze, ŝtonigita. Ĉu estas risko ke la du uloj revenu kaj perfortu min? Ĉu urĝas iri al la policejo? Kion fari?

Mi fermas la pordon kaj revenas hejmen. Mi surlite sidiĝas kaj Glut instalas sin sur miajn genuojn, petante karesojn. Mi ne atentis ĝin. Mi bezonas pripensi. Videble la du fortikuloj serĉis ion kaŝitan de mia najbaro. Kaj ili ne trovis ĝin ĉar ili ne traserĉis la ĝustan loĝejon. Do la serĉitaĵo sendube estas ĉi tie. Re kaj re mi okulinspektas la ĉambron, sed ĉio aspektas tutordinara. Mi agace stariĝas, Glut falas kaj miaŭe protestas. Mi eniras la etan duŝoĉambron. Neniam mi atente ekzamenis ĝin. Mi rigardas ĉie. Sub la duŝokuva rando, staras malalta mureto kovrita de longaj kaheloj. Mi rimarkas ke unu el la kaheloj estas malbone fiksita kaj iom moviĝas je pieda puŝeto. Mi genuiĝas, kvarpiedas, mallevas mian kapon ĝisplanken. Glut ŝoviĝas kontraŭ mi, kredante ke mi ludas je kato. Delikate, mi tuŝas la kahelon kaj eltiras ĝin. Malantaŭe kuŝas malalta kavo sub la duŝokuvo, malhela kaj polva. Mi enigis mian manon kaj ĉirkaŭpalpas. Ho! Jen! De la kavo mi detiras nigran plastan ortangulan sakon.



Mi kunportas la sakon en la vivoĉambron kaj surtabligas ĝin. Glut saltas sur la tablon, flaras la sakon, ternas, sulkas la muzelon, saltas el la tablo. Enestas nenio interesa por katino. Ĉu io por mi? La sako fermiĝas per flanka zipo. Mi malzipas ĝin kaj eligas la enhavon. Monbiletoj! Multege da! Glataj kaj neĉifitaj. Ĉu novaj freŝe eltiritaj de monaŭtomato? Ĉu rabitaj de banko? Ĉu falsaj? Ĉiuokaze, jen fortuna... Kion fari? ♦

LA BELKOLORA KOBRO, KOBRO...

La bela, bunta kobro, kobro,
aperis subite antaŭ mi,
vokis min rekte laŭnome,
pikpikis profunde mian koron.

Pro tiu fea kobro,
mi kverelis kun miaj amikoj,
ĉar mi akceptis sklavecon
kaj forlasis fraŭlecon.


Post kiam la blu-punktita kobro
trafis min interne en la cerbo,
per siaj dolĉaj pikoj,
ĝi apartigis min eĉ de mia patrino.

Poste ni iris en ekzilon,
por fari pli bonan vivon...

Tie ni rapide retrovis nin
en ŝanĝlaboro, tage kaj nokte.

Poste ni fariĝis trio,
sed la tempo, por diablo, disigis nin,
ni lasis fore la hejmon kun la maljunuloj,
sopiro nin pikadas ĉiam pli forte...

La sopiro estas ja kobro kun sonoriloj,
ĝi pikas la animon per memoroj.
Ni revenos al vi, ho patrino,
ĉar vi estas suno, luna kobro!...



Verkis:
Vullnet Mato



Tradukis:
Bardhyl Adem Selimi

MI NE ESTAS TIU

Mi ne estas la virino, kiu enamiĝas ĉiutage.

Mi ne estas tiu, kiu vivas per dolĉaj vortoj
kaj per fremdaj koroj.

Mi ne estas tiu, kiu bruligas sin pro ĉiu incito,
pro vortoj falantaj kiel meteoroj,
kiam ilia celo restas nekonata.

Mi ne estas tiu, kiun ĉiu viro karesu
por ke mi atingu miajn celojn.

Mi ne estas tiu, kies menson aŭ karakteron
la riĉeco korpuras.

Mi ne estas tiu, kiu naĝas sur la maro
per ĉiu fremda boato.

Mi ne estas tiu, kiu detruas grandajn amojn.

Mi ne estas tiu, kiu suferas pro dolĉaj vortoj,
kiuj al iu mankis dum la tuta vivo.

Mi ne estas tiu, kiu en la lito havas viron,
dum en la domo la infanoj turniĝas por plezuro,
kaj aliloke oni verkas amajn versojn,
ĉiutage perfidante

la geedzan liton

per “perloj” kaj virĉevaloj
venditaj tra la jaroj.

Ne.

Mi ne estas tiu, kiu kuras post volupto
balbutata per vortoj.



Verkis:

Prof., poetino, ĵurnalistino:

Kumrie Avdyl Shala



Tradukis:

Bardhyl Adem Selimi

Mi ne estas tiu, kiu kuras post interretaj koroj,
nek post la ondoj kaj la aromoj de la maro,
ĉar la maro alportas ankaŭ ŝlimon.

Mi ne estas tiu virino, kiu ploras
pro korbo da nuksoj
kaj pro meleagro.

Mi ne estas tiu, kiu enamiĝas al ĉiu viro,
kiu teksas versojn por ĉiu.

Mi ne estas resanigo,
nek vundo por ĉiuj.

Mi ne vundas,
ne ekbruligas la animon per mensogoj,
kvazaŭ mi amus.

Ĉar amo ne estas
rajdi foje sur ruĝo, foje sur nigro,
nek foje sur blanka ĉevalo.

Amo estas
kiam ambaŭ havas la saman celon:
purecon, fidon,
kuraĝon kaj decidemon,
por ke neniu povu rompi
ligon puran kiel larmo.
Tio estas la vera amo.



DECEMBRO

La ŝanĝo en tri datoj: subite festenoj!

Persona ciklo ĉirkaŭ Suno:

inaŭguriĝas mi la dek-sepan.

Semajne post ekzakte

naskiĝtagas Jeŝuo Sananda Jesuo,

dato planeda, danco, ŝanĝo.

La dudek-kvaran ŝanĝas mi, ŝanĝas ĉio, Amo-Lumo.

Posta semajno ekzakte nova jaro, nova kalendaro

antaŭeniras tempa kalkulo

la tridek-unuan: brakume ni estas unu.

La unuan de Januaro

brakumoj, kisoj, promesoj.

volonte – kareson!



PAULO P NASCENTES



Virino

Ŝia radianco ne kuŝas en ŝia robo,
nek en la oro kiu briletas en ŝiaj manoj,
nek en rideto pentrita
por momento al la mondo.

Ŝia beleco vivas en ŝia rigardo,
en la lumo kiu fluas el profundeco de interno,
kie la koro, kiel ĝardeno,
nutras la florojn de tenereco.

La okuloj estas la pordego
malantaŭ kiu loĝas amo -
delikata, tamen forta,
kapabla transformi tagojn en miraklojn.

Virino estas silento kaj ŝtormo,
mildeco kaj kuraĝo interplektitaj kiel unu,
manoj kiuj resanigas,
kaj koro kiu neniam ĉesas doni.



Paweł Szamborski
Subtenantoj de poezio kaj arto.



Tradukis:
Ryszarda Kwiatkowska



Graĵnoj de Tempo

Tempo forglitas kiel sablo en glaso,
Ĉiu momento kiu atendas nin,
Estas kiel graĵno kiu malaperas,
Ĝi formas novan vojon por ni.

Kiel freŝa printempa mateno,
Tiam varma somera girlando,
Aŭtuno pentras siajn foliojn,
Vintro baldaŭ haltigas ĉion.

Kaptu la momenton dum vi estas juna,
Vi ne povas eviti malbonan veteron,
Ĉar la sablohorloĝo elĉerpiĝos,
Iun tagon ĝi fine kovros nin.



Paweł Szamborski



Tradukis:
Ryszarda Kwiatkowska





Tia simpla penso

Dum Kristnasko, ĝi boras en mian kapon

Ke ĉiun Kristnaskon

Ĉi tio estas demando pri la stato de la koro

Kiam la silenta stalo unuigas nin

Ni sentas unu malgrandan momenton

Ke niaj koroj ankoraŭ spiras

Ke ne ĉio malmoliĝis

Ke malgranda punkto restas, fendeto

Kie almenaŭ unu ora sparko

El kiu subite komenciĝas

Flamo de espero kaj boneco

Rigardu, ni denove estas sepjaraj

En la lulilo, la Virgulino karesas sian Filon

Intelekta malriĉeco ĉirkaŭas nin

Sed la blanka tablo akceptos ĉiujn

Estas granda grupo de ni ĉirkaŭ ĝi

Kaj kvankam nuda, tamen gaja

Kaj via patrino - tiel bela

Ŝi brakumas vin sub la visko



Wojciech Młynarski



Tradukis:

Ryszarda Kwiatkowska

Ĉu vi memoras ĉi tion, vi sentis tremojn
Ĝi signifas, ke vi ne perdiĝos en la homamaso
Vi estis kortuŝita, vi vivos pli longe
Kaj kelkajn aferojn en via koro Vi komprenos

Ĉar verŝajne estas iom da vero en ĝi
Ke Kristnasko estas tapiŝo el blankaj kampoj
Ĉi tio estas magia operacio
Farita sur malferma koro

Kun ĉi tiu koro, ĉiam estas malnova problemo
Malvarmo, malvarmo, malfacilas marŝi,
Do tia proceduro estos utila por ĝi
Je Kristnasko, kiam Kristo naskiĝos

Antaŭ ol amasiĝos tiom da problemoj
Kiuj ĉiam estis, estas kaj estos
Malfermu vian koron kaj por momento
Provu resanigi ĝin per kristnaska kanto...




PIFU

PIFU iras al Marso



Csaba S Németh





Tute ne... ĉi tio ne estas ludo... vi devas al kutimiĝi elteni ĉiujn fizikajn fortojn. Provu, ekzemple, la centrifugilon.



Senŝerce, ĉu vi serioze preparas vin por vojaĝo al Marso?

Plej serioze!

Komprenoble!



Tiam ankaŭ mi komencos la trejnadon... Mi iras kun Piŝu... Mi gvidos la kosmoŝipon!



Ĉu konsentite?! Mi havas la prioritaton en ĉio!



Bone, bone!

Ĉu ankoraŭ?



Pli rapide, ĉiam pli rapide!

Hi-hi-hi



Do... kaj...
...sed...
...Marso...
...Marso!

Do vi bezonas kosmoŝipon, kiu iras al Marso. Bagatelo!



Hm... ni vidu... lasu min pensi... Mi ĝuste nun laboras pri nova kosmoŝipo...



Se miaj eksperimentoj sukcesas, mi povus konstrui pli potencajn kaj...

...do povas komenci la 'Marsmision'!



Vi povas komenci la kosmonaŭtajn trejnadojn... Lulu kaj Zezett helpos vin. Ĝis!

Kun plezuro!

Tre volonte!

Hura!




LA SEKVA TAGO

Ni vidu, kie estas lia kosma frenezo?!







Finigu la trejnadon! Mia eksperimenta raketo pretas por lanĉo... Venu!



Ŭaŭ!



Kuru ien ajn!... eksperimento estas ĉiam danĝera!

Retronombrado komenciĝas!

Ŭaŭ!

5... 4... 3...
2... 1...



NULO!

WRAOUFF



HURA!!!
!!

La lanĉo sukcesis!



Bravo!

Ĉio ordas... Bonege...
...la unua ŝtupo nun disiĝas!

CLAP
CLAP
CLAP



Nun venas la dua etaĝo!
Kiel ekscite!



La raketkabino disiĝis, ĝi komencas fali...
Ajajaj!
La paraŝuto ne malfermiĝis!
?!



Nu ne! Ne trian fojon sur mian kapon...



Uf! Ĉi-foje mi havis bonŝancon!



Mia kompatinda eta Pifu... viaj esperoj vojaĝi al Marso forvaporigis!



Ni ne bezonas kosmo-raketon, FLUGANTA SUBTASO ESTAS NECESA!

Vi pravas! Kiam oni parolas pri marsanoj, oni tuj pensas pri subtaso... Al la laboro!!



UNU SEMAJNON POSTE...

Bela eta subtaso ĝi fariĝis... flulinia, gracia, sed la motoro... Kiel ĝi supreniros?! Kiu havas bonan ideon?



Ni vidu...

supren... ĉirkaŭe... supren... rapide...



MI ELPENSIS!



Kaj tiam.....turnigi.....
.....turnrapido...



Mi komprenas.
La funkciadprincipo de turnigilo!



Genia ideo! Mi kuras por la aŭto... eniĝu! Lulu kaj Zezett, rapide ŝnuron



Kulpigu vin mem, se ni falos!

Kia mirindaĵo!





Intervjuo kun Csaba S. Németh

Erika Godó



Csaba S Németh

1. Kiel vi koncize prezentus vin kaj vian laboron?

Tre malofte mi laboras laŭ la kutima, „klasika” ritmo, ĉar mi plej volonte okupiĝas pri komputiko kaj Esperanto. Mi naskiĝis en Sopron, kaj je la aĝo de 15 jaroj mi memlerne eklernis Esperanton. Poste mi diplomiĝis kiel instruisto ĉe la universitato, en la katedro gvidata de Katalin Kováts. Kvankam mi neniam (nur unu jaron) laboras kiel instruisto, mi ĝoje kreas lernhelpajn materialojn kaj ilojn — tiu instruista impulso restis en mi. Mia "laboro" estas prezentita en <https://www.facebook.com/ridomondo> kaj en <https://www.youtube.com/@eoawe> (bildostrioj, amuzaj bildoj kaj muziko). Mia alia Esperanto "laboro" estas mia eldonejo (Modern Alkotók és Gondolkodók Asztaltársasága Magyarországon), kie mi aperigas tradukojn kaj originajn verkojn <https://ko-fi.com/alkotok>

2, Kiam, kaj kial vi komencis uzi AI por kreiva laboro?

Preskaŭ tuj, kiam mi unuafoje aŭdis pri ĝi. Komence mi ekuzis ĝin por pruvi al mi mem, ke tia „AI” ne povus vere ekzisti — sed la sperto finiĝis per tio, ke mi devis revizii mian difinon pri homa inteligenteco. Pri la “kial” mi ne estas tute certa; tamen, se mi devas formuli ĝin ĝenerale, mi dirus: "la kreado mem ĝojigas".

3, Ĉu vi unue komencis kun muziko aŭ komiksoj - kaj kial?

Fakte nek kun muziko, nek kun komiksoj. Mi komencis unue per poemoj kaj romanoj. Per poemoj mi atingis surprize belajn rezultojn, kvankam tiuj tekstoj estis ĉiuj en la hungara.

Muzikon mi ekfaris pro tio, ke mi kaj en la aŭto kaj hejme volonte aŭskultas profesion, nuntempan muzikon — tian “radio-kvalitan”. Tio ankaŭ estis la ĉefa celo: krei profesie sonantajn kantojn, kiuj eĉ povus esti ludataj en radio. Poste mia celo fariĝis ĉiam pli perfekta prononco; en tio Blazio Vaha multe helpis, ĉar dank’ al liaj tre trafaj rimarkoj mi povis plibonigi multajn detalojn.

Komiksojn mi komencis fari simple ĉar mi ŝatas legi komiksojn — kaj en Esperanto tio estas duobla plezuro.

4, Kiajn specojn de AI-modeloj vi uzas (ekz. generaj modeloj, lingvaj modeloj)?

Ĝenerale mi provas uzi la plej novajn modelojn, kaj kiam aperas io nova (krom Grok, ĉar nazia Elon Musk por mi estas neakceptebla), mi kutime testas ĝin. Estas tamen unu platformo, kiun mi evitas pro personaj/etikaj konsideroj. Nuntempe mi ĉefe uzas ChatGPT, Gemini kaj Suno — en ĉiu el ili la plej progresintajn modelojn, por kiuj mi pagas monate. Por la komiksoj mi plejofte uzas la modelon Gemini “Nano Banana”.

5, Ĉu vi konstruas vian propran sistemon aŭ uzas ekzistantajn ilojn?

Mi ĉefe uzas ekzistantajn ilojn (kiel mi jam menciis), sed mi ankaŭ kreas celprogramojn por mi mem en Python. Mi rulas ilin en Visual Studio Code, kaj ili kutime solvas unu konkretan taskon — ekzemple bildformatadon, akcentadon de Esperanto-tekstoj por SUNO, aŭ la dispecigon kaj rekunmeton de EPUB-dosieroj, ktp. ktp.

6, Kiom AI bezonas esti "programita" por esti kreiva?

Laŭ mi, surprize malmulte. La baza "kreivo" jam estas en la trejnita modelo: ĝi kapablas kombini konatajn elementojn en novajn aranĝojn eĉ sen speciala agordo. Sed por ke la rezulto estu vere utila kaj konsekvenca, oni ja devas "programi" ĝin en pli vasta senco: per bona prompto, klaraj limigoj, referencoj, ekzemploj, kaj ripeta rafinado. Do ne temas pri multe da kodo, sed pri bone difinita kadro — ju pli precize oni difinas la celon kaj la stilon, des pli "kreiva" ĝi aspektas, ĉar ĝi malpli vagas kaj pli celtrafe inventas.

7, Kie estas la homa rolo en la procezo: ideo, fajnagordo, selektado?

Por mi la homa rolo estas ĉie, sed precipe en tri punktoj: en la intenco, en la gusto, kaj en la respondeco. La ideo aŭ direkto venas de la homo: kion mi volas esprimi, al kiu publiko, en kia tono. Poste la fajnagordo estas esence homa laboro: precizigi la kondiĉojn, klarigi la stilon, korekti mispaŝojn, kaj gvidi la modelon ĝis ĝi trafas la celon. Fine, la selektado estas eble la plej grava: elekti inter alternativoj, rekoni kio vere funkcias, kaj kio estas nur "impona sed malplena". Al povas generi multon; la homo decidas kio meritas resti, kaj kiel ĝi estu prezentata.

8, Kiel kreado per AI diferencas de tradicia cifereca laborfluo?

En tradicia cifereca laborfluo vi konstruas la rezulton paŝon post paŝo: vi planas, vi faras, vi korektas, kaj ĉiu ŝanĝo kutime postulas rektan manlaboron aŭ teknikan kapablon. Kun AI la komenca "nula punkto" estas multe pli rapida: en kelkaj sekundoj vi ricevas skizon, variaĵojn aŭ eĉ preskaŭ pretan proponon. Tio ŝanĝas la ritmon: malpli da rutina produktado, pli da direktado kaj redaktado. Alia grava diferenco estas la rolo de variado. Tradicie variaĵoj kostas tempon; ĉe AI ili preskaŭ estas senkostaj, do la procezo fariĝas pli esplora: oni petas plurajn versiojn, komparas, miksas, kaj elektas. Samtempe kreskas la bezono je homa kontrolo: pri faktoj, stilo, konsekvenco, kaj kvalito. Resume: la tradicia fluo estas "farado", dum AI-fluo pli similas al "kunlaboro kaj kuratorado" — vi gvidas, taksas, kaj finpoluras.

9, Kiel AI "lernas" krei muzikon?

Ĝi "lernas" el tre granda kvanto da muzika materialo: sonoj, stiloj, ĝenroj, ritmaj kaj harmoniaj aranĝoj, kaj ofte ankaŭ priskriboj (ekz. etoso, instrumentoj, voĉtipo). Dum la trejnado ĝi ne memoras kantojn kiel homoj, sed kaptas ripetiĝantajn regulecojn: kiaj ritmoj funkcias en certa ĝenro, kiel melodioj kutime kondukas al refreno, kiaj akordprogresoj sonas "nature", kiel instrumentoj kunekzistas en mikسادo, kaj similaj aferoj. Kiam vi poste petas muzikon per prompto, la modelo uzas tiun gvidilon por elekti el la lernitaj ŝablonoj kaj kunmeti novan, koheran rezulton. Oni povas imagi ĝin kiel tre rapidan "komponiston", kiu havas enorman internan bibliotekon de stilaj kutimoj — kaj laŭ la instrukcioj ĝi provas krei ion, kio sonas konvinke en tiu kadro. Sed la vera magio ofte okazas en la homa parto: kiel vi priskribas la celon, kiom precize, kaj kiel vi elektas kaj poluras la plej bonajn versiojn.

10, Ĉu ĝi povas miksi stilojn aŭ ĉu ĝi prefere imitas?

Ĝi ne imitas en la simpla senco de “kopii” konkretan kanton aŭ artiston. La modelo ne elprenas ekzistantan pecon kaj refaras ĝin; ĝi generas novan rezulton el lernitaj ŝablonoj: ritmoj, harmoniaj kutimoj, sonkoloroj, aranĝaj manieroj kaj formoj, kiuj oftas en certa ĝenro aŭ epoko. Do la mekanismo estas pli “kombini el regulecoj” ol “reprodukti”. Tamen la rezulto foje povas soni imite, precipe kiam la prompto estas tro ĝenerala aŭ nur stil-etikedo. En tia kazo la modelo emas elekti la plej tipajn, “meznombrajn” solvojn, kaj tio povas ŝajni kliŝa aŭ “kvazaŭ en la stilo de iu”. Ju pli mi donas al ĝi proprajn, konkretajn gvidilojn (temo, strukturo, limigoj, specifaj trajtoj), des malpli la muziko sonas kiel imito, kaj des pli ĝi aspektas kiel originala miksado.

11, Ĉu AI iam surprizis vin per vere bona muzika ideo?

En muziko, ne vere — la baza ideo ĉiam venas de mi. En aliaj temoj ja okazis, ke ĝi donis utilan ideon, sed tion mi plejparte klarigus per tio, ke ĝi havas tre vastan konaron pri la koncerna temo. Se mi petas de modelo nur “ideojn” aŭ cerbumadon, ĝi plejofte liveras sufiĉe ŝablonajn kaj ripetiĝemajn proponojn. Do, pri “AI-ideo” mi ĝis nun ne estis vere surprizita. Tamen, se ni interpretas la vorton “ideo” pli vaste kaj enkalkulas ankaŭ la realigon dum la kreo de bildoj aŭ muziko, tiam jes. Ĉe muziko kaj bildoj mi regule miras pri la inventemo de la efektivigo: kiel ĝi solvas aranĝon, sonon, atmosferon aŭ vidan detalon en maniero, pri kiu mi mem ne pensis.

12, Ĉu vi pensas, ke eblas transdoni emociojn per muziko generita de AI?

Jes, mi scias, ke tio eblas — ĉar mi mem plurfoje spertis ĝin. AI-generita muziko ja povas vekti en mi sentojn: ĝojon, nostalgion, melankolion, eksciton aŭ trankvilon. Do, laŭ simpla, praktika kriterio ĝi funkcias: se ĝi kapablas tuŝi la aŭskultanton, tiam ĝi ja transdonas emocion. Kompreneble, la emocio ne nepre venas el “sentoj” de la modelo mem, sed el la muzikaj rimedoj, kiujn ĝi bone manipulas: harmonioj, tensio kaj malstreĉo, ritmo, dinamiko, voĉkoloro, kaj la maniero konstrui kulminojn. Kaj ĉar mi kiel homo donas la direkton (temo, etoso, stilo) kaj elektas el pluraj versioj, la fina rezulto ofte estas surprize “hom-simila” en sia emocia efiko. En la fino, por la aŭskultanto gravas ne la interna stato de la kreinto, sed kion la muziko efektive vekas en li.

13, Kiel AI helpas en kreado de bildliteraturo: desegnado, rakonto, roluloj?

En mia kazo ĝi helpas preskaŭ en ĉiu paŝo, ĉar mi faras ĉion per Nano Banana. Mi elektis unu ĉefan modelon ĝuste pro tio, ke tiel mi povas teni pli bonan vidan koheron: la sama stilo, simila lumigo, koloroj, linia karaktero — kaj, plej grave, la roluloj restas rekoneblaj de panelo al panelo.

14, Kiu decidas la direkton de la rakonto: vi aŭ la AI?

Ĉiam mi. La direkto de la rakonto — la temo, la mesaĝo, la ritmo, la sinsekvo de scenoj, kaj tio, kion mi volas ke la leganto sentu aŭ komprenu — estas mia decido. AI por mi ne estas “kun-aŭtoro”, kiu memstare kondukas la intrigon, sed ilo, kiu helpas realigi jam elektitan vojon. Kompreneble, mi povas uzi ĝin por provi alternativojn: ekzemple demandi pri eblaj scen-aranĝoj, pri dialogaj variantoj, aŭ pri tio, kiel pli klare montri transiron inter du momentoj. Sed tio estas pli kiel cerbumado aŭ testado. Mi elektas, kio kongruas kun mia koncepto, kaj mi forĵetas, kio ne servas al la rakonto. Do la AI povas proponi, sed la “kompaso” ĉiam estas en mia mano: mi decidas la celon, kaj mi kontrolas la tutan konstruon ĝis la fina formo.

15, Kiom kohera estas AI en pli longaj rakontoj?

En pli longaj rakontoj mi kutime certigas koheron per la laborfluo, ĉar mi ne provas krei ĉion “tutseance”. Mi laboras paĝon post paĝo, do mi faras nur pli mallongajn, bone regatajn partojn: unu paĝo, kelkaj paneloj, unu konkreta sceno. Tiel la procezo fariĝas pli redakta: mi finpretigas la aktualan parton, kontrolas ĝin, fajnagordas, kaj nur poste iras plu. Tiu disigo helpas je pluraj niveloj. Rakonte, mi povas teni sub kontrolo la logikon kaj la ritmon, kaj tuj korekti, se aperas salto, malklareco aŭ nekongruo. Vide, estas pli facile konservi stabilan stilon kaj rekoneblajn rolulojn, ĉar mi konstante komparas kun la jam establitaj bildoj kaj referas panelon, se io “drivas”. Kaj praktike, la paĝa metodo donas klarajn kontrolpunktojn: ĉiu paĝo fariĝas memstara etapo, kiun mi povas poluri ĝis ĝi vere funkcias.


16, Kiel AI ŝanĝis vian vidpunkton pri vida kreivo? Lingvo, Kulturo, Esperanto (se vi volas igi ĝin speciala)

Antaŭe mi pensis, ke desegni, kanti kaj ĝenerale krei estas kvazaŭ privilegio de tiuj, kiuj jam nature havas “miraklan” voĉon, aŭ vere elstaran desegnokapablon. Mi respektis tion, sed samtempe mi sentis, ke inter la ideo en mia kapo kaj la reala, videbla/aŭdebla rezulto staras tre alta barilo. Kun la hodiaŭa, modula AI-tutmonda ilaro tiu barilo forte malaltiĝis. Ne ĉar la talento subite fariĝis senvalora, sed ĉar la vojo al esprimo malfermiĝis: eblas preni ideon, etoson, bildon aŭ rakontan intencon, kaj relative rapide doni al ĝi formon. Tiel, en certa senco, preskaŭ ĉiu povas fariĝi kreanto — almenaŭ tiom, ke li povas sperti la ĝojon de kreado kaj montri ion al aliaj. Kaj tamen mia vidpunkto pri kreivo mem ne “ŝanĝiĝis”; pli ĝuste, malfermiĝis la ebloj. La homa parto restas decida: la gusto, la elektoj, la direkto, la fajnaj detaloj, la pacienco por poluri. AI ne donas al mi anstataŭan vivon; ĝi donas al mi pli larĝan spacon por realigi tion, kion mi jam volis fari. Se mi aldonas la dimension de lingvo kaj kulturo: por Esperanto tio estas aparte interesa. Ĝi ebligas, ke enhavo en nia lingvo aperu en “radio-kvalita” muziko aŭ en alloga bildliteraturo, eĉ se ni ne estas profesiaj kantistoj aŭ desegnistoj. Tio ne nur estas teknika helpo — ĝi estas ŝanco, ke Esperanto estu pli videbla, pli aŭdebla, kaj pli natura parto de nuntempa kreado.

17, Kion vi pensas: ĉu AI povas helpi pli malgrandajn lingvojn pluvivi?

Jes, mi scias, ke ĝi povas helpi — kaj fakte ĝuste tio estas unu el la plej interesaj flankoj de la tuta afero. Malgrandaj lingvoj ofte ne mankas je valoro aŭ beleco; ili pli ofte mankas je rimedoj: malpli da enhavo, malpli da profesiaj produktantoj, pli alta “enirbaro” por krei ion allogan kaj moderne prezentitan. AI povas malaltigi tiun baron. Unue, ĝi helpas pri produktado de enhavo: teksto, tradukado, redaktado, subtekstoj, voĉo, bildoj — ĉiuj tiuj aferoj fariĝas pli atingeblaj. Se homo havas ideon kaj volon, li povas pli rapide krei materialon en sia lingvo, eĉ se li ne estas profesia verkisto, grafikisto aŭ soniĝeniero. Tio rekte signifas: pli da kantoj, rakontoj, komiksoj, afiŝoj, videoj, lerniloj. Due, ĝi helpas pri kvalito. Por malgrandaj lingvoj la kvalito ofte dependas de malmultaj homoj; se ili mankas, la lingvo aspektas “malpli profesia” en publika spaco. AI ne solvas ĉion, sed ĝi povas helpi poluri: korekti, stiligi, proponi alternativojn, teni konsekvencon — kompreneble kun homa kontrolo. Trie, ĝi helpas pri videbleco kaj ĉiutaga uzebleco. Lingvo vivas, kiam oni uzas ĝin por realaj aferoj: krei, komuniki, amuziĝi, lerni. Se AI faciligas tion, la lingvo ricevas pli da ŝancoj esti uzata, kaj ne nur “konservata”. Sed estas ankaŭ kondiĉo: por ke AI vere helpu, la komunumo devas aktive produkti bonajn ekzemplojn, korekti erarojn, krei datumojn, kaj “eduki” la ilojn per uzo. Do mi vidas AI-on kiel ŝancon, ne kiel aŭtomatan savilon — sed kiel ŝancon, kiu povas esti tre potenca, se ni bone utiligas ĝin.

18. Kiel vi taksas la nunajn AI-ilojn kompare kun homoj rilate al la kvalito de Esperanto (lingva ĝusteco, stilo) kaj al literatura kreado? Kie ili brilas, kaj kie ili ankoraŭ eraras?



Laŭ mia sperto, la nunaj AI-iloj povas esti tre utilaj por Esperanto, sed ili ankoraŭ ne anstataŭas realan homan lingvosenton kaj literaturan guston. Ili ofte brilas kiam temas pri rapido kaj amplekso: ili proponas alternativajn frazojn, helpas glatigi stilon, sugestas sinonimojn, strukturojn, eĉ skizojn de tekstoj, kaj ili bone subtenas rutinojn kiel resumaĵoj, redaktado, aŭ tradukaj komencaj versioj. Por lernantoj aŭ por praktika verkado tio povas esti granda helpo, ĉar oni rapide ricevas laboran materialon, kiun poste eblas poluri. Sed ili ankoraŭ eraras en la pli subtilaj tavoloj. Pri idiomeco kaj nuanco foje la frazo estas gramatike ĝusta, sed sonas iom "artefarite", tro librostile aŭ inverse tro ĝenerale. Pri konsekvenco kaj registro ili povas miksi tonojn, aŭ perdi la elektitan stilon post kelkaj alineoj. En literatura kreado ili kapablas krei belajn momentojn, sed ofte emas al ŝablonoj, al tro facilaj metaforoj, aŭ al impona sed ne vere necesa ornamado. La profunda origina voĉo, la preciza ritmiko, kaj la interna logiko de vere forta teksto ankoraŭ bezonas homan redaktanton. Do por mi la plej bona modelo estas kunlaboro: AI kiel rapida helpanto por proponoj kaj malnetoj, kaj la homo kiel la definitiva arbitracianto pri gusto, signifo, kulturo, kaj kvalito. En Esperanto tio estas aparte grava, ĉar malgranda lingvokomunumo vivas per precizeco, natura stilo, kaj konscia polurado.

19, Kiajn mankojn ili ankoraŭ montras dum prilaborado de esperantaj artaj kaj literaturaj novigoj, kaj kio estas la plej granda defio, kiun ili frontas?

Dum prilaborado de esperantaj artaj kaj literaturaj novigoj, laŭ mi la plej granda manko estas la kapablo konstante teni koheron kaj altan kvaliton tra pli longa procezo. Ofte la problemo aperas ĉe la voĉo kaj stilo: AI povas produkti kelkajn tre belajn frazojn, sed poste ĝi facile glitas al pli ĝenerala, ŝablona lingvaĵo, aŭ miksas registrojn. Rezulte la teksto sonas iom "artefarite", kvazaŭ ĝi ne estus verkita per unu konsekvenca mano. Simile, en pli longaj aŭ kompleksaj tekstoj malfacilas konservi la internan logikon. Detaloj povas ŝanĝiĝi, motivoj malfortiĝi, aŭ la rakonto iĝi serio de bonsonaj alineoj sen vera neceso. Ĉe arta verkado tio rapide sentebblas, ĉar la efiko dependas de tio, ke ĉio kuntenu kaj konduku ien. Estas ankaŭ speco de "mezuma" risiko: se oni ne gvidas la modelon tre precize, ĝi emas elekti la plej verŝajnajn kaj plej sekurajn solvojn. Tio alportas ripetigon kaj kliŝojn, dum novigo bezonas personan decidon, riskon kaj klare difinitan intencon. La plej granda defio, kiun ili frontas, estas do ne la kapablo generi multon, sed la kapablo resti identigeblaj kaj konsekvencaj: teni unu mondeton, unu ritmon, unu voĉon — kaj subteni tion ĝis la fina, polurita formo. En praktiko tio ankoraŭ postulas homan redaktadon kaj guston. ◆

Viro

Albana poezio

(Viro, vi mallumigis mian vivon, kaj mi vian)

Vi, kara anĝelo kaj malfacila diablo,
vi faris laŭ via povo, kiel vi plej bone sciis,
sed ankaŭ mi ne restis kvazaŭ fromaĝo en cindro.

Ni ja kverelis kvazaŭ bovoj kun kornoj,
vi dispecigis mian animon, sed ankaŭ mi la vian;
poste, ambaŭ kulpaj, ni viŝis larmojn,
kaj dormis korpo ĉe korpo ĝis la tagiĝo.

Ofte niaj deziroj estis samaj,
vi eniris mian haŭton kiel abelo en la ĉelon;
sed kiam vi koleriĝis, vi ĵetis min en la riveron,
tiom ke mi preskaŭ mortis pro la deziro vin dronigi en dormo.

Kaj kiam ni ne parolis, kvazaŭ ni ne plu amis,
post la armistico ni senvestigis ĉion;
kion ajn ni diris, ni neniam rememoris,
sed kiel pacan flagon ni starigis la kison.

Viro, vi mallumigis mian vivon, sed ankaŭ mi la vian;
eĉ en alia vivo mi ne volus ion pli bonan.

Ni estas du fremduloj en ĉi tiu tuta spaco,
kiuj militas kiam volas kaj ne konas adiaŭon.




Arjana Fetahu Gaba

Inspirite de la versoj de la granda Petrit Ruka, en la poemo "Virino".



Tradukis: *Bardhyl Adem Selimi*



Esperanto ne falis de l' ĉielo

Ieda Freitas



Ni pensas ke esperanto
falas de l' ĉielo por ni.
Ne! Ĝi falis sur la teron.
Kaj ni, la tuta homaro,
devas danki al Dio
pro la oportuno de lernado
de lingvo tiel bela kaj fleksebla,
kiu proponas al la mondo unuiĝon
surbaze de neŭtrala lingva fundamento,
kontribuante tiel
por la paco
de la tuta homaro.
Lernante Esperanton, kundividu ĝin
kun la mondo
kaj ne lacu sonĝi pri
pli bona homaro.

En Portugala

O Esperanto não caiu
do Céu
Pensamos que o Esperanto
caiu do céu para nós
Não, ele caiu na terra
E nós toda a humanidade
Devemos agradecer a Deus
A oportunidade de aprendizado
De uma língua bela e flexível
Trazendo ao mundo união
Juntamente com um chamado
De um fundamento linguístico neutro
Contribuindo assim para a paz
De toda a humanidade



Brokanta Ĉarmo

Kinga Fabó

Flava, pika. Sepradika.

Okulbalasta.

Pro desinfekto, fetoro. Drasta!

Sen ajno kroma! Vendo brokanta,
vestoj brokintaj.

Kaj de ĉi tie trans la ĉinejon

stiras stink' kaj bunt' mizeren.

Kaŭĉuko. Kondomo lika.

Uzu, ĵetu kaj ekos

odororgi' sensperdiga.

En svena volupt' – fortuneo.

Transdaŭros plian sezonon.

La pimpan jupon – eble. Sed kiam la ŝtrumpo
sin malnodas, klaras:

ĉi tiu model' estas malmoda stumpo.

Elfabrike stria. Trompo

laŭ skal' industria.

Dismaŝiĝ': postrestas strio fia.



Tradukis: *István Ertl*




Ĉiam estas tempo!

Nova jaro venas,
kaj ĝi alportas en siaj valizoj
grandajn problemojn.
La tamburoj de milito
denove sonas laŭte,
kaj la homaro maltrankviliĝas.
Sed estas tempo por novaj ideoj,
estas tempo por novaj fortoj,
estas tempo por novaj vojoj.
Ni ne lasu ĉi tiun teron
denove fariĝi predo
de oportunistoj kaj militinstigantoj.
Ĉiam estas tempo
por tutmonda repaciĝo,
kompreno kaj toleremo.




Andreas Zervas



Poemoj de gajnintoj de la tradicia konkurso de SEL

NOVAKOV ŽIVANKO

LORIJAN POPI



Estas deklaritaj 2025 gajnintoj de la tradicia konkurso de SEL por esperantigo de unu serblingva poemo

La unuan premion gajnis - NOVAKOV ŽIVANKO

La duan premion gajnis - LORIJAN POPI

Pri la premioj decidis internacia ĵurio.

Ni transdonas al vi la etoson de la kunveno okaze de Zamenhof-tago dum kiu estis deklaritaj rezultoj de la konkurso kaj enmanigitaj la premioj.

Ni dankas al ĉiuj kiuj partoprenis la konkurson kaj al tiuj, kiuj kontribuis al konservado kaj evoluigo de la esperanta poezio. Ni esperas, ke la venontjara konkurso kolektos eĉ pli da interesigantoj kaj kreemaj homoj.

Originalo:

КАКО ЖИВИ АНТУНТУН

У десетом селу
Живи Антунтун
У њега је малко
Необичан ум.

Он посао сваки
На свој начин ради:
Јаја за лежење
Он у врту сади.

Кад се јако смрачи,
Он мрак граби лонцем.
Разлупано јаје
Он зашива концем.

Да л' је јело слано,
Он то ухом слуша.
А рибу да пјева
Научити куша.

На ливаду тјера
Бицикл да пасе.
Да му мише лови,
Он затвори прасе.

Гуске сијеном храни,
Снијегом соли овце.
А насади квочку
Да му леже новце.

Кад кроз жито иде
Он сједа у чун.
Сасвим на свој начин
Живи Антунтун.

(Григор Витез)

Unua premio: *Živanko Novakov*

KIEL VIVAS ANSENSEN'

.
Dek vilaĝojn fore
vivas Ansensen',
ulo kun strangetaj
saĝo kaj prudent'.

.
Li agadas ĉiam
propramaniere -
ĉu manĝaĵ' salgustas
kontrolos orele.

.
Noktan mallumegon
li pote kaptprenas,
ovon ŝelkrevintan
li kunkudri emas.

.
Biciklon li paŝtas,
fiŝon li kantigas,
kaj al muskaptado
porkon li instigas.

.
Li nutras per fojno
kokojn kaj anserojn,
kaj la ŝafnutraĵon
salas per neĝeroj.

.
Li kokinon kovigas
elkovi monerojn,
kaj ovojn porkovajn
li plantas en teron.

.
Li uzas boaton
por kampa promen' -
tute propravole
vivas Ansensen'.

(esperantigis: *Živano Novakov*)



Grigor Vitez

KIEL VIVAS ANTEGO

Antego ja vivas
En fora vilaĝ'.
Vera en li estas
Iom stranga saĝ'.

Li si-maniere
Faras ĉiun jobon:
En ĝardeno plantas
Ja kokinan ovon.

Jen, per poto ĉerpas,
Densegan mallumon.
Fadene kudradas
Vastiĝantan fumon.

Cu manĝ' estas sala,
Orele sentigas.
Kaj fiŝon ekkanti
Obstine lernigas.

Sur sia herbejo
Biciklon paŝtigas.
Por ĝi musojn ĉasi,
Porkon enfermigas.

Anseron per fojno,
Ŝafon neĝe dikigas.
Monon por demeti
Kokinin kovigas.

Se iras tra grenej'
Li en bark' sidas.
Tut-si-maniere
Antego vivas.

Tradukis *Lorijan Popi*



La Aldravio




Cícero Carlos Oliveira da Silva

La Aldravio, poemo de nur ses vortoj, permesas al ĉiu studento trovi sian propran manieron esprimi la mondon, nomi sentojn kaj transformi spertojn en mallongajn sed intensajn versojn. Ĉi tie, ĉiu vorto portas la brilecon de la aŭtonomeco, imagopovo kaj sentemo de niaj studentoj.

La poemojn akompanas ilustraĵoj ankaŭ kreitaj de la studentoj, vastigante artan esprimon kaj donante koloron, formon kaj vivon al la vortoj. Tiel, teksto kaj bildo kompletigas unu la alian, rivelante unikajn perspektivojn kaj diversajn manierojn percepti la ĉiutagan vivon.


ĈIU
TAGE
IO
NOVA,
KIEL
HOMOJ.

Cícera Samyra



VI
ESTAS
LIBERA,
FLUGU
TRE
ALTE.

Cícera Jaynara



SE
ÊI
AMAS,
ÊI
SERÇOS
VIN.

Cícera Jaynara



MUZIKO
ESTAS
HARMONIO
SENTO
DE LA
ANIMO.

Darlen de Melo



PACO
KAJ
AMO,
ÊSLOILO
AL
ÇIO.

Pedro Gabriel



MI
AMAS
MIAN
VIVON
KAJ
FAMILION.

Laisa Ferreira



La unua neĝo

Falis la unua neĝo.

Blankiĝis urbo kaj la voj`.

Ho, beata estu mia preĝo

ke Kristnasko estu kun neĝeroj

ke ĉiu infano ĝuu en siaj festoprogrameroj,

ke ni vivu harmonie,

kaj laboru en la libero pace,

pro tio ni agu ĉiam senĝoiste kaj senlace.



Jadranka Miric



Feliĉan Novjaron 2026



***Nova jaro venas,
kaj ĝi alportas en siaj valizoj
grandajn problemojn.***

***La tamburoj de milito
denove sonas laŭte,
kaj la homaro maltrankviliĝas.***

***Sed estas tempo por novaj ideoj,
estas tempo por novaj fortoj,
estas tempo por novaj vojoj.***

***Ni ne lasu ĉi tiun teron
denove fariĝi predo
de oportunistoj
kaj militinstigantoj.***

***Ĉiam estas tempo
por tutmonda repaciĝo,
kompreno kaj toleremo.***

Helena Esperanto-Asocio

Neĝeroj

Jen neĝeroj falas el ĉielo,
ŝvebas super la kampar' leĝere.
Holmon nun vualas flok-mantelo,
birdoj flugas hejmen tra-etero.

Sola mi promenas en silento,
mian vangon la neĝeroj kisas.
Ili flirtas en la frida vento,
zume mi kanzonon improvizas.

Mi meditas kun konscio klara,
pri fruttempo plena de memoro.
Kun impreso mikse dolĉ-amara,
feble mi suspiras dum esploro.

Jen penetras iom sunradio,
kun la varm' de graco simpatio.



— Sonetfaris *Yi Qiao*



Kontemplado dum Advento

Ĥorkandeloj ardas dum Advento,
Julabio bunta glorinspiras.
Nia kontemplado en silento,
paŝoj al Momento jam aliras.

Tra l' vastspaco brilas jen helstelo,
rememore al Naskiĝo Krista.
Gardas Dio l' teron de l' ĉielo,
nin lumigas kun la grac' persista.

Ni Kristnaskon esperplene festas,
kaj dankemas bene al Mesio.
Laŭ konvinko ni fidelaj restas,
aspirante al l' evangelio.

Ne plu estos mort' jam, nek sufero,
kiam Dia Regno sur la tero.

– Sonetfaris Yi Qiao (kun ritmo
trokea kaj rimoaranĝo ABAB CDCD
EFEF GG)




Yi Qiao



ĈEVALO KAJ BUBALO

Infankanto



Li Weitun

Ĉu mi devas kviete iri for

我是不是该安静地走开

teksto de *Zhang Fanglu*

muziko de *Chen Xiunan*



tradukita de *Ardo*

Jen populara ĉina kanto, kiu unue aperis en 1991. Lastatempe, iu (anonime en la ĉinlingva nomo DaTouzhen, 大头针) denove faris ĉi tiun kanton per AI, kaj ĝi fariĝis tre populara en Ĉinio. Mi nun tradukas ĝin en Esperanton, kaj mi esperas, ke ĝi plaĉos al ĉiuj.

Mi ne scias do kial tiel,

amo ne laŭ mia rev'.

Mi ne trovis eĉ la vojon al vi,

eĉ ne scias pri forges'.

En la pluvo mi larmas pro plor',

mi eĉ ne scias kien.

Milfoje mi vokas vin en la kor' ,

mi plu serĉas vin ĉien.

Ĉu mi devas kviete iri for,

aŭ devas brave resti mi?

Mi ne scias pri senpova rankor',

Ĉu do reeblas ĉio ĉi?

Ĉu mi devas kviete iri for,

aŭ devas plu atendi vin?

Ĝis l'amon vi komprenos en la kor',

neniam mi forlasos vin.



Neĝo sur la Rivero

de *Liu Zongyuan* (Tang-dinastio)



Trad.: *Ardo*

de montoj birdoj tute flugis for,
de padoj homoj estas sen apero.
fiŝisto surboate en izol'
fiŝhokas en neĝ' frosta ĉe rivero.



江雪

柳宗元 (唐)

千山鸟飞绝，
万径人踪灭。
孤舟蓑笠翁，
独钓寒江雪。

Ario de juneco

Yin Jiaxin

Daŭrigante la enhavon de numero 007



Ĉapitro 9

Estis la 15-a de julio. Vi respondis al instruistino Hu, ke vi konsentas konatiĝi kun ŝia nepino. Tial vi devis skribi la unuan leteron. Vi ekprenis la plumon kaj ne sciis kiel voki ŝin: “Fanhua” ŝajnas ne taŭge; “Kara...”? tute ne eblas; do, “Kamarado Fanhua”. Vi sigelis la leteron kaj samtempe sigelis vian revon en la urbo Sijan. Vi preĝis, ke prava estu ĉi tiu paŝo en via vivo.

He Lei alvenis ĝuste kiam vi estis elironta sendi la leteron. Ŝia alveno memorigis vin, ke vi interkonsentis kun ŝi, ke vi ambaŭ registras la voĉlegadon de tekstoj por la Esperanto-kursanoj tiun posttagmezon. He Lei estis gaja kiel kutime. Ŝi legis flue dum vi distriĝis, tiel ke vi faris kelkajn erarojn. He Lei ŝercis, ke vi kiel instruisto eĉ ne legis tiel bone kiel ŝi, la lernanto. Ŝi ne sciis, ke via koro estas agitiganta. Kun ŝi sidanta apud vi en la ĉambro, vi sentis vin feliĉa kaj samtempe suferanta. Ŝi rimarkis vian distriĝemon kaj demandis kelkfoje “Kio okazas al vi?” Vi kun ŝajna aplombo diris “Nenio” kaj daŭrigis la registradon.

La suno estis preta subiri. Vi akompanis ŝin ĝis la pordego de la lernejo. Post kiam ŝia figuro malaperis en la krepusko, vi ĵetis la leteron en la leterkeston ĉe la pordego, dume vi forĵetis la esperon.

La knabino respondis vian leteron rapide. Ŝi vokis vin “Instruisto Gen”. Ŝi diris, ke ŝi jam delonge aŭdis de sia avinjo, ke viaj scioj estas vastaj, viaj interesoj diversaj kaj vi estas kiel talenta tiel bonkora. Resume ŝia impresado pri vi estis bona. Ŝi kredis sian avinjon kaj ankaŭ fidis la personon, kiun ŝia avinjo elektis.

Komenciĝis la someraj ferioj, sed la Esperanto-kurso ne finiĝis. La kantino fermiĝis. Instruistino Hu invitis vin manĝi ĉe ŝi ĉiutage. Vi hontis ĝeni ŝin kaj ŝi malĝojiĝis, do vi konsentis. He Lei ne vojaĝis al Beijing, ŝi restis sola hejme. Ŝi venis al vi ĉiun posttagmezon por lernado. Vi timis, ke instruistino Hu malĝojus, se ŝi vidus vizitadon de He Lei, do vi donis al He Lei ŝlosilon de via oficejo. Ŝi iris rekte al via oficejo ĉiun posttagmezon je la 2-a horo. Vi ambaŭ pasigis belajn posttagmezojn tie. Vi kaj la knabino en la urbo Ŝan korespondis unu leteron semajne. Nerimarkate, vi eknomis ŝin “Fanhua” anstataŭ “Kamarado Fanhua” kaj ŝi nomis vin “Gen Men” anstataŭ “Instruisto Gen”.

Vi estas ĉiam okupita. Vi legis librojn, gvidis He Lei en lernado de la angla, kaj ĉiusemajne instruis Esperanton tri fojojn. Fininte la tradukadon de 《Verkaro de Julio Baghy》, vi ekverkis novan novelon. He Lei memvole faris netan kopion de via tradukaĵo kaj promesis, ke ŝi netkopios vian novelmanuskripton. Vi ja ne povis elteni ŝian helpon, sed samtempe vi tiom deziris ŝian helpon. Ĉiutage kiam ŝi sidis ĉe vi, vi sentis vin neeltenebla kvazaŭ via spirito suferus turmenton, tamen, kiam ŝi ne forestis, vi sentis, ke io mankas en via vivo. Unuflanke estis He Lei, aliflanke Zu Fanhua kaj la arĝenthara instruistino Hu. La vojoj de amo kaj neamo kuŝis flank-ĉe-flanke, Racio, emocio, moralo, konscienco... Vi celis la feliĉon de amo. Vi sopiris al la beleco de la vivo. Vi avidis la sukceson de via afero. Kvazaŭ infano lernanta paŝi, vi moviĝis sur la vojoj de amo kaj neamo. Vi ne havis la kuraĝon fari decideman elekton. Vi ne volis pripensi la ĝenan elekton. Vi plene enfokusigis vin sur via dika manuskripto kaj laboro.

Tiun sabaton posttagmeze kiam vi akompanis He Lei el la lernejo, ŝi diris al vi, ke la sekva vespero estas filmo «Amhistorio». Vi rimarkis, ke ŝi intence invitas vin kune spekti la filmon. Vi akceptis ŝian inviton. Vi ambaŭ interkonsentis renkontiĝi je la 7-a en la sekva vespero ĉe la enirejo. Sur la vojo al la pensiono vi sentis iom da ekscitiĝo.

La sekvan posttagmezon vi ricevis leteron de Zu Fanhua. La filmo estis je la 7:30. Je la 7-a vi ĝustatempe atingis la kinejon, tie jam atendis He Lei en blanka robo kiel eta kolombo. Vi ne volis malgajigi ŝin, sed vi devis bedaŭrinde informi ŝin, ke la knabino el la urbo Ŝan venos je la 8:30 per trajno. Ŝia rideto tuj malaperis, malgraŭ ke ŝi aspektis aplomba, ne montrante malgajon. Ŝi diris, ke ankaŭ ŝi ne spektos la filmon. Ŝi disŝiris la du biletojn kaj ĵetis ilin flanken de la vojo.

“Ĉu vi koleris min?” Vidinte ŝian agon, vi sentis iom da malĝojo en la koro.

Ŝi montris rideton ŝajnigitan kaj diris: “Ne. El la gazeto «Lernado de la angla lingvo» mi legis la filman resumon kaj ankaŭ aŭdis ĝian sonregistraĵon. Mi intencis distrigi vin iom, ĉar vi estis ĉiam okupata kaj elspezis tiom da energio por mi.”

“Vi estas bonkora!” Dirante tion, vi sentis nedireblan emocion.

“Do mi rehejmiĝu.”

“La trajno atingos post unu horo, ni promenu iom, ĉu bone?”

“Bone.”

Vi kaj ŝi promenis senvorte en la ĉarma krepusko kiel nuboj lante moviĝantaj sur la ĉielo.

Ŝi mokis: “Kio okazas? Kutime vi estas kiel parolanta sturno kun senfinaj vortoj, kial vi nun fariĝis mutulo?”

Kion diri? Via cerbo ŝajnis pensi pri ĉio kaj pri nenio.

“Parolu pri via novelo. Ĉu vi povas rakonti al mi vian koncepton?”

“Mi planis dek tri ĉapitrojn kaj jam verkis kvar. Vi prefere legos ĝin post kiam ĝi estos finita.”

“Do parolu pri la knabino el la urbo Ŝan. Ĉu ŝi estas bela?” ŝi ŝanĝis la temon

“Ej.” Via tono estis nek laŭda nek mallaŭda.

“Ĉu ŝi estas bona?”

“Mi ne scias, ĉu ŝi estas bona aŭ ne. Mi ankoraŭ ne konas ŝin bone. Sed el la leteroj mi vidas, ke ŝi tre zorgas pri mi, konstante memorigante min pri la sano.”

“Ĉu vere? Bonege! Vi devus senti ĝojon.”

“Ĉu mi devus senti ĝojon?”

“Jes.”

“Mi ankoraŭ ne scias, kio okazos en la estonteco. Ho, se oni povus antaŭvidi sian estontecon! Mi sentas konfuzon pri la sorto.”

Vi rigardis He Lei. Ŝi mallevis la kapon kaj piedfrapetis ŝtoneton sur la tero.

“Pri kio vi pensas?” vi demandis. Ŝi silentis, ankoraŭ piedfrapetante la ĝenan ŝtoneton.

Vi ambaŭ daŭre promenis silente dum iom da tempo. Fine vi rompis la silenton, demandante: “Kiam viaj gepatroj revenos?”

“Je la fino de aŭgusto.” Ŝia kapo restis mallevigita.

“Vi estas sola hejme? Vere kiel juna bonzino gardanta templon.” Vi intence ridigis ŝin.

Ŝi ridetis kaj ŝercis: “Jes, mi ĉiutage sidas en la templo kun fermitaj okuloj, frapante la lignan fiŝon kaj recitante sutron.”

“Kian sutron?”

“Kian ajn sutron.” Dirinte, ŝi paŭtis per lipoj.

“Ĉu ne estas musoj akompanantaj vin?”

“Mi jam elmanĝis ĉiujn musojn.” Ŝi ridis sub la nazo.

“Amitabo! Vi estas vere kruela. Verŝajne pro la manĝado de musoj vi perdis intereson pri anglaj frazstrukturoj? Rigardu vian hieraŭan eseon, vi eraris en pluraj lokoj.”

Ŝi ridetis kun bedaŭro, tuj ŝajnigis indiferecon dirante: “Kio gravas? Mi reskribos ĝin ĉivespere kaj alportos al vi morgaŭ.”

“Morgaŭ vi ne venu.”

“Kial?”

“Mi devos akompani la knabinon. Ĉu mi povus ne akompani ŝin dum ŝia unua vizito?”

“Kiom da tagoj ŝi restos?”

“Ŝi diris en la letero, ke tri tagojn.”

“Ĉi tiuj tri tagoj estos feliĉaj por vi.”

“Ĉu feliĉaj?”

“Kompreneble.” Ŝi ĵetis al vi petoleman rigardon.

“Mi esperas, ke mi estos feliĉa.”

“Vi estos feliĉa. Via sorto estas ĉiam bona.”

“Mi esperas, ke mi ĉiam estos bonŝanca.”

“Mi benas vin.”

“Dankon. Mi ankaŭ benas vin. Ni reciproke benu.”

Jes, vi sincere benis ŝin, vi ankaŭ benis vin mem. Ĉu vi estis feliĉa? Vi ne sciis. Ĉu vi amis He Lei? Jes, sed vi ne havis la rajton, ĉar alia knabino alproksimiĝas al vi. Vi sentis nedireblan melankolion. Vi estas malkuraĝulo, vi ne estis vera viro. Vi skoldis vin mem en la koro.

Ĉe la elirejo de la stacio. Ŝi la unua vidis vin kaj mansignis al vi. Ho! Ŝi ankaŭ portis blankan robon, eĉ la stilo estis tute sama kiel tiu de He Lei. Tamen, ŝi ne estis He Wei, ŝi estis multe pli alta kaj pli bela ol He Lei.

Vi ekprenis ŝian sakon kaj portis por ŝi.

“Ne gravas. Mi mem portas ĝin,” ŝi diris, sed la mano malstreĉiĝis.

“Estas lace veturi per la trajno tiom longe,”

“Ĉu vi atendis longan tempon?”

“Ĝuste iomete.”

Vi ambaŭ iris al la aŭtobusa haltejo senvorte. La silento ĝenis vin. Fine vi trovis vortojn: “Kiom da tagoj vi ripozos?”

“Tri tagojn.” Ŝi ne havis pliaj vortojn.

Ho, tri tagojn, ĉu ne estis klare skribite en la letero? Vi ridetis al vi mem.

La aŭtobuso alvenis, la homoj, kiuj ĵus eltrajniĝis, konkure rapidis al la pordo, sin puŝis kaj penis eniri.

“Ni ne prenu la buson. Iru piede,” ŝi proponis. “Estas ne malproksime. Mi ne lacas.” Vi eke enamiĝis. Ĉu la bela knabino estos la persono, kun kiu vi vivos kune? Vi estis konfuzita. Vi sentis, ke ne estas iu alia ol ŝi. Kial ĉiufoje kiam iu preterpasanto fikse rigardis ŝian vizaĝon, vi sentis malkomforton kaj ĵetis al li malamikan rigardon? Kial ĉiufoje kiam frivolaj okuloj promenis sur ŝia plena brusto, vi preskaŭ deziris frotigi kalkon en ilin. Sed, ĉu vi amis la knabinon? Ĉu vi volis doni vian koron al ŝi?

Instruistino Hu ne volis, ke kiu ajn konatulo sciu pri via rilato kun Zu Fanhua, do ŝi postulis, ke vi ambaŭ distru vin en malproksima loko. Vi elektis la monton en la antaŭurbo. Estis varme tiun tagon. Vi malvigle sidis surtere, apogante la dorson al granda arbo kaj aŭskultante la ĝojan cirpadon de cikadoj. Ŝi sidis senpere apud vi, senŝeligante pomon. Vi ambaŭ sidis dum longa tempo kaj babilis iom. Vi trovis, ke vi ambaŭ povas interparoli sen fremda senso, kvankam la enhavo de la babilado tute ne tuŝis la anglan lingvon aŭ Esperanton. La monto estis trankvila, krom la cirpado de la cikadoj, ĉio estis kvazaŭ morte kvieta.

“Kiel kviete!” Vi turnis vin al ŝi kaj demandis: “Ĉu vi timas, se estus nokte nun?”

“Ĉe vi mi timas nenion,” ŝi ridetis kaj donis al vi duonon de la pomo.

“Kaj se mi ne estus ĉe vi?”

“Tiuokaze kompreneble mi timas.”

“Kio en la mondo estas via plej granda timo?”

“Mi ne scias, kaj vi?” Ŝi aspektis iom naiva.

“Mi plej timas serpentojn.”

“Mi ankaŭ timas serpentojn.”

Subite, nemalproksime aŭdiĝis “ziiuu” zumado. Vi turnis la kapon kaj frostiĝis: longa sonserpento rampis al vi.

“Estas serpento!” Vi softis en ŝia orelo. Ŝi tuj kaptis vian manon kaj la kapo enfalis en vian sinon. “Ne moviĝu!” avertis vi konsternite.

“ziiuu...” la serpento rampis al vi. Vi teruriĝis, tiel ke via kapo zumis kaj ŝvelis. Ŝia korpo gluiĝis al vi kaj ŝiaj manoj tremetis.

La serpento daŭris antaŭen kaj rampis sur vian pieddorson. Vi fermis la okulojn, retenis la spiron kaj restis senmove. Vi sentis, ke la serpento transrampis vian pieddorson. La zumado malproksimiĝis kaj malaperis. Vi malfermis la okulojn kaj spiregis. Zu Fanhua ankoraŭ fermis la okulojn senmove.



“Bone, ĉio en ordo.” Vi frapetis al ŝi la ŝultron. Ĝuste tiam vi eksensis, kiom mola ŝia korpo estas! Ŝiaj haroj eligis dolĉan aromon, ŝia korpo havis allogan odoron, kiun vi neniam elflaris. Vi profunde enspiris kaj preskaŭ svenis. Vi enspiris duan, trian fojon... Vi ne povis rezisti la tenton de laodoro. Karna deziro ekestis en via korpo kaj la sango varmiĝis en la kapo. Vi firme brakumis ŝin kaj metis vian buŝon sur la ŝian. Vi ekfermis la okulojn kaj tra via korpo fluis neniam spertita plezuro. Ŝiaj manoj firme ĉirkaŭprenis vian kolon. Viaj manoj ekkaresis ŝian korpon. Vi ravite forgesis ĉion inkluzive de «Verkaro de Julio Baghy» kaj la novelo, kiun vi verkas.

Vi ne atendis, ke kiso estas tiel dolĉa, tiel plezuriga. Do vi kisis ŝin foj-refoje. Dume vi hazarde pensis pri He Lei. Sed la karna deziro kaj stranga venĝemo igis vin pene forgesi ŝin. Do vi brakumis Zu Fanhua pli firme kaj kisis ŝin pli pasie. Vi eĉ, post reveno, kaŝe kisis ŝin kaj frapetis ŝian belan vizaĝon en la kuirejo de instruistino Hu.

Vi mergiĝis en pasian amon, kiu eble estas misforma amo aŭ simple karna deziro. Ĉu vi ne konfesis? Do, kial vi sekrete eniris vian oficejon, dum Zu Fanhua lavis viajn moskitovualon kaj litkovrilon? Kiam vi vidis He Lei legantan ene, kial vi estis ĝojega? He Lei ne sekvis vian ordonon. La antaŭan posttagmezon kiam vi kaj Zu Fanhua kisadis sub la granda arbo, ŝi sidis en via oficejo legante libron. Vi ne komprenis, kial ŝi agis tiel. Vi denove konfuziĝis. Vi tiom esperis, ke ŝi diru al vi “Mi amas vin!” Sed ŝi ne diris. Ŝi ĉiam estis tiel varma al vi, sed neniam menciis amon.

◆ (*daŭrigota*)

Feliĉo de du familioj

Yin Jiaxin



La matena sunlumo penetris tra la gazaj kurtenoj, lasante delikatajn lummakulojn sur la kverka planko. Ma Sulin sidis sur rulseĝo, kun lanuga litkovrilo sendita de sia filo el Usono sur siaj genuoj. La litkovrilo estis tre mola, sed ŝi sentis, ke ĝi ne estis tiel varma kiel tiu, kiun ŝi teksis en sia juneco. Ŝi kaj la edzo neniam vizitis Usonon, ĉar ilia filo ĉiam diris: “Mi venigos vin al Usono por vin distri kiam mi estos malpli okupita,” sed tiu “malpli okupita” neniam alvenis.

La vartistino, Ŝjaŭ Fen, duonmalfermis la glitpordon de la balkono, kaj printempa brizo enŝteliĝis kun la aromaodoro de la magnoliaj floroj en la ĝardeno. Ma Sulin profunde enspiris, kaj la memoro ŝajnis vekigi pro la aromo: antaŭ multaj jaroj, en printempa tago ŝi, tenante la manon de sia filo, Ŝja Ĝun, iris al la matematika konkursejo. Siatempe, li estis pli malalta ol ŝia ŝultro, portante tro grandan librujon. Ĉe la enirejo, turnante sian kapon al ŝi, li eksvingis la manon: “Panjo, mi eniras!”

Tio estis ŝia plej fiera momento. La ĉirkaŭaj gepatroj rigardis kun envio, kaj iu flustris: “Tiu estas la filo de Ma Sulin. Oni diras, ke li neniam partoprenis ajnan aldonan kurson, li naskiĝis por studi.”

Ŝi plezure ridetis, tenante sian korpon pli rekte, kun brila esprimo sur la vizaĝo.

“Onklino Ma, mi faros aĉetojn kaj baldaŭ revenos,” la voĉo de Ŝjaŭ Fen interrompis ŝiajn rememorojn. “Se vi bezonas ion, telefonvoku min.”

Ma Sulin kapjesis, kaj ŝia rigardo falis sur la poŝtelefonon sur la tetablo. Ĝi estis la plej nova modelo, kiun la filo sendis la lastan monaton. Bedaŭrinde nun estas fendeto sur la ekrano, ĉar ŝi hazarde glitfaligis ĝin antaŭ duona monato. Ŝia filo diris: “Ne gravas, panjo, mi sendos alian al vi.”

Infana rido aŭdiĝis malsupre. Ma Sulin ruligis la rulseĝon al la balkona balustrado. De la kvara etaĝo, ŝi povis vidi la tutan centran ĝardenon de la loĝkvartalo. La du genepoj de transa sinjoro Li kuras kun kajtoj super la kapo, kaj sinjorino Li sekvas ilin, tenante la mantelojn de la infanoj.

“Kuru malrapide!” La voĉo de sinjorino Li, plena de rideto, trais la printempan aeron kaj atingis la orelojn de Ma Sulin. Ŝi frotis la tenilon de la rulseĝo per siaj fingroj. Ankaŭ ĉi tiu rulseĝo estis sendita de ŝia filo, kun ĝustigebla dorsapogilo kaj skusorbilo. Oni diris, ke ĝi estis la plej bona modelo en Usono. Sed ŝi preferus, ke ĝi ne estus necesa por ŝi.

Ŝi vidis, ke Dacen, la filo de sinjorino Li, eliris el la domega pordo, portante piknikkorbon. Li surhavas simplan bluan jakon, kun ĝoja mieno. Lia edzino sekvas lin, kaj iliaj gefiloj kuras renkonte al ili. Fragmentoj de la familia interparolo flugis supren:

“Ĉu vi prenis la dolĉ-acidan kotleton, ŝatatan de via patro?”

“Jes, jam. Kaj ankaŭ la flavan vinon, kiun li amas...”

“Avinjo, ĉu mi povas havi la kajton kune kun mi?”

Simplaj interparoloj, ordinara sceno tamen streĉis la gorĝon de Ma Sulin. Ŝi turnis la rulseĝon reen al la salono, kaj la rigardo vole-nevole falis sur la fotokadron sur la

ŝranko ĉe la televidilo. En unu foto, ŝia filo portis doktoran robon, starante antaŭ la universitata biblioteko, kun memfida sed distanca rideto. Li sendis ĝin kiam li doktoriĝis, kaj sur la dorso de la foto, li skribis: “Al miaj gepatroj: sen via subteno, mi ne havintus nunajn atingojn.”

La alia foto estis familia portreto de ŝia filo. Lia blondhara, bluokula edzino tenas la miksrasan filon, kaj li staras apude, kun kalifornia strando kiel fono. La foto estas bela, kiel gazeta kovrilo. Ma Sulin iam metis ĝin en la plej facile videblan lokon. Nuntempe ŝi konsciis, ke ĉiu en tiu foto estis dekmilojn da kilometroj for de ŝi.

La bruo de aŭtoŝtarto aŭdiĝis malsupre. Ma Sulin revenis al la balkono kaj vidis, ke la ne plu nova SUV de Dacen malrapide ekveturis al la elirejo de la loĝkvartalo.

La aŭto glate veturis el la urbo, kaj ĉie estis plene de printempa atmosfero. Ambaŭflanke de la ŝoseo floras persikfloroj, formante rozkoloran maron, kaj la montoj malproksime havas mildan verdeton.

“Paĉjo, panjo, ni iras al la Parko de Rivero Baro hodiaŭ. La ĉerizarboj floris tie, kaj estas vasta herbejo por petolado de la infanojn,” diris Dacen dum sia stirado.

Kiam sinjorino Li rigardis la pejzaĝon ekster la fenestro, en ŝia menso ekaperis sceno antaŭ pli ol dudek jaroj. Tiutempe Dacen estis en la tria lernojaro de elementa lernejo, kaj liaj notoj rangis la tridek-sepa en la klaso. Post la gepatrokunveno, ŝi kolere batis lin, kaj la sekvan tagon ŝi enskribis lin en plurajn aldonajn kursojn.

“Dacen, vi devas peni. Rigardu la filon de onklino Ma, Ŝja Ĝun, li ĉiam estas la unua en la klaso. Almenaŭ vi devas eniri la dek plej bonajn, ĉu ne?” Ŝi ofte diris tion al sia filo. Tion aŭdinte, Dacen mallevis la kapon kaj silentis. Li simple ne naskiĝis por studi. Kiel ajn li klopodis, liaj notoj ĉiam restis en la meza aŭ pli malalta parto de la klaso. De la elementa lernejo ĝis la meza, sinjorino Li enskribis lin en oni ne scias kiom da aldonaj kursoj, elspezante oni ne scias kiom da mono, ĉiun cendon el kiu ŝi kaj la edzo ŝparis per vivadi modeste.

Komparite, la filo de sinjorino Ma ŝajnis esti la favorato de la ĉielo. Tiu knabo neniam partoprenis aldonan kurson, kaj liaj notoj ĉiam estis ĉe la pinto de la listo. Sinjorino Li memoris, ke iufoje kiam la patrinoj en la loĝkvartalo kunvenis renkonte al la nova jaro, sinjorino Ma gaje diris al ĉiuj: “Nia Ŝja Ĝun denove estas elektita por matematika konkurso. La instruisto diris, ke li denaske havas matematikan intelekton.”

En tiu momento, sinjorino Li dezirus, ke estu fendo en la tero por ŝi kaŝiĝi. Ŝi ĵus revenis de interparolo kun la instruisto, ĉar ŝia filo multfoje ne plenumis siajn hejmtaskojn.

Poste, Dacen malsukcesis en la ekzameno por eniri superan mezlernejon. La filo de sinjorino Ma estis rekomendita senekzamenate al la plej prestiĝhava supera mezlernejo. Kaj tri jarojn poste li eniris faman universitaton kun bonegaj rezultoj. Kiam sinjorino Li aŭdis la novaĵon, ŝi pretervole eklarmis, pensante, ke alies infano estas tiel sukcesa, dume ŝia propra infano havas tiel limigitan estontecon.

“Panjo, ĉi tie ni estas,” la voĉo de Dacen revenigis sinjorinon Li el ŝiaj rememoroj.

La Parko de Rivero Baro vere estis plena de printempa vigeleco. Sub la florantaj ĉerizarboj, vizitantoj sidis aŭ promenadis, kaj infanoj ludadis sur la herbejo. La du infanoj de Dacen kuris for tuj post ilia elaŭtiĝo, kaj ilia patrino haste postkuris ilin.

“Panjo, vi kaj paĉjo faru promenadon trankvile. Mi faras pretigon por la pikniko.”

Sinjorino Li kaj ŝia edzo pasumis laŭlonge de la lago, kiu brilas kvazaŭ arĝentaj pecoj, kaj kelkaj blankaj ardeoj estas serĉantaj manĝaĵon en la malproksimo.

Subite sinjorino Li diris: “He, vi maljuna ulo! Ĉu vi memoras la tempon, kiam Dacen eklernis aŭtoriparadon? Ni eĉ ne kuraĝis babili kun loĝantoj en la loĝkvartalo,” .

La edzo kapjesis: “Kiel mi povas forgesi? Ni ĉiam sentis nin malplivaloraj tiutempe.”

“Sed nun, kvankam nia filo ne faris grandajn sukcesojn, tamen li estas piema kaj zorgema pri la familio. Li vizitas nin ĉiusemajne kaj estas ĉiam preta helpi kiam ni bezonas.”

Ŝia edzo prenis ŝian manon: “Jes, simpla kaj trankvila vivo estas la vera felico. Ni nun havas niajn nepojn ĉirkaŭ ni, kaj la tuta familio kuniĝas dum semajnfinoj. Kio povus esti pli bona?”

Dum la vartistino Ŝjaŭ Fen forestis, la domo estis ŝajne malplena. Ma Sulin volis fermi la okulojn por ripozi, sed ŝia menso ne povis trankviliĝi. Rememoroj torentis kiel tajdo.

En la jaro 2004, la aŭtuno estis la mezlerneja diplomiĝa sezono. Iutage Ma Sulin vidis sinjorinon Li en bazaro. Ŝi rapide alproksimiĝis por saluti, kaj samtempe rimarkis, ke estas malhelaj ringoj sub la okuloj de sinjorino Li kaj novajn blankajn harojn ĉe ŝiaj tempioj. Kiam ili kune eliris la bazaron, sinjorino Li sombre suspiris: “Sulin, mi vere envias vin. Ŝja Ĝun estos rekomendita al la prestiĝhava supera mezlernejo, sed mia Dacen eble eĉ ne povos eniri la ordinaran.”

Ma Sulin volis konsoli “Ĉiu havas sian propran feliĉon”, sed la vortoj restis en ŝia gorĝo. Ŝi sugestis: “Ne tro premu la infanon...”

“Kion alian mi povus fari?” Sinjorino Li ekscitiĝis, dirante: “Lia patro perdis sian postenon kaj nun laboras kiel riparisto en la loĝkvartalo. En familio kia la nia, se la infano ne studos bone, kio estos lia estonteco?”

Ma Sulin silentis, kaj sinjorino Li daŭrigis mallaŭte: “Sulin, iafoje mi pensis, ke mi certe faris ion malbonan en mia antaŭa vivo, tial mia infano estas tia...”

“Ne diru sensencaĵon!” Ma Sulin interrompis ŝin. “Dacen estas bona knabo, komprenema kaj piema. Iufoje li eĉ helpis al mi miahejmen porti la pezan aĵon.”

Sinjorino Li ridetis amare kaj diris: “Mi kaj mia edzo interkonsiliĝis: se Dacen estos sentaŭga en studo, ni sendos lin al politeknika lernejo por lerni metion.” Dirinte tion, ŝi foriris rapide kun la kapo klinita, regante larmojn.

En la antaŭa vespero de Printempa Festo de la jaro 2013, Ma Sulin kaj la edzo faris ĝjaŭziojn, kiam la telefono sonoris. Estis transoceana alvoko de la filo.

“Panjo, paĉjo, feliĉan Novjaron.”

“Ŝja Ĝun, ĉu vi jam manĝis ĝjaŭziojn?” Ma Sulin demandis urĝe.

“Jes, mi aĉetis frostigitajn ĝjaŭziojn en la ĉina bazaro ĉi tie.” La filo paŭzis iomete kaj daŭrigis: “Panjo, mi jam ricevis doktoran stipendion de mia universitato.”

Ŝiaj manoj ekstremis de emocio. La edzo transprenis la telefonon, kaj lia voĉo tremis ankaŭ pro emocio: “Bonege, bonege, filo, paĉjo estas fiera pri vi!”

La interparolado daŭris dudek minutojn, kaj plejparte la filo parolis pri sia esploro kaj estontaj planoj. Ma Sulin ĉefe demandis pri fila vivo: ĉu la luita loĝejo estas varmeta? ĉu li jam kutimis al tiea manĝo? ĉu li havas koramikinon? Finfine ŝi foje refoje ripetis: “Atente zorgu pri vi mem.”

Post la bablado, la domo subite silentis. La gaja rido kaj kanto el la televido ŝajnis aparte orelpikaj. Ma Sulin rigardis la nefinitajn ĝjaŭziojn sur la tablo kaj moroze grumblis: “Li eĉ ne demandis kiel ni festas la Novjaron.”

Ŝia edzo suspiris kaj frapetis ŝin je la mano: “La filo estas okupita, komprenu lin.”

Ekstere aŭdiĝis la bruo de petardoj. Ma Sulin iris al la balkono kaj vidis, ke la domo de sinjorino Li estis plena de lumo, kaj ruĝaj paperaĵoj estis gluitaj sur la fenestroj. Oni povis aŭdi la familian ridon malklare. Ŝajne Dacen rakontis iun ŝercon, kiu igis la tutan familion ridegi.

Ma Sulin staris longe, ĝis la edzo vokis ŝin por manĝi ĝjaŭziojn.

En la printempo de la jaro 2018, la edzo de Ma Sulin ricevis diagnozon pri finstada heptakancero. Ŝi plore informis la filon pri ĝi.

“Panjo, ne maltrankviliĝu,” la voĉo de la filo estis paca: “Konsultu la plej bonan hospitalon kaj la plej bonajn kuracistojn por paĉjo. Diru al mi kiom da mono vi bezonas.”

“Ne estas problemo pri mono...” Ma Sulin volis diri “Ni volas vin ĉeesti,” sed finfine ŝi ne elvortis ĝin.

“Mi provos, ĉu mi povos preni forpermeson, sed venontmonate estas grava akademia konferenco...”

“Se vi estas okupita, ne rapidu reveni,” Ma Sulin konsolis sian filon kontraŭ sia volo.

Post nelonge, ŝia edzo mortis. Ĉe la sepultado, Dacen donis multe da helpo, portante florkronojn, akceptante gastojn... Post la funebra ceremonio, sinjorino Li premis la manon de Ma Sulin, dirante: “Sulin, moderigu vian doloron, troa malĝojo estas senutila. Se vi bezonas helpon, voku nin kiam ajn.”

Ma Sulin balancis la kapon kaj eksplodis per korŝira plorado, ne pro la forpaso de sia edzo, sed ĉar en tia momento la konsolo venis ja de la najbaro, ne de la propra filo. Kiam Ŝja Ĝun finfine revenis sola sen la akompano de la edzino kaj infano, kiujn Ma Sulin ĝisnun vidis nur dufoje, la cindroj de la maljunulo jam estis enterigitaj. Li surgenue faris tri kapalterajn riverencojn antaŭ la tombo de sia patro, kaj kelkaj tagoj poste reflugis al Usono.

“Onklino Ma, mi revenis.” La voĉo de Ŝjaŭ Fen revenigis Ma Sulin el ŝiaj rememoroj al la realo.

“Hodiaŭ estis tre multaj homoj en la bazaro. Mi aĉetis freŝan kapselon por pretigi ĝjaŭzi-farĉo”

Ma Sulin kapjesis, kaj ŝia rigardo denove flugis ekster la fenestron.

“Ĵus mi vidis, ke la familio de onklino Li eliris, ŝajne por ekskursi,” babilis Ŝjaŭ Fen dum ŝi ordigis la legomojn. “Kiel vikle, tuta familio.”

“Jes...” zumis Ma Sulin.

“Lastsemajne via filo diris, ke via nepo eklernas pianoludon. Kiel inteligenta! Li certe estos same elstara kiel lia patro en la estonteco,” Ŝjaŭ Fen intence babiladis kun sinjorino Ma. Sed al tiu tedis ofte aŭdi tiajn laŭdojn.

Dum Ŝjaŭ Fen preparis la tagmanĝon en la kuirejo, Ma Sulin veturigis la rulseĝon al la dormoĉambro kaj malfermis la tirkeston de la tualettablo. En ĝi troviĝis rusta fera skatolo, dolĉaĵskatolo de ŝia geedziĝa tago. Malferminte ĝin, ene ne estis juveloj, sed kelkaj modestaj objektoj: la unua atestilo de merito, kiun ŝia filo gajnis en la elementa lernejo, jam flaviĝinta; la karto, kiun ŝia filo dum sia infaneco donis al ŝi en iu Patrina Tago, kun malrektaj kaj nematuraj diagramoj “Panjo, mi amas vin”; kaj la foto, kiun ŝi faris kun li por lia mezlerneja diplomiĝo, tiam li metis sian brakon ĉirkaŭ ŝian kolon...

La kapselaj ĝjaŭzioj odoris agrable, sed Ma Sulin ne povis gustumi ilin. Ŝi maĉis kaj glutis mekanike, kiel plenumante taskon..

“Onklino Ma, vi manĝis tre malmulte,” diris Ŝjaŭ Fen zorgeme.

“Ne malsatas.” Ma Sulin skuis la kapon, ordonante: “Puŝu min al la balkono, mi volas min sunbani.”

La varmeta sunlumo malavare verŝis sin sur Ma Sulin. Tiu, tenante la okulojn fermataj, imagis ke mem estus planto, kiu bezonas nur sunlumon kaj akvon, sed nek amon, nek akompanadon, nek komplikajn homajn emociojn.



Denove aŭdiĝis aŭtobruo malsupre. Ma Sulin vidis, ke revenis la familio de sinjorino Li. La infanoj saltis el la aŭto, tenante sovaĝajn florojn kaj kajtojn. Sinjorino Li kaj ŝia edzo eliris malrapide. Rigardinte la scenon, Ma Sulin subite ekkomprenis: Feliĉo juĝiĝas ne per komparado; ĝi ne dependas de pli elstara infano aŭ pli riĉa familio; feliĉo estas elekto, aprobo kaj akcepto de la propra vivo sub limigitaj kondiĉoj. Sinjorino Li elektis akcepti la ordinarcon de sia filo, kaj tiel akiris varmecon en la ordinareco. Kaj ŝi mem, Ma Sulin, elektis persekuti la elstarecon de sia filo, kaj tiel perdis intimecon en la brilo.

La nokto falis dum mateniĝis en Usono. Ma Sulin petis al Ŝjaŭ Fen alvoki sian filon per videotelefono. La sonorilo sonis longe antaŭ ol esti respondita, kaj ŝia filo aperis sur la ekrano, kun oficejo kiel la fono.

“Panjo, kio okazis? Mi estas en kunveno.”

Rigardante la familiaran sed fremdan vizaĝon sur la ekrano, Ma Sulin havis multon da vortoj por diri. Sed fine ŝi nur diris: “Nenio, mi nur volis vidi vin.”

Ŝia filo ekspiris trankvile: “Mi telefonvokos vin en la semajnfino. Nun mi estas vere okupata. Zorgu vin, panjo.”

“Hmm.”

La ekrano malheliĝis kaj Ma Sulin sidis senmove kvazaŭ pripensante ion. Ŝjaŭ Fen alproksimiĝis kviete kaj diris mallaŭte: “Onklino Ma, estas tempo por preni vian medikamenton.”

“Ŝjaŭ Fen,” Ma Sulin subite demandis: “Laŭ vi, kio estas feliĉo?”

Ŝjaŭ Fen hezitis momenton kaj ridete diris: “Mi pensas, ke mia feliĉo estas: mi sentas min trankvile; iu memoras pri mi, kaj mi ankaŭ havas lin ankore.” Simpla kaj modesta respondo.

Ma Sulin ekridetis: “Vi pravas.”

Tiun nokton, Ma Sulin havis sonĝon. En la sonĝo, ŝi revenis al iu printempa tago antaŭ multaj jaroj. Ŝi, tenante la manon de sia filo, akompanis lin al matematika konkurso. Sed ĉi-foje, kiam ŝia filo sin turnis kaj diris “Panjo, mi eniras”, ŝi kaptis lian manon, softante: “Ŝja Ĝun, ne gravas ĉu la rezultoj estas bonaj aŭ ne.”

La filo rigardis ŝin per mirigitaj okuloj.

“Panjo volas, ke vi estu ĝoja ĉe ŝi,” ŝi diris tenere.

Ŝia filo ekmontris infanecan kaj naivan rideton, ne la postan ĝentilan sed distancan.

Kiam Ma Sulin vekigis, ŝi trovis la kusenon malseka kaj malvarma de larmoj. Ekstere la ĉielo estis heliĝanta, kaj komenciĝis nova tago. Ŝi ruligis la rulseĝon al la balkono. La loĝkvartalo estis kvieta kaj paca en la matena nebulo. Jam brilis la lumoj en la domo de sinjorino Li, kaj fumo ellasiĝis el ŝia kuireja fenestro.

Ma Sulin profunde enspiris la freŝan aeron kaj faris decidon. Ŝi ordonis al Ŝjaŭ Fen anstataŭigi sian filan foton de la doktoriĝo sur la ŝranko per tiun de ŝi kun lia mezlerneja diplomiĝo.

En posttagmezo de la aŭtuno de la jaro 2025, sinjorino Li estis preparanta vespermanĝon hejme, kiam subite ŝi aŭdis la sonon de ambulanco. Ŝi rapidis al la balkono kaj vidis, ke baldaŭ du flegistoj el transa domo portis brankardon, sur kiu kuŝas Sinjorino Ma senkonscia. Ŝi estis denove atakita de apopleksio.

Sinjorino Ma estis enmetita en la intensan prizorgon de la hospitalo. Kiam sinjorino Li iris al la hospitalo por viziti sinjorinon Ma, ŝi renkontis Ŝja Ĝun, kiu ĵus revenis de Usono. Li staras ekster la malsanula ĉambro, interparolante kun la kuracisto. Li aspektas pli maljuna ol lia aĝo, en eŭropa kostumo kaj okulvitroj.

“La stato de via patrino ne estas optimismisma. Ŝi bezonas longdaŭran prizorgon...” la kuracisto klarigis.

“Doktoro, mi komprenas. Sed mi povas resti hejme nur unu semajnon. Mia laboro...” La voĉo de Ŝja Ĝun tremetis pro maltrankvilo.

Sinjorino Li alproksimiĝis al Ŝja Ĝun por formale saluti lin. Ŝi diris kelkajn ĝentilaĵojn kaj kelkajn konsolajn vortojn, antaŭ ol forlasi la hospitalon. Rehejmiĝante, ŝi ekpensis pri sia propra filo, Dacen. Lastjare, kiam lia patro estis en la hospitalo pro severa malvarmumo Dacen senhezite petis kvartagan forpermeson kaj servis lin tagnokte. Kvankam pro tio la kompanio deprenis sumon de lia tiu monata salajro, tamen li neniam plendis.

Reveninte hejmen, sinjorino Li ekmemoris pri la tagoj antaŭ multaj jaroj, kiam ŝi kaj sinjorino Ma kune akompanis siajn infanojn al la lernejo. Tiutempe ili estis junaj, kaj ambaŭ kredis, ke la prospera estonteco de iliaj infanoj estis iliaj homvivaj celo kaj feliĉo. Ŝi fikse rigardis por kelka tempo la foton de la tuta familio sur la muro. En la foto, ŝi kaj ŝia edzo sidas en la mezo, la filo kaj bofilino staras malantaŭe, kaj la genepoj faras grimacojn antaŭe, ĉiu havas ĝojradia vizaĝon. En tiu momento, sinjorino Li ekkomprenis, kio estas feliĉo. Feliĉo ne kuŝas en la brilo malproksime, sed en la lumoj proksime; ne en la envio de aliuloj, sed en la propra kontenteco; ne en la atingoj de la infanoj, sed en ilia akompanado. ◆

Florŝtelisto

Kozawa Mami

Mia urbo situas ĉe la piedo de la monto Huĝi, la plej alta monto en Japanio. Mi loĝas kun mia maljuna patrino en mia domo. Antaŭ unu aŭ du jaroj, kiam la patrino estis en la ĝardeno ĉe mia domo, unu cervino pasis tuj apud ŝi. Ĝi ne havis kornojn, do la patrino tuj rekonis, ke ĝi estas cervino. Tiam ĉirkaŭ ŝi najbaraj infanoj timeme rigardis la cervinon. Rimarkinte tion, mia patrino diris al ili:

“Ĝi ne estas danĝera. Ĝi estas cervino. Oni povas tuŝi ĝin.”



Mi ne scias, ĉu tiuj ŝiaj vortoj estas ĝustaj, sed ŝi estas tiel bonkora. Tiam mi pensis, ke ankaŭ la cervino, kiu simple preterpasis mian patrino sen ia ajn malamikeco, estis eble bonkora patrino al siaj infanoj.

Mia patrino amas florojn. Ŝi plantas multajn florojn kaj diversajn legomojn kaj kultivas ilin ĉirkaŭ mia domo. Homoj, kiuj vizitas mian domon, ofte miras pri la beleco de la floroj kaj ĝuas ilin dum iom da tempo.

Pasintjare, en printempo, por la patrino malĝoja afero okazis. Iumatene ŝi rimarkis, ke iu forportis la florojn bele florantajn en angulo de nia eta ĝardeno. Kiu povis fari tian aferon! Kiam ŝi vidis la scenon, ŝi senfortiĝis. Kelkajn tagojn poste iu denove forportis ŝiajn gravajn florojn. Tiam la ŝtelisto iom profunde envenis en la ĝardenon kaj forportis nur la florojn, postlasinte la florpotojn. Tio okazis dum nokto, kiam neniu ĉeestis. En la sekvanta mateno, eksciinte kio okazis, la patrino multe surpriziĝis kaj sentis sin tre malagrabla. Aŭdinte tion, mi iom pensis:

“Ho, kiel terure! En mia domo nun loĝas du virinoj: mia maljuna patrino kaj mi, blindulino. Mi ne scias, ĉu ia malbona persono aperos ĉi tien.”

La patrino iris al la policoficejo kaj raportis pri la ŝtelisto. Post tio du policistoj vizitis nian ĝardenon kaj rigardis la lokon, kie la floroj estis ŝtelitaj. Ili serioze diris:

“Tio estas sendube ia bubaĵo. Pretigu gvatkameraon.”

Baldaŭ oni venis de elektraparata vendejo kaj konektis gvatkameraon sur la eksteran flankon de la muro de mia domo. La gvatkamerao estis konektita al la tabuleto de mia patrino, por ke ŝi povu vidi la bildon de la kamerao per la tabuleto, restante en sia ĉambro. De tiam policistoj ĉiutage patrolis ĉirkaŭ mia domo.

Dumtage ili ofte haltigis la patrolan aŭton proksime de mia domo kaj restis tie ĉirkaŭ tridek minutojn por observi la situacion. Tamen mi ne konvinkiĝis pri la efikeco de tiu metodo. Mi pensis, ke la florŝtelisto ripete aperis nokte en la ĝardeno, do eĉ se la policistoj venas kaj gardas dumtage ĉirkaŭ mia domo, tio tute ne utilas.

Post tio, dum kelkaj monatoj, la ŝtelisto ne venis. Baldaŭ mi tute forgesis pri li. Tamen iun nokton en decembro la ŝtelisto denove venis. Tiam la persono forportis multajn florojn el la tero en la ĝardeno, kaj ankaŭ plantaĵojn de verdaĵoj, kiujn la patrino plantis por manĝi en tiu jaro. La loko, kie la floroj kaj la plantaĵoj estis ŝtelitaj, estis tute malplena, kaj nenio restis tie. Eĉ ne unu folio estis falinta sur la tero. Nur iom da plantaĵ-restaĵoj restis.

La patrino denove senfortiĝis. Ŝi tuj iris al la policoficejo, kaj la du policistoj, kiuj antaŭe venis al la ĝardeno, denove alvenis. Ili vidis la registraĵon de la gvatkamerao por mia patrino, kiu ne bone sciis, kiel uzi la kameraon. Tamen bedaŭrinde la gvatkamerao ne funkciis. Antaŭe, kiam elektra paneo okazis pro tertremo, ĝi haltis, kaj de tiam ĝi ne funkciis. Do la policistoj ekfunkciigis la kameraon kaj revenis. Laŭ la konsilo de la policistoj, mia patrino iris al vendejo por aĉeti florojn. Ŝi plantis ilin en nian ĝardenon por kapti la agon de la ŝtelisto.

Tiun nokton ŝi ne povis dormi pro maltrankvilo kaj kelkfoje eliris el la domo por rigardi la ĝardenon. Tamen en tiu nokto ŝi nenion rimarkis. Sed en la sekvanta mateno ŝi vidis, ke denove la floroj estis forportitaj. Ŝi ne povis manĝi matenmanĝon pro sufero. La policistoj tuj venis kaj vidis la registraĵon de la gvatkamerao. Kiam la policistoj venis al mia domo, mi maltrankviliĝis, pensante, kio okazos en la koro de mia patrino, kiam ŝi vidos la bildon de la kamerao kun la policistoj per sia tabuleto, kaj kiam ŝi ekscios, kiu ŝtelis ŝiajn florojn. Tamen, dum la policistoj restis en mia domo, mi ne povis esti apud ŝi. Pro malsano mi devis resti en mia ĉambro. Baldaŭ, kiam la policistoj revenis, mi aŭdis la voĉon de mia patrino ĉe la dompordo. Ŝi salutis la policistojn kaj diris:

“Koran dankon! Estas bone.”

Ŝia voĉo estis hela. Post tio ŝi tuj venis al mi kaj diris:



“La ŝtelisto ne estis homo.”

Ŝi ridis. Laŭ ŝi, la ŝtelisto montriĝis esti granda cervino. Sur la ekrano de la tabuleto ŝi vidis ĝin, dum ĝi manĝis rozajn florojn kaj piediris en la direkto al la plantaĵoj. Aŭdinte tion, mi iom pensis, ke estis bone, ke la ŝtelisto estis cervino, sed ne urso. Mia patrino jam trankviliĝis kaj reprenis sian viklecon. Ŝi tuj kovris la restantajn plantaĵojn per reto, por ke la cervino ne manĝu ilin. Ŝi ne malamamis la cervinon, ĉar ŝi sciis pri cervoj, ke kiam iliaj manĝaĵoj ne troveblas en la monto, ili venas al ŝia ĝardeno por serĉi manĝaĵojn. ◆

Unuaj lecionoj de Esperanto

Ĉielismo



“Kiam vi komencis lerni Esperanton?”, Ĵurnalisto levtenas sian mikrofonon demandante al sro Ĉielismo, malnova esperantisto konata de la ĉina Esperantujo.

“En la jaro 1979, sed mi konis la nomon jam en 1968.”

“Ĉu? Kio tiam okazis al vi?” interesiĝas Ĵurnalisto.

“Jes. Tiam la Proletokultura revolucio movadas je sia pinto, kaj la lernejo ĉesigis sian lecionon por partopreni la movadon. Tiel mi kun aliaj knaboj kaŝeniris la lernejan legĉambbron por ŝteli infanlibretojn. Okaze mi legis novaĵon sur kolora gazeto ke Verkaro de Prezidento Mao estas eldonita en la lingvoj angla, rusa, franca...araba kaj Mondlingvo*. Aha, ankaŭ la Mond-lingvo! La nomo donis al mi profundan impreson.”

“Kaj poste?” Ĵurnalisto levis sian mikrofonon alten.

“Poste, pasis pli ol 10 jaroj ĝis meze de Okt. 1979” daŭre rakontas Ĉielismo “Kiam mi laboris en Ŝensi ŝtala fabriko, iutage mia kuzino Rosa* rakontis al mi: Ĉiĉjo, Hodiaŭ en nia librovendejo aperis maljunulo, kiu volas varbi kursanojn por Mondlingvo, kaj lasis al ni la kursan adreson.” Ĉielismo ekbrilis je siaj okuloj “Aha, Mondlingvo! Mi fiere diris al mia kuzino ke la nomon mi konis jam pli ol 10 jarojn. Mi volas lerni ĝin. Kie kaj kiam okazos?”

“Rosa respondis al mi detale ke en la bazlernejo de la strateto Grenvoja* apud ŝia librovendejo en la urba centro okazos unua leciono vespere de ĉi tiu vendredo. Kaj vendrede post la taglaboro mi invitis du kunlaboranojn kune bicikladi ĉ.10km ĝis la urba centro por aliĝi al la kurso. Surloke en la vespera lumeto svarmis tiom da aliĝontoj en la bazlernejo! La instruanto rekte rifuzis nian aliĝon pro tio ke ni estas laboristoj, konsolante ke ni laboristoj devas bone labori en sia fabriko. Kion fari? Kontraŭ la aŭtunfina frosteco ni bicikladis 10km de nia fabriko ĝis la urba centro, kaj ni ne volas vane reveni. Ni kiel multe da aliuloj staris ekstere ĉe fenestro de la klasĉambro aŭskultante la unuan lecionon de la kurso. Fakte la unua leciono ne estas vera leciono. Ni tra la fenestra vitro vidis unu maljunulon sidanta podie kontraŭ la plena kursanaro rakontis pri Mondlingvo. Li aspektis ŝajne kiel direktoro eĉ ekster-urba vilaĝano. De lia rakonto mi eksciis ke Mondlingvo estas nomo en la ĉina lingvo, kaj en fremdlingvoj ĝi nomiĝas Esperanto. Ĝi estas kreita de Doktoro Zamenhof pola dentisto. Ĝi estas espera lingvo de la homaro. Kvankam post iom da tempo mi scios ke Zamenhof ne estas pola dentisto, sed pola okulisto, tamen lia prononco dialekta akĉente je la vorto Dentisto donis al mi fortan impreson. Okaze la instruanto staris silenta for apud la maljunulo.”

“Ĉu la instruanto ne korektis la eraron?” Ĵurnalisto.

“Ne. La instruanto estimas la maljunulon, kiu donis al la kursanoj interesan historion, kial Zamenhof volis krei Esperanton, kaj li lernis Esperanton en la malnova Ĉinio kun malfacilo eĉ vivdanĝero kontraŭ perseku-tado de la reakcia registaro. Poste mi sciis ke la maljunulo, kiu vizitis la librovendejon de mia kuzino Rosa kaj rakontis podie, estas malnova esperantisto kaj vicfabrikestro Sji en nia urbo. Kaj la instruanto estas malnova esperantisto kaj redaktisto Lu de Vespera Ĵurnalo de nia urbo”

“Interesa rakonto” Ĵurnalisto “Kio okazis poste?”

“Ni staris ekstere ĝis la fino de la unua leciono, kvankam dume foriris iuj post iuj el la bazlernejo. Mi memoras ke antaŭ ol fini la lecionon la instruanto koncize instruis la alfabeton de Esperanto.”



“Ĉu vi ne sentis malvarmon?” simpatias Ĵurnalisto.

“Jes, ekstere de la klasĉambro estis frosta kaj senluma, sed Esperanto donis al mi ian lumeton, ĉar mi ne deziras tutan vivon labori kiel mekanika tornisto en la ŝtala fabriko...”

“Rakontu plue, mi petas.” Ĵurnalisto atendas.

“La unua leciono finiĝis. Sekvan lecionon mi kun miaj kolegoj ankoraŭ alvizitis, sed poste miaj kolegoj ne alvizitis, kaj restis nur mi. Tiel post kelkaj lecionoj nepleniĝis la klasĉambro, kaj mi senbrue eniris la klas- ĉambron fariĝi oficiala kursano sidanta sur liberiĝanta sidloko de la kurso. Kiam la kurso atingis finon de la Novembro 1979, la vetero jam estis tre frosta kompare kun nuntempa novembro, kaj en la klasĉambro restis pli ol 10 kursanoj. Tiam alvizitis nian kurson la maljuna esperantisto Sji por kuraĝigi restajn kursanojn.”

“Kiel li kuraĝigis vin?” demandis Ĵurnalisto.

“Li diris ke lerni Esperanton deziras sidi longe sur la malvarma benko. Tiam mi ne komprenis la sugeston. Nun mi komprenas tion ke Sji eklernis Esperanton pere de Ĉonĉina Esperanto-koresponda lernejo en 1941, kaj li trapasis 38 jarojn kun Esperanto, li konscias ke la vojo esperantista estas malfacila kiel la monaĥo longe sidas sur malvarma benko en la monaĥejo. Okaze li laŭdis la restantaj kursanojn kopiskribi la lecionojn, eĉ laŭdis min kopiskribi la vortaron state ke mankas Esperanto-vortaroj en la librovendejo. Fine, li deklaris ke nun li kaj maljunaj esperantistoj preparas fondi Esperanto-Asocion de nia urbo, kaj la prezidanto estos Juano ĉefdirektoro de Vespera Ĵurnalo de nia urbo, kaj ĉefdirektoro Juano ankaŭ estas grava membro de la urba registaro...Tiutempe instruanto Lu kapjesis kelk-foje kun silenta konsento...”

“Kio okazis poste?” Ĵurnalisto ankoraŭ interesiĝas.

“Fine de Decembro 1979 finiĝis la Esperanto-kurso en la strateto Grenvoja de la urba centro, kaj komence de Junio 1980 fondiĝis Siana Esperanto-Asocio en Vespera Ĵurnalo de nia urbo. Mi kaj restintaj kursanoj fariĝis unuaj membroj de Siana Esperanto-Asocio.”

“Ĉu finiĝas via rakonto?” demandis Ĵurnalisto.

“Jes, finiĝas. Mi jam rakontis la unuajn lecionojn de Esperanto, kiujn mi spertis antaŭ ol 40 jaroj. Nun mi jam estas maljuna esperantisto eĉ pliaĝa ol la maljuna Sji kaj instruanto Lu, kiuj jam forpasis antaŭ multaj jaroj. Sed mi neniam forgesas la la unuajn lecionojn de Esperanto.” ◆

2026 – AMU VIN MEM

二零二六好好爱自己

Ĉina popkanto kreita de anonima aŭtoro

Mi tre sopiras,
sed ne povas veni,
mi volas vidi,
sed ne povas veni.
Tiom mi vin amas,
nur en sonĝoj restas.
Venas la malvarm', do
zorgu bone pri vi.

Dudek kvin foriris,
dudek ses alvokas.
En la nova jaro,
estu malpli da zorgoj.
Neĝo falas sur ŝultroj,
kiu restos ĉe vi nun?
Ke la amata homo
estu ĉiam apud vi.

Tiu konata nom',
neniam forgesbla.
Mi vin ĉiam gardos,
profunde en la kor'.
Malĝoja melodio
vin denove vokas.
Poste, poste,
vi fariĝos memor'.



Trad.: [John Huang](#)



Ŝtona Konfeso

—El miaj kuriozaj sonĝoj

Miao Hui



Kiam mi instruis en iu montara mezlernejo, anstataŭ reveni hejmen iudimanĉe, mi iris sola en la profundan montaron kaj ekgrimpis la plej altan monton. La monto estas multe pli alta ol mi supozis, kaj mi ekŝvitis ĉe ĝia talio. Kiam mi atingis la montpinton, mi jam baniĝis de ŝvito. Tiam mi estis tiel laca, ke mi ne povis ĝui la belan panoramon starante tie sed kuŝiĝis sur herbaron ĉe granda ebena roko por ĝui la komfortan ripozon. Supre la ĉielo lazuris senlime kaj senfunde, blankaj nuboj malrapide naĝis en ĝi kvazaŭ velŝipoj kaj belaj birdoj rondflugis en la aero kvazaŭ marbirdoj; sube la sorĉaj papilioj flirtis, kaj la koloraj floretoj ornamis la verdaĵon kaj sin svingante en la brizo, eligis plaĉan parfumon. Mi kuŝis tie senmove, ĝuante la belan bildon super mia kapo, ĝuante la aroman parfumon, ĝuante la dolĉan komfortecon, ĝuante la pasian ventkareson, ĝuante...

Subite ekaŭdiĝis ve-spiro. Mi eksidiĝis kaj serĉis la suspiranton, sed en mia vidkampo estis neniuj. Tuj kiam mi rekuŝiĝis, venis alia suspirsono longa sed ne laŭta. Estas aliulo krom mi sur la monto, Vere! Mi stariĝis salte kaj demandis pretervole:

"Kiu? Kiu ve-spiras?" "Mi," venis voĉo softa sed trista.

Rigardante ĉirkaŭen, mi ankoraŭ povis trovi neniun. Mi ekmiregis.

"Kiu? Kie vi estas? Kial mi ne povas vidi vin?" mi pafis miajn demandojn sinsekve.

"Ne miru. Jen parolas mi, ŝtonbloko ĝuste antaŭ vi."

"Kio? Ŝtonbloko? Neimageble!" Mi ekkriis des pli mirigite, "Ĉu ŝtonbloko povas paroli? ! Eĉ se vi povas, mi ja ne komprenas vin, ĉar mi komprenas nenan lingvon krom la ĉinan kaj Esperanton, kiuj estas nur homaj lingvoj. "

"Jen kial vi komprenas min. Mi parolas en naturlingvo, kiu tre similas al via Esperanto. " La ŝtonbloko respondis afable kaj ĝentile.

"Naturlingvo? Pri tio mi ja neniam aŭdis."

"Eble. Ĝi estas la komuna lingvo de nia naturo, same kiel via Esperanto en la homa mondo. Eble via majstro kreis Esperanton laŭ nia naturlingvo."

"Interese! Do ankaŭ en la naturo troviĝas Esperanto!"

"Jes, vi rajtas tiel diri. Ni ja estas samideanoj."

"Jes, mi konsentas. Sed... Ĉu estas vi, kiu suspiradis?"

"Jes, estas mi," la ŝtono faris alian longan elspiron.

"Kial vi suspiradas?" mi demandis scivole.

"Mi tristas kaj ĉagreniĝas de soleco kaj kora sufero," respondis la ŝtonbloko.

"Kial?"

"Lasu min rakonti al vi. Mi vere ĝojas, ke mi renkontas vin, la unuan, kiu volontas interparoli kun mi. Ĉu vi volontas fari al mi eventualan favoron?"

"Jes. Se necesas, tio ja estas mia granda honoro."

"Dankon. Vi ja estas vere bonkora kaj fervora. Nun mi rakontu al vi pri mia historieto...

"Mi estas bagatela ŝtonbloko, naskita kune kun miaj aliaj gefratoj de nia patrino antaŭ tre tre longe. Kiom longe, mi jam ne memoras klare. Eble centoj da jaroj, eble miloj da jaroj de via homa mondo. Tuj post mia naskiĝo, mi ekkuŝis senmove, silente kaj pacience kiel miaj gefratoj kaj aliaj. Sed iom post iom mi enuis kaj eksuferis de la senfara kuŝado, ĉar mi ja estas denaske viglema. Mi ĉagreniĝis tiel, ke mia animo ja neniel povis konsoliĝi de ĉarmaj floroj, flirtemaj papilioj kaj sonĝe sorĉa herbaro. Antaŭ nelonge, mi ekaŭdis, ke en nia naturo sintrovas Naturlingvo, per kiu oni povas interparoli libere kun ĉiaj naturlingvistoj en la tuta naturo. Do mi ekmemlernigis min per tiu nobla kaj sankta lingvo por forpeli la senfaran enuon, spite al la deadmonado kaj malhelpado far' de miaj gefratoj kaj amikoj. Mi lernis, lernadis sinforĝese ĝis kiam mi tute havigis al mi tiun ĉi lingvon. Ĉiuj el nia ŝtonaro mokas kaj molestas min pro mia "frenezeco", ĉar laŭ ilia opinio, ni ŝtonoj ja povas nek kuri kiel bestoj, nek flugi kiel birdoj kaj neniam povas vojaĝi en la naturo dum nia tuta vivo kiel la vento, la suno kaj aliaj. Ni nur devas kaj povas kuŝi tie ĉi pacience, senzorge kaj kviete por ĝui la fabelan vivon en tiu ĉi feolando. Tial ni neniam plu bezonas alian lingvon krom la ŝtonan kaj tiu ĉi Naturlingvo ja estas centpocenta sensencaĵo kaj absurdaĵo por ni ŝtonaro. Mia koro deŝiriĝas de oniaj nekomprenejo kaj mokado kaj molestado. Neniam konsolon mi povas trovi de miaj ĉirkaŭkuŝantoj. "

"Ĉu ne de via panjo?"

"Mia panjo? Ve—. Ŝi jam delonge forpasis, por naski nin. Ĉe ni ŝtonaro la patrinoj ja ne povas kunvivi kun siaj infanoj. Nia naskiĝo ja signifas la morton de niaj patrinoj. Ĉe ni ja estas tute malsame ol ĉe vi homaro, kiu povas sidi ameme en la patrina sino kaj ĝui la patrinajn kareson, kison kaj konsolon. Mi vere envias vin pro tio... Ne plu parolu pri tio. Tio nur pliigas mian malĝojon. Por forpeli la ĉagrenon, trovi la vivplezuron kaj praktiki mian Naturlingvon, mi kiel eble plej ofte interparolis kun la suno, la vento kaj aliaj samideanoj. Sed tamen, tio portis al mi pli da ĉagreno ol plezuro. Pere de Naturlingvo, mi informiĝis, ke ni ŝtonaro ja ne estas tiel senutila kiel oni opiniis. Ni ja povas ludi ne malgrandan rolon en konstruado de via homa mondo. Se ni ne revu pri la gravurita artaĵo, ni ja estas taŭga por konstrui domojn, pontojn, pavimi la ŝoseojn kaj esti uzitaj en aliaj okazoj. Tio vekis mian novan deziron. Mi ja ne volas tiel banale pasigi mian vivon kuŝante senfare kiel la aliaj. Ankaŭ mi volas fari ion por esti ne tiel senutila! Sed kiu el nia ŝtonaro komprenus min kaj helpus min? Ili ja ĉiam prenas ĉiujn miajn korajn dezirojn kiel deiraĵojn kaj per tio mokas kaj molestas min. Estas malbeninde, ke mi naskiĝis en tia malproksima montaro, kie homoj malofte venas. Kaj estus pli bone, se mi ne estus klerigita per tiu ĉi Naturlingvo! Sed nun? La suno foje diris, ke se mi ne estus tiel fora de la homa mondo, oni certe elektus min kiel materialon por arta gravuraĵo. Pri tio mi eĉ ne aŭdacas sonĝi, tamen mi estas certa, ke mi ne estas malbona materialo por via konstruado. Se mi estus proksima al via homa mondo! Ne povante moviĝi per mi mem, kiel mi povos esti en mia dezirata loko? Birdeto tre kompatis min, sed ŝi ne kapablas helpi al mi, kvankam ŝi volegas, ĉar mi ne estas tiel malgranda kiel grajno, kiun ŝi povus porti per sia beko. Vento ankaŭ diris, ke se mi estus tiel malpeza kiel sablero, li certe povus preni min en sian sinon kaj porti min al via homa mondo.



Ankaŭ la... Ve al vi! Kiel mi volus esti proksima al vi kaj esti utiligita! Sed kiu povus helpi min realigi mian longjaran koran deziron? Nur vi, ĉiopova kaj potenca homo! Sed antaŭ ol vi, neniu el via homaro volis interparoli kun mi, ĉar ili opiniis, ke mi estas stulta ŝtonbloko. Kiel mi deziras liberigi min el tiu ĉi damninda situacio kaj pruvi mian utilecon. Eble vi opinias min tro aroganta, kaprica kaj songema, tamen mi ne koleras pri tio, ĉar mi jam elportis la pli grandan afliktiĝon. Mi nur volas ne esti tiel sentaŭga kaj senutila! Estimata samideano, permesu al mi tiel nomi vin, ĉu vi volantas kompreni min, la tristegan? Se vi volontus helpi al mi, mi neniam plendos pri la penado kaj neelportebleco de mia laboro. Eĉ se vi uzus min en konstruado de via necesejo, mi ja volontus esti disponita de vi laŭ via plaĉo. Mia estimata, ĉu vi komprenas mian koron? Ĉu vi volontus etendi viajn bonfarajn kaj fervorajn manojn por fari al mi favoron? Mi deziregas, ke jes! Helpu min, mi petegas... “

Plorpetante, la ŝtonbloko subite etendis siajn brakojn kaj tiris min je la basko. Vidante tion, mi ekbedaŭris pri li kaj kunsentis kun li, ĉar en la homa mondo ankaŭ mi estas en la malbeninda situacio kia de li. Mi etendis miajn brakojn por preni liajn manojn...

"Ho ve!" kun ekkrio mi vekiĝis de subita doloro je mia fingro. Mi frapis mian fingron kontraŭ la ŝtonbloko!

Stariĝinte, mi ekvidis la grandan ebenan ŝtonblokon kuŝanta antaŭ mi en la herbaro. Fiksante mian rigardon al ĝi, mi ekmeditis... ♦

SUPERANTE ANTAŬJUĜON POR AMO AL LA DIFERENCO



Ieda Freitas

Nur la am' igas nin bone
Antaŭ juĝ' igas nin malbone
Kaj la vero por ni estas
La modelo de jesu'
Nia lumigita gvidilo
Ekzemplo de humileco
Antaŭ juĝ' igas nin malsanajn
Nur la am' igas nin bone
Tio estas la realaĵo
En la mond' kie ni vivas
Detruante la barojn
Ekzistantaj inter ni.
En la politiko, kaj religio
Kaj socia ankaŭ.
Vidante niajn fratojn
Sen distingo de koloro
Ni estas kompromitaj animoj
Klopodante progresi.
Denove profitante
La bela oportuneco
Diferenco inter ni
Neniam plus ekzistos
Kaj jen la unuigo
De la tuta Homaro



neĝis

Harri Ikonen



**finfine neĝis!
neĝo kiel l'kovrilo por
dormi trans l'vintron.**

River-Animo kaj Ĵuro

Ĉina ampoemo

Batalanto



Prologo: Rito de Sala Kristalo

River-nebulo,
vual' sur orelo de printempa rev';
Ni, sur la verda altaro de l'ondoj,
eteron enplantas en salan kristalon.
Leviĝas steloj, gardantoj de nia amo;
Unu sablero memoras vian nomon,
pli dura ol la tempo mem.

Prezenco de Foresto

Ŝaŭmo sur la dika ŝnur' —
forlasita kiso revivas en la vent';
Luno ĉe la mastopinto —
ŝia okulo senlarma, ĉiam vigla.
Ŝi ne volas ĵurĉenon,
nur signalon de hejmenvekiĝo:
“Kiam steloj forbrulos,
turnu la pruon al mia brusto —
tio estos la plej alta bordo.”

Epitafio: Kroniko de Cikatroj

Ho, vi, kiuj maltrafis min, ŝipistan edzinon,
vi ne komprenas: virino sin vivigas river'.

Mia flu' celas nur unu — unu maron;
Mia fideleco — cikatro en la rivera kuŝejo,
nesaniĝebla, kaj sen pripens'.

Fino: Eterno laŭ la Tajdo

Kiam la lasta tirkanto silentiĝas,
nia amo plu leviĝas —
en la kora rivero,
kaj iĝas amo-mar.

Nomante la Sichuan-riveron,
per eterna koro —
Mi amos vin, ĝis la tajdoj forgesos.



*Kulturaj notoj

1. sala kristalo: Siĉuana putsalo, 2.000-jaraĝa metio, ĉi tie fariĝas minerala atestanto de eterna amo.
2. ond-vino: neologismo, "ondedzino"; la poetino dissolviĝas en la riversistemon.
3. tirkanto: riverspuristo, la homa motoro de la fluo de la Tri-Gorĝoj; lia kanto estas la pulso de la valo.

Temas pri Morto

Gajo



Morto fakte estas ne timinda!
Ĝi okazas laŭ regulo de l' granda Naturo!
de neniam al nun, al la senfina onteco
homojn ĉiujn nepre trafas la torturo!


Ĉu impona reĝo, ĉu popolano,
ĉu altrangulo, ĉu simplulo,
neniu povas sin meti en escepto!
tiel estas ankaŭ jen mi, kadukulo!

Juneco, oldeco, malsano kaj morto
estas dum homa vivo kvar sezonoj!
el mia vivo morto estas necesa parto,
per tio mia vivo obeas laŭ rezono!

nun, miaj gefiloj havas sian familion,
miaj genepoj viglas pompe kiel floroj.
Esperantaĵojn mi sendis al E-Muzeo,
kio malŝargis min de la tuta koro!

mi kredas, iuj homoj longe vivas
en homa memoro pere de sia verko!
ĉi tio ja estas unika metodo espera!
Mi bezonas nur poemojn, for fiĉerko!

Ĉiu tago estas donaco de kara Dio,
kiun mi devas trasperti kun ĝojo!
se la fina momento venos al mi,
certe mi kun rideto iros al la vojo!



La Sorto de Aina

Ranja Zafinifotsy

Daŭrigante la enhavon de numero 007



La vivo daŭris. Ni devis translokiĝi al pli malgranda domo, ĉar la malnova estis tre granda kaj malplena sen panjo. Kaj la luprezo estis iom multekosta por mi.

Mi laboris ĉe la domo de la patrino de Fitia, matene kaj posttagmeze, instruante klasojn, kiujn ŝi pagis por mi.

Ĉiusemajne, mi, Tendry kaj Valisoa promenis kune. Foje ni iris al la parko, foje ni iris al la kamparo. Tio permesis al ni ne pensi tro multe pri panjo.

- „Aina“, plendis Valisoa, „ĉu estas ankoraŭ malproksime?“

- „Ne, mi respondis. Ni baldaŭ alvenos.“

- „Ĉu vi foje pensas pri panjo?“

- „Jes, kompreneble. Mi pensas pri ŝi preskaŭ ĉiam.“

- „Kaj vi, Tendry?“

Tendry levis la ŝultrojn. Ekde la morto de la patrino, li fariĝis avara pri siaj vortoj.

Oni devis fari al li demandojn por igi lin paroli, alikaze li povus silenti la tutan tagon.

- „Tendry, mi havas demandon.“

- „Jes, granda fratino.“

- „Ĉu vi jam havas amatinon?“

- „Ah, kio?“, li diris kun larĝe malfermaj okuloj

- „Vi aŭdis.“

- „Ne, mi ne havas. Mi ja havas nur 14 jarojn nun.“

- „Estas en ordo tiam. Koncentriĝu unue je viaj studoj.“

- „Jes, kaj vi? Ĉu vi baldaŭ edziniĝos?“

- „Ne diru sensencaĵojn, frato!“

- „Se vi edziniĝos“, kriis Tendry, „ĉu vi forlasos nin?“

- „Kompreneble ne, karulo. Neniam mi vin forlasos.“

- „Cetere, diris Tendry heziteme, mi volis demandi vin, ĉu vi havas iom da mono por aĉeti novajn kajerojn. Studentoj ridas pri mi en la lernejo, ĉar ĉiuj miaj kajeroj estas en malbona stato.“

- „Bone, mi aĉetos al vi hodiaŭ vespere, ne zorgu.“

- „Dankon, granda fratino.“

Mi multe laboris ĉiutage kaj nokte por provizi mian etan familion. Iliaj studoj estis mia prioritato. Mi havis grandan revon por ili, mi volis, ke Tendry fariĝu advokato kaj mia eta Valisoa fariĝu kuracistino. Sed ili havis siajn proprajn revojn.

Unu vesperon, ni ĵus finis la vespermanĝon, mia frato kaj mia fratino estis dormontaj, kiam la telefono, kiun Fitia donacis al mi, sonoris. Mi rapide ekprenis ĝin. Je mia surprizo, timigita, tremanta voĉo atendis min. Fitia ploris. Ĉar ŝi neniam revenis al la domo de sia patro, ŝia patro planis mortigi ŝin. Li timis, ke lia propra filino denuncos lin al la aŭtoritatoj.

Feliĉe Sarobidy, la duonfrato de Fitia, aŭdis ĉion. Li tuj informis la patrino de Fitia kaj ŝi rakontis pri tio al sia filino. La sola solvo estis sendi Fitia al alia lando, ĉar la gardistoj de sinjoro Salvador estis pli multaj kaj potencaj ol la patrino de Fitia.

Evidente, Fitia ne volis foriri. Ni amikiĝis tiel, ke estis preskaŭ neeble disiĝi. Ŝi provis konvinki sian patrino trovi alian eliron, sed estis neniu, krom morto.

La sekvan tagon, ŝi intencis preni aviadilon al fremda lando. Tio signifis, ke ni ne havos tempon por adiaŭi. Sed neniel mi povis lasi mian amikino iri sen akompani ŝin. Mi prenis mian mantelon kaj kuris al ŝia domo, kiu estis 3 kilometrojn for de la mia. Mia timo pri nokto kaj mallumo subite malaperis. Mi nur volis vidi mian amikino. Brakumi ŝin tiel forte, ke ŝi ne forgesos min, kiam ŝi alvenos al sia nova hejmo.

Mi transiris la urbon per longaj paŝoj. Ĉio estis tiel trankvila, la nokto estis profunda kaj la luno ankoraŭ ne aperis; aŭtoj estis malabundaj en la strato. Subite senhejmaj hundoj aperis por tremigi min pro timo. Ili pretis mordi min krude, sed feliĉe viro ĉirkaŭbrakis min kaj kondukis min en sian aŭton. Mi ne sciis, kiu li estas, probable ankaŭ li ne konis min.

- „Kien vi iras?“ , li demandis min. „Estas mallume kaj vi promenas sola sur la strato, do ĉu vi ne timas?“

- „Fakte, amikino de mi foriros morgaŭ. Se mi ne iros al ŝia hejmo hodiaŭ vespere, mi eble neniam revidos ŝin.“

- „Ho jes? Ĉu ankoraŭ malproksime?“

- „Ne, estas unu kilometron for. Sed vi povas lasi min ĉi tie, ne plu estas hundoj.“



La mistera viro ridis. Li daŭre fikse rigardis min per siaj brunaj okuloj. Embarasite, mi turnis la kapon por admiri la belecon de la urbo. Sed dum la tuta tempo mia penso estis ĉe li, ĉe tiu ĉi nekonato, kiu aperis de nenie kaj savis min. Li estis aparte bela: lia eta pinta nazo, liaj dikaj brovoj, liaj haroj, kiuj kaŝis parton de lia frunto. Ĉiuj ĉi detaloj formis lian belan vizaĝon. Mi ne sciis la nomon de lia odoro, sed ĝi ebriigis min. Ial mia koro komencis bati pli rapide, mi sentis min pli kaj pli malkomforta apud li. „Kio okazas?“, mi pensis.

La motoro fine haltis. Mia mistera viro elkuris kaj tiam malfermis la pordon por mi. Kiel brava li estis! Eta „dankon“ eliris el mia buŝo, kaj mi rapidis eksteren. Mi eĉ ne rimarkis, ke mi jam estis antaŭ la domo de Fitia. Sed kial tiu ĉi viro sciis, ke mi devis iri ĝuste al tiu ĉi loko? Mi ne sciis.

- „Venu!“, li diris. „Ĉi tien vi volis iri, ĉu ne?“

- „Jes“, mi respondis malrapide. „Sed kiel vi sciis tion?“

- „Mi jam vidis vian bildon sur la telefono de mia fratino. Mi estas Sarobidy, la duonfrato de Fitia.“

- „Ah! Mi komprenas pli bone nun. Sed kial vi ne diris tion al mi?“

- „Mi volis surprizi vin.“

- „Nu, vi faris.“

Estis jam malfrue, kiam ni alvenis antaŭ la domo. La malvarmo pli kaj pli fortiĝis, kaj la vento disblovis miajn harojn tuj kiam mi elpaŝis eksteren.

Post parkado de sia aŭto, Sarobidy prenis mian manon kaj kondukis min al la luksa domego.

En kontakto kun lia varma mano, mia koro denove bategis.

„Ĉu mi enamiĝis?“, mi demandis al mi. Enamiĝinta al fremdulo? Eble! Finfine, li estis tre bela kaj alloga, mia koro ne povis ne bati por li. Mi provis kaŝiĝi profunde en ĉi tiu stranga sento, sed mi ne povis. Mi tremis. Mia frunto estis inundita de ŝvito, malgraŭ la frosta malvarmo.

- „Ĉu en ordo?“, demandis Sarobidy.

- „Jes, kial?“, mi diris, ŝajnigante scii nenion.

- „Vi tremas, sed vi ŝvitas samtempe. Mi pensas, ke vi malvarmumis. Jen, surmetu mian jakon kaj venu.“

Mi estis tiel feliĉa. Havi lian jakon super miajn ŝultrojn estis kiel sonĝo. Kion pli mi povus esperi? Ja li neniam povis ami min. Ni estis tiel malsamaj sur ĉiu nivelo. Do mi ĝuis la momenton.

La pordo al la domo estis malfermita, homoj certe atendis la alvenon de Sarobidy. Fitia vidis min eniri kaj estis tre surprizita; ŝi alkuris por kisi min, frustrante, kiel feliĉa ŝi estis vidi min.

Dume Sarobidy alproksimiĝis al sia bela patrino kaj kisis ŝin ame sur la fronton. La patrino de Sarobidy, certe sentante la molajn lipojn de sia vicfilo, ridetis iomete kaj poste levis la brakon por karesi la harojn de la knabo.

Mi scivolis, kial Fitia diris, ke ŝiaj duonfratoj kaj duonfratinoj ne ŝatas ŝin. Sarobidy ne avertus ŝin pri la danĝero, kiu atendas ŝin, se li malamus ŝin. Kaj li ne venus tiel malfrue por adiaŭi ŝin. Sed eble io okazis en ilia familio, kio igis Sarobidy ŝanĝi sian sintenon al Fitia. Mi ne sciis. Mi imagis ĉion ĉi en mia menso.

Sarobidy rompis la silenton, kiu regis en la ĉambro.

„Fitia“, li diris, „ni petu iun prepari varman teon por Aina. Mi pensas, ke ŝi malsaniĝos.“

Fitia ne respondis. Ŝi nur kapjesis kaj tiam rapidis al la kuirejo kaj subite revenis kun taso da teo en la mano.

- „Al kiu lando vi iros?“, mi demandis, rigardante mian tason da teo.

- „Mi restos ĉi tie, mi nur ŝanĝas la urbon.“

- „Tio estas tro riska“, diris Sarobidy. „Se vi restos ĉi tie, paĉjo trovos vin kaj mortigos vin, mi certigas al vi.“

- „Ne zorgu, knabo“, la patrino de Fitia mallaŭte respondis. „Ni jam planis ĉion, por ke via patro neniam trovu ŝin.“

La servistoj finis enpaki la aĵojn de Fitia en la valizojn. Estis tempo por adiaŭi. La panjo de Fitia ekstaris por ĉirkaŭbraki sian knabineton. Larmoj fluis laŭ ŝia dolĉa vizaĝo; ŝi havis tiom da malĝojoj kaŝitaj profunde en la okuloj. Tio kompreneblas, ŝi perdis multon en sia vivo, tiu ĉi virino. Ankaŭ mi preskaŭ ploris.

Du fortaj viroj prenis la valizojn. Fitia eniris la aŭton kaj la motoro ekfunkciis. Aŭdiĝis la bruado, kiu iom post iom malaperis. ♦ [Daŭrigota](#)



MI ESTAS

Sabin Maruhe



Iun tagon, mi forlasos ĉi tiun mondon,

Kaj mi neniam revenos.

Vi ploros kiam vi vidos mian vizaĝon

Aperi sur via silenta telefono.

Vi sopiros min

Kiam soleco venos frapi vian koron.

Vi jam ne aŭdos mian voĉon,

Aŭ mian ridon... neniam plu.

Mi jam ne estos tie

Por ridigi vin,

Por ĝeni vin,

Kaj poste reveni al vi por peti pardonon.

Vi malfacile kredos,

Sed mi estos for,

Malproksime... por ĉiam.

Do ĝuu mian frenezecon,


Mian mallertecon,

Mian ĝojon de vivo,

Antaŭ ol mi fermos miajn okulojn por ĉiam.

Antaŭ ol la tempo forglitas de ni,

Antaŭ ol estos tro malfrue.



Kiam la jaro endormiĝas

La jaro endormiĝas sur lito de memoroj,
Kun siaj oraĵoj de ridado kaj spiroj.
Ĝi spertis niajn fortojn, silenton kaj batalojn,
Ĝi foriras kviete, sed ne forviŝiĝas.

Larmoj fluis, revoj ekfloris,
Nekonataj vojoj, kiujn ni devis ami.
Amikoj, forestantoj, neatenditaj momentoj,
Skribis en niaj koroj vivitajn ĉapitrojn.

La ĉielo ŝanĝis mil fojojn de koloroj,
Kaj ĉiu tagiĝo portis sian lumon.
Foje ni dubis, falis, rezistis,
Sed ĉiu tago estis brilo.

Je la lasta vespero ni fermas la kurtenon,
Ni lasas bedaŭrojn degeli kiel haŭto
De frukto gustumita ĝis la lasta guto,
Kaj ni benas la jaron por ĝiaj defioj.

Ĉar eĉ se tagoj foje doloris,
Ili instruis nin pli bone ami kaj pensi.
Do rigardante la novan jaron alveni,
Ni paŝas pli fortaj, pretaj rekomenci.



Jerubbaal Banyanga



Momenteto

Luo Shuigen

Daŭrigante la enhavon de numero 007



En 1979, kiam mi revenis de Heilongjiang farmo por transpreni la postenojn de mia patro en lia laborejo, mia unua ago estis skribi peton por rehonorigi mian patron. Nur en 1983, post kiam mi sukcese eniris la Zhejiang Provinca Departementon de Malpeza Industrio, la koncernaj instancoj oficiale nuligis ĉiujn pundeckojn kontraŭ mia patro dum la "Kultura Revolucio", nomante lin "kamarado" kaj redonante al li la klasifikon de "sendependa laboristo".

En la dua duono de 1966, kiam lernejoj daŭre ne funkciis kaj fabrikoj daŭre ne laboris, kiam la nacia ekonomio retropaŝis tridek jarojn, eksplodis en la tuta lando la fenomeno de "ĉeno-interkonekto". Sub la preteksto de "revolucia ĉeno-interkonekto", studentoj efektive vojaĝis tra la lando por turismi kaj amuziĝi, ĉiuj elspezoj por manĝo, loĝado kaj transportado estis kovritaj de la lokaj registaroj. Tiutempe studentoj ne plu estis klasifikitaj laŭ la "ruĝaj kvin kategorioj" aŭ "nigraj kvin kategorioj", sed reorganizitaj laŭ frakcioj. La ĉefaj grupoj estis "ribeluloj" kaj "imperiestraj protektantoj", dum la ceteraj studentoj, kiuj ne volis partopreni en la bataletoj, nature fariĝis "liberuloj". Ne nur mezlernejoj kaj universitataj studentoj vojaĝis tra la lando por "revolucia ĉeno-interkonekto" - eĉ mia dua frato, kiu tiam estis en kvina grado de elementa lernejo, kun kelkaj kunlernantoj ankaŭ partoprenis en "ĉeno-interkonekto". Kompreneble, pro sia juna aĝo, ili vojaĝis nur al proksimaj lokoj, de Hangzhou al Shaoxing, restis tie dum unu semajno, kaj revenis hejmen sen elspezi eĉ unu moneron, tre kontentaj.

Mi mem estis mezlernejo de la 1968-a generacio (efektive nur unua-jarulo). Mi formis "Longan Marŝan Teamon" kun studentoj de la tria jaro de supera mezlernejo, kaj ekmarŝis de Hangzhou al Jinggangshan. Nia teamo konsistis el pli ol dek homoj. La teamestro, nomata Yu, havis patron kiu estis direktoro de la Zhejiang Sporta Komitato. La "politika komisaro", nomata Cui, estis elstara studento de la tria jaro en Hangzhou Unua Mezlernejo. La patro de "komisaro" Cui estis orfo en sia infanaĝo, poste laboris en la publika sekureco post servi en la armeo - tipa "ruĝa kvin kategorio" kun pura klasfona. Mi havis tre bonan rilaton kun "komisaro" Cui, nia amikeco daŭris longe, kaj poste li fariĝis mia bofrato.

Nia Longa Marŝa Teamo ekiris de Hangzhou suden kaj post preskaŭ du monatoj atingis Nanchang en Jiangxi. Subite ni aŭdis informon, ke en la regiono de Jinggangshan epidemias meningito kaj transporto estas limigita, kaj la aŭtoritatoj petas studentojn ne plu veni tien. Proksimiĝis ankaŭ la Printempa Festo de 1967, do mi kaj alia studento de la tria jaro, nomata Wei, decidis reiri rekte al Hangzhou per trajno. Tiutempaj verdaj trajnoj estis tre malrapidaj, kaj ni alvenis hejmen nur en la dua tago de la nova jaro.

Wei ankaŭ estis elstara studento de la tria jaro en Unua Mezlernejo de Hangzhou. Li ŝatis ludi ŝakon kaj goon, kaj havis bonan nivelon en ambaŭ - kiel mi. Dum certa tempo mi vizitis lian hejmon ĉiutage por ludi kaj interŝanĝi spertojn. Wei loĝis en la dormejo de Zhejiang-a Agrikultura Universitato en Wuya Lane. Lia patro estis profesoro en tiu universitato, alta intelektulo, kiu estis etikedita kiel "dekstrulo" en 1958. Tiu peza politika ĉapelo ĉiam premis Wei kaj malfaciligis lian spiradon. Poste li iris kamparon en Tonglu, en la sama produktteamo kun Xu Xiaohu, filo de la matematika instruisto Xu Shizhong de Unua Mezlernejo de Hangzhou. Wei edziĝis kun loka knabino kaj efektive enradikiĝis en la kamparo por la tuta vivo. Post la restarigo de la altlerneja enira ekzameno, Wei ne partoprenis, kio estis tre bedaŭrinda afero.

La 'Kultura Revolucio' daŭris senŝajne sen ia halto, sed la vivo devis plui. Kvankam ne estis lecionoj kaj kultura scio ne estis lernata, bazlernejoj devis fini siajn ses jarojn, kaj mezlernejoj ankaŭ ne povis resti en lernejo senfine. Kion fari? Venis nova nacia politiko: ĉiuj mezlernejoj devis iri al kamparo por ricevi reedukadon de la malriĉaj kaj mezaj kamparanoj; bazlernejoj povis eniri proksimajn mezlernejojn sen ekzamenoj, simple laŭ sia loĝloko. En epoko kiam eĉ blanke subskribintoj povis eniri universitatojn, ĉi tio estis senprecedenca en la historio de Ĉinio.

Eĉ la plej antaŭvidema homo kun riĉa imago ne povus diveni ke studado finiĝus per iri al kamparo. La tasko mobilizi la junajn intelektulojn (ses jaroj da mezlernejoj) por iri kamparen estis tre malfacila. Loĝkvartalaj funkciuloj, pro najbaraĝaj rilatoj, ne volis tro severe agi, krome ili mem havis infanojn kaj ne deziris sendi ilin kamparon. Laboristaj propagandaj teamoj ekestis, grandnombre enirante ĉiujn stratojn kaj loĝkvartalojn. Kvankam nomitaj propaganda teamoj, ili aspektis kiel kruelaj demonoj. En nia kvartalo, la teamestro Jiang (samnoma kun Jiang Jieshi) aspektis kiel la "Eta Kapitulo" en la desegnofilmo - lia kapo similis olivkernon, pinta ambaŭflanke. Li ĉiam portis malvarman mienon kvazaŭ en lia familio okazis funebro, kiu igis ĉiun senti teruron. Se infano en la kvartalo ne ĉesis plori, oni nur bezonis diri "Teamestro Jiang venas" kaj la infano tuj silentis. Antaŭ ol la "Kultura Revolucio" finiĝis, Teamestro Jiang estis kondamnita pro huliganismo kaj sendita al reforma laborkampo.

Ĉiutage la propaganda teamoj kunigis la tiel nomatajn "junajn intelektulojn" (antaŭe tri jaroj da mezlernejoj), unue por admonoj, poste por studado - ĉiutage la sama fama verko "Troa Laborforto Trovis Elirejon". Apud nia domo estis mallarĝa strateto - Wangmin-strato. En ĝi loĝis junulino, mezlernejo de 1966, kiu jam havis koramikon. Profunde enamiĝinte, ili sekrete gustumis la malpermesitan frukton kaj ŝi gravediĝis. Por plenumi la taskon sendi junulojn kamparon, la propaganda teamo faris ŝin ekzemplo, alpendigante al ŝi multajn senbazajn akuzojn: morala putriĝo, kontraŭstaro al la "Kultura Revolucio", opozicio al la superaj indikoj ktp. La teamo laboris triŝife, ĵurante venki ĉi tiun obstinulan fortikaĵon. Kvankam ŝi aspektis delikata kaj gracia, ŝia karaktero estis eksterordinare firma. Post kelkaj tagoj de premo, ŝi elĉerpiĝis kaj dum hejma paŭzo trinkis toksan "DDVP". Kvankam ŝia familio tuj portis ŝin al Hangzhou-a Ren'ai-hospitalo (nuna Ruĝgvardia Hospitalo), estis tro malfrue. Juna belulino tiel forpasis, kun sia naskota infano.



Unue la propaganda teamoj organizis studgrupojn por la junuloj. Se ili ankoraŭ rifuzis iri kamparon, la teamoj kontaktis la gepatrojn kaj organizis studgrupojn en iliaj laborejoj post laboro, ĝis la junuloj konsentis iri kaj forigis siajn loĝlokajn registrojn. Forigi registron prenis nur minuton, sed reenregistri poste postulis jarojn da tempo kaj peno. En mia familio estis ok gefratoj kaj ni estis malriĉaj. Kiel plej aĝa filo, se mi ne irus kamparon, kiu iru? En la unua tago de studgrupo, mi memvolonte aliĝis al la Heilongjiang-a Produktokonstrua Armea Grupo, poste asignita al la 30-a Regimento de 3-a Divizio. Kvankam malproksime, tie mi povis ricevi 32 juanojn monate kaj sendi hejmen 15 juanojn por subteni la familion - multe pli bone ol ordinara kampara enloĝiĝo.

La 25-an de majo 1970, la junuloj destinitaj al la 30-a Regimento de Heilongjiang unue grupige suriris la trajnon ĉe Hangzhou-a Zhakou-stacidomo, per speciala trajno. Ĉi tio estis la lasta grupo de Hangzhou-aj junuloj irantaj al Heilongjiang. La platformo estis plena de adiaŭantoj - plejparte gepatroj, gefratoj, kunlernantoj kaj amikoj. Kiam la trajno ekfajfis kaj ekmoviĝis, la platformo pleniĝis per korŝira plorado, neeltenebla rigardi. Poste la registaro malpermesis fajfi por junulaj specialaj trajnoj. Mi antaŭe petis ke neniu akompanu min - mi ne volis vidi familian ploron nek riski perdi mian emocian kontrolon. Poste mia patrino diris ke mia patro ploris post mia foriro - lia unua fojo larmi.

Junuloj ne volis iri kamparon, gepatroj ne volis ke iliaj infanoj finu studadon tie. Se unu familiano iris kamparon, la tuta familio maltrankviliĝis, kaj multaj familoj havis plurajn gefilojn tie. En kamparo mankis tero kaj greno, kaj lokanoj ne bonvenigis la junulojn. La ŝtato elspesis entute 30 miliardojn juanojn por subteni la junulojn en kamparo. Tiuj 30 miliardoj aĉetis nur tri malkontentojn. ♦ *Daŭrigota*

La Ĝenoj de Kabi (2)

Viktoria

Daŭrigante la enhavon de numero 007



Post ferioj, la filo revenis al Kantono kun Kabi kaj la katoj. La aero en Kantono ankoraŭ retenis la postvarmon de la Printempa Festo. Kabi kaŭris sur la fenestra breto, liaj okraj okuloj rigardis la aŭtojn malsupre moviĝantaj kiel ludilaj veturiloj. La filo ĵus ordigis la lastan pakaĵon, kaj turninte sin, li vidis ke Kabi denove lasis flavetan markon sur la sofo.

"Jen denove," la filo suspiris, kaj kaŭriĝinte li karesis la lanugan kapon de Kabi. Kabi levis la kapon; en liaj klaraj okuloj ŝajnis kaŝiĝi nedirebla maltrankvilo. Li frotis sian vangon kontraŭ la mano de la filo, eligante ronron el sia gorgo, kaj tuj poste frotis sin kontraŭ la angulo de la apuda librobreto — alia marko.

Sen prokrasto, la serĉado de amo por Kabi komenciĝis vige.

La filo afiŝis mesaĝon en la amikrondo: "En hejmo ĉeestas belaspekta britmallonga kato, vira, arĝente gradigita, dujara, milda kaj sana, serĉas taŭĝan edzinon." La afiŝo estis akompanata de la plej ŝatata foto de Kabi, kie li kaŭras apud verdaj plantoj sur la balkono, la sunradioj orumante lian hararon.

Antaŭ ol pasis duonhoro, jam venis respondo. Lia malnova samklasano Dada sendis mesaĝon: "Mia Mimi ĝuste estas en ama periodo, blu-blanka britmallongulino, unu kaj duonjaraĝa, milda kaj ĉarma." Ili tuj interkonsentis kaj decidis ke dum la semajnfino Kabi "vizitos por ama rendezuo."

Sabate matene, kiam oni metis Kabin en la astronaŭtan dorsosakon, li ŝajne antaŭsentis ion kaj mjadaĉis maltrankvile. La filo kviete trankviligis lin: "Ni trovas amatinon por vi, estu bona."

Dada loĝis en la tria etaĝo de malnova loĝejkomplekso, la balkono plena je verda liro kaj pendanta klorofito. Mimi estis bela blu-blanka katino, kun okuloj kiel okraj vitraj globetoj. Kiam Kabi eliris el la dorsosako, Mimi tuj scivole alproksimiĝis, volante frotiĝi kontraŭ la nova gasto.

Sed Kabi leĝere forsaltis.

Li ne timis en la nekonata medio, sed anstataŭe promenis trankvile, esplorante ĉiun angulon. Mimi sekvis lin, kaj turniĝis sur la dorson antaŭ Kabi, montrante sian molan ventron — ĉi tio estas la plej alta kato-ekologia gesto montranta fidon.

Kabi nur ekrigardetis, poste saltis sur la fenestrobretreton kaj fikse rigardis eksteren la svingantaj branĉojn de fikuso.

"Eble li bezonas tempon por alkutimiĝi," Dada diris optimisme.

La filo kapjesis, lasis la frandaĵojn kaj ludilojn de Kabi, kaj foriris, ofte returnante la rigardon.

La unuan tagon, Kabi tute ignoris la afablecojn de Mimi. La duan tagon, li komencis monopoli la plej bonan lokon sur la sofo. La trian tagon, kiam Mimi provis dividi lian manĝaĵon, Kabi eligis avertan grumblon.

Post unu semajno, kiam la filo revenigis Kabin, Dada skuis la kapon kun rideto: "Via sinjoreto havas neordinare altajn normojn."

Hejmenreveninta Kabi denove komencis la markadan konduton, eĉ lasante sian "amdeklaron" en la novaj ŝuoj de la filo. Rigardante lian senkulpajn grandajn okulojn, la filo sentis ambaŭ koleron kaj ridon: "Mi trovis vin unu kaj vi rifuzis, nun vi denove agas tiel, kion vi volas fakte?"

Kabi nur frotis sin kontraŭ lia pantalono, saltis al la plej alta parto de la katogrimpejo, kaj rigardis malproksimen, kvazaŭ atendante ion.

Ŝanĝo venis en pluva tago. La amiko de la filo, Lifeng, telefonis: "Mi trovis forlasitan bluan britmallongan katino, ina, ĉirkaŭ unujaraĝan, ricevante kontraŭparazitajn kaj vakcinajn traktadojn. Post unu monato, se la originala posedanto ne troviĝos, ŝi povas renkonti vian Kabin."

Dum tiu monato, Kabi ŝajne iĝis pli maltrankvila. Li elsendis longajn kriojn profunde en la nokto, patroladis ĉiun ĉambron, kaj sidis ĉe la fenestro dum horoj, kvazaŭ atendante iun specifan figuron.

Fine, venis la tago de la renkontiĝo.

Kiam la blua katino, nomita "Porkina" alportiĝis en kartona skatolo, Kabi sin lekadis. Malfermiĝis la skatolo kaj Porkina elmetis sian rondegan kapon — tio estis tipa britmallonga vizaĝo, kun rondaj okuloj, rondaj vangoj, arĝent-bluj haroj brilantaj per fajnaj lumeroj en la sunlumo.

Dum momento, Kabi ĉesis ĉiun movon.

Li leĝere malsaltis de la katogrimpejo kaj malrapide, singarde marŝis al Porkina. Porkina ankaŭ elsaltis el la skatolo, sen timo, sen retiriĝo, simple staris trankvile. La du katoj renkontiĝis en la mezo de la salono, flaris unu la alian, kaj Kabi unuafoje aktive klinis la kapon, frotante sian vangon kontraŭ la flanko de Porkina.

Porkina respondis, ŝi eligis mildan ronradon kaj ankaŭ frotiĝis per la kapo.

La sekvanta sceno forprenis la spiron de ĉiuj homoj: la du katoj marŝis flank-al-flanke al la manĝujo, Kabi permesis al Porkina manĝi unue; ili esploris la balkonon kune, Kabi pacience atendis dum Porkina saltis sur malaltan tabureton; kiam la tagmeza sunlumo estis plej varma, ili kunvolviĝis sur la sofo, la kapo de Porkina kuŝante sur la dorso de Kabi.

"Sukceso!" la filo preskaŭ ĝojkriis.

Porkina oficiale iĝis membro de la familio. Ŝi ja havis iom da "porkaj" ecoj laŭ sia nomo — manĝemeco, dormemo, sed ankaŭ iom militema kaj sencedema protektante siajn ludilojn. Sed Kabi iĝis eksterordinare milda. Li cedis la plej varman sunban lokon, lekadis al Porkina la hararon malantaŭ ŝia kapo kiun ŝi mem ne povis atingi.

Post plia monato, la ventro de Porkina evidente iĝis pli ronda. La bestkuracisto konfirmis la feliĉan novon: "La atendo-tempo estas ĉirkaŭ la Printempa Festo."



Kabi ŝajne ankaŭ perceptis la ŝanĝon. Li akompanis Porkina pli ofte, kaj kiam ŝi ripozis, li gardis proksime, atentigante pri eblaj ĝenoj.

Antaŭ la Printempa Festo, falis raraj pluvetoj en kantono. Profunde en la nokto, Porkina komencis marŝadi maltrankvile. Ŝi elektis kaŝitan angulon sub la vesta ŝranko. La filo jam longe preparis naskoĉambron, sed Porkina insistis pri sia propra elekto.

Kabi ne dormis. Li kaŭris je ne tro proksima, ne tro malproksima distanco de Porkina, lia vosto svingante milde. Je la tria horo matene, naskiĝis la unua katido, blua katido simila al la patrino. Porkina lerte mordis la umbilikan ŝnuron kaj lekis la katidon. Kabi starigis sin, paŝis du paŝojn antaŭen, poste haltis, nur trankvile rigardante.

La dua katido havis la hararon de Porkina sed la okuloj jam montris la esencon de Kabi. Kiam naskiĝis la tria, la ĉiela horizonto jam heliĝis — ĉi tiu plej malgranda katido perfekte heredis la arĝente gradigitan hararon de Kabi.

Porkina lace kuŝiĝis, kaj la tri katidoj palpe trovis la fonton de lakto. Nur tiam Kabi malrapide alproksimiĝis. Li singarde flaris ĉiun katidon, poste milde tuŝetis la vizaĝon de Porkina per sia kapo, kvazaŭ dirante: "Vi laboris malfacile."

La filo nomis la tri katidojn Tom, Snow kaj Jerry. Porkina estis sindona patrino, preskaŭ neniam forlasante la naskoĉambron. Kabi transprenis la taskojn de gardado kaj provizado. Li memorigis al la homoj, ke estas tempo por aldoni manĝaĵon al Porkina. li gardis la katidojn kiam Porkina foriris por manĝi, li kaŭris ekster la naskoĉambron profunde en la nokto, liaj oreloj turniĝante, aŭskultante iujn ajn nekutimajn sonojn.

En la tago de la Lanterna Festo, la sunbrilo estis strange bona. Porkina unuafoje portis la tri katidojn al la loko en la salono kun la plej bona sunlumo. La katidoj jam malfermis la okulojn kaj ŝanceliĝe esploris la mondon. Tom estis la plej stabila, Snow la plej vigla, kaj Jerry ĉiam provis grimpi sur la dorson de Kabi.

Kabi kuŝis sur la planko, permesante al la katidoj grimpi sur ĝi. Kiam Jerry preskaŭ falis de la rando de la sofo, Kabi rapide leviĝis, kaptante ĝin milde per la nuko kaj metante ĝin reen en sekuran areon.

Porkina rigardis flanke, ŝiaj okuloj kuntiriĝis en kontentaj kurboj.

La filo fotis ĉi tiun momenton: sunlumo verŝiĝis tra la salono, Kabi kaj Porkina apogis sin kune, la tri katidoj ludis kaj batalis ĉirkaŭ ili. Tiu foto poste restis sur la librobreto, apud la sola foto de Kabi en sia fraŭla tempo sur la fenestra breto.

Foje profunde en la nokto, kiam la filo revenis hejmen, li vidis jenan bildon: Kabi kaj Porkina kunvolviĝis en la katolito, la tri katidoj dormante inter ili. Aŭdante la sonon de la malfermita pordo, Kabi levis la kapon, eligante mildan "mjaŭon", kvazaŭ dirante "Vi revenis", kaj poste denove klinis la kapon, daŭrante protekti sian familion.



Jen la amo de Kabi — ne amo je unua vido, sed ĝustatempo post atendo; ne unudirekta persekuto, sed reciproka milda elekto. Li iam rifuzis akcepti malperfektaĵon, fine atendis la animon kiu ekbriligis liajn okulojn, kaj poste donis ĉiun lojalecon kaj mildemon, kiun kato povas doni.

Kaj la komenco de ĉio ĉi okazis simple dum ferio, kiam ni malkovris, ke lia kato bezonas amon. ◆

La instruisto estas lumturo

—Verkis: *Tang Danling(Lingzis)*



—Trad. *Orpaco*

Oni diras,
Ke l' instruisto estas kiel kandelo,
Ĝi sin oferas por lumigi l' aliajn.

Oni diras,
Ke l' instruisto estas la ĝardenisto,
Kiu ŝvitas por plenigi l' mondon de floroj kaj fruktoj.

Mi diras,
Mi volas diri,
Ke l' instruisto estas pli lumturo,
Ĝi prilumas la vojon sub la piedoj,
kaj elmontras la rifojn en la marakvo.
Ĝi pli pasas tra l' malluma nokt' kaj nuboj,
kaj nin gvidas en la direkto antaŭen!

Ke l' instruisto estas pli lumturo,
Ĝi, renkonte al la fortaj vent' kaj pluvo,
alte staras kontraŭ l' ŝtorma mar' kaj ondoj.
Ĝi baniĝas pli en la stellum' kaj l' suno,
akompanas nin tra l' sennombraj danĝeroj!

Ke l' instruisto estas pli lumturo,
Ĝi eskortas blankajn velŝipojn navigajn,
bonvenigas grandegajn ŝipojn revenajn,
Ĝi pli kreas la poezion kaj foron.
Ĉie l' mondo plenu de am' kaj espero!

《老师是灯塔》
——唐丹玲(玲子)作

人们说，
老师是蜡烛，
燃烧自己，照亮别人。

人们说，
老师是园丁，
辛勤耕耘，桃李天下。

我说，
我要说，
老师更是灯塔，
照亮脚下的路，
指明水中的礁，
更穿过黑幕云雾，
指引我们前行的方向！

老师更是灯塔，
迎着疾风骤雨，
顶着惊涛骇浪，
更沐浴星辰阳光，
陪我们渡过无数难关！

老师更是灯塔，
护送远航的白帆，
迎接归来的巨轮，
更创造诗和远方，
让世界充满爱与希望！



La Lampo de Kazi

Jerubbesheth Banyaga



En malgranda vilaĝo sur monteto vivis Kazi kun sia malsana patrino. Ili ne havis elektron nek monon, sed havis multe da amo.

Ĉiuvespere, Kazi studis sub la lumo de malnova petrollampo. Iun tagon, la lampo estingiĝis... ne plu da petrolo. Li silenteme ploris, ĉar morgaŭ li havis ekzamenon.

Lia najbarino, Panjo Awa, aŭdis lin. Ŝi frapis milde ĉe la pordo kun malgranda ujo enmane.

– "Mia filo sendis iom da petrolo. Ni dividu ĝin."

Kazi ekridis pro ĝojo. Danke al tiu lumo, li povis studi kaj sukcesis en la ekzameno. Li neniam forgesis tiun geston.

Multajn jarojn poste, fariĝinte instruisto, li donacis ĉiumonate iom da lumo – librojn, lecionojn, kaj kuraĝigojn – al la infanoj de sia vilaĝo. ♦



Mia Foriro

Mi malsupreniras per ŝtuparo
Al regiono de nenifaro,
En longa silento kaj mallumo,
Pri kiu mi ankoraŭ ne havas kutimon.


Al la regno mi malsupreniras,
Kie nenion oni deziras:
Senutila en mallumo profunda,
Krom igi la teron fekunda.

Vian krion mi ne plu aŭdos,
Nek reagos, eĉ se vi min laŭdos;
Nur konservu min en via koro
Kiam finfine ĉesos via ploro.

Sole veninte, mi sole iras,
Tio mian koron nun dise ŝiras,
Kaj l'aferon mi ne povas ŝanĝi,
Ĉar ĉion nur sorto rajtas aranĝi.
Tamen mi nun ne tuj adiaŭas vin,
Ĉar vi povas denove morgaŭ trovi min.
Se ja mia sorto prokrastas,
Mi same tutkore ne hastas.



Gabriel Olubunmi Osho-Davies



REZULTOJ DE LA INTERNACIA KONKURSO DE IKUE

**PAŜOJ DE ESPERO:
SURVOJE AL KRISTNASKO**
Spiripes / Dubrovnic siluice



KATEGORIO – MEDITO

1-A PREMIO

ALBERTO GARCÍA FUMERO: **PENSOJ KRISTNASKAJ**

2-A PREMIO

MARINELLA BOLLINI: **PAŜOJ DE ESPERO SURVOJE AL KRISTNASKO**

3-A PREMIO

MILTON PAULO DE LACERDA: **FOJE...**

KATEGORIO – POEMO

1-A PREMIO

YI QIAO: **KONTEMPLADO DUM ADVENTO**

2-A PREMIO

ALESSANDRO RAMBERTI: **PAŜTISTOJ**

3-A PREMIO

RAFFAELE DEL RE: **AL LA KUŜEJO DE LA SANKTA INFANO**

KATEGORIO – KANTO

1-A PREMIO KAJ LAŬDO

STANISLAO ESPOSITO: **NASKIĜIS AMO**

La premiitajn verkojn oni prezentos dum la Preĝ-medita silvestra vespero la 31-an de decembro 2025.

Kristnasko, 2025

La Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) estas tegmenta organizaĵo de katolikaj esperantistoj.

Rakonto de Georgo

John Huang





Kaj tiel Georgo ne inventis perfektan lingvon... sed sufiĉe bonan por amikeco.

Taglibro de Pipi



Pipi

La 3a de decembro, 2025

Antaŭ multaj jaroj en mia vilaĝo estis maljuna fraŭlo, kiu estis tre drinkema. Iun tagmezon li iris al najbara vilaĝo en distanco de pli ol du lioj* por drinki kun sia amiko. Li ne stumblis hejmen ĝis la suno sinkis. Survoje hejmen li vidis longharan junulinon grandpaŝe marŝanta antaŭ si. Tiu returnis la kapon ĉiupaŝe por okulumi al li. Li lekis al si la lipojn kaj tuj poste naskiĝis en li malbona intenco.



Li plirapidigis siajn paŝojn por atingi ŝin. Sed ŝi marŝis tre rapide, kvazaŭ flugante. Li ne povis atingi ŝin kaj ĉiam malantaŭis al ŝi unu paŝon. Ŝi marŝis en tombejon. Li sekvis ŝin tien. Abrupte ŝi bremsis siajn paŝojn ĉe tombo. Li senprokraste faris unu paŝon antaŭen kaj ŝin atingis. Apenaŭ li volis ĉirkaŭpreni ŝin, ŝi tuj malaperis senpure. Tio ĵetis panikon en lin. Li unuspire forkuris hejmen. Obsedite de teruro, li malsaniĝis. Kaj lin tenis endome tiu malsano dum pli ol dek tagoj. Ekde tiu tago li abstinis de alkoholaĵo.

*lio: tradicia ĉina mezurunuo de longo, egala je duona kilometro.

La 4a de decembro, 2025


Iun vintran nokton, mia dua pli aĝa frato tre malfrue revenis de sia laboro. La frosto pinĉis. Mankis luno, mankis steloj. Estis tiel mallume, ke oni ne povis vidi eĉ sian manon antaŭ si. Kiam li alproksimiĝis la vilaĝon, subite futbalogranda fajrobulo de fore alŝvebis renkonte al li. En la komenco li supozis, ke iu vilaĝano tenas lanternon. La fajrobulo alŝvebis al li pli kaj pli proksime.



En la fino ĝi atingis lin kaj sor-sob ĉirkaŭdancadis. Li laŭte vokis: "Kiu estas?" Sed nenia respondo aŭdiĝis. Li ĉirkaŭpalpis en la mallumo, sed nenion tuŝis. Li denove vokis: "Kiu estas?" Ankoraŭ estis nenia respondo. La fajrobulo ĉirkaŭdancadis lin minimume kvin sekundojn, kaj poste sin direktis al la tombejo rande de la vilaĝo kaj vanuis tie. Je tio li glaciĝis de timo. Post ioma tempo, li elkomatiĝis. Grandpanike kaj grandpaŝe li kuregis hejmen. Kiam li sciigis al ni pri la okazintaĵo, ni neniel povis kredi tion vera. Sed li kategorie asertis, ke li certe renkontis fantomon. Karaj amikoj, ĉu vi kredas tion? Kion vi diras pri tio? Ĉu vere estas fantomo en la mondo?

La 5a de decembro, 2025

Antaŭ pli ol 20 jaroj mia plej aĝa frato posedis pomejon. Aŭtune, kiam pomoj maturiĝis, ili estis ofte priŝtelitaj nokte. Li estis terure kolera kontraŭ ŝtelistoj. Por gardi pomojn li konstruis kabanon en la horto kaj noktis en ĝi. En profunda nokto urino vekis lin el lia dormo. Li leviĝis, eliris por pisi. La nokto estis tre kvietita. La luno alte staris sur la ĉielo kaj verŝis arĝentan lumon en la pomejon. La maturiĝantaj pomoj dissendis ebriigan bonodoron. Sin malŝarĝinte, li bukis sian zonon, kiam li aŭdis virinon voki post li:



"Granda frato Wang! Granda frato Wang! Granda frato Wang!" Li eksaltis de timo, sin turnis posten kaj demandis: "Kiu estas? Kiu vi estas?" Vidiĝis neniu kaj aŭdiĝis nenia respondo. La voĉo ŝajnis konata al lia orelo. Li maĉis kaj remaĉis tion dum longa tempo. Subite fulmis en lian kapon Eta Fang, kiu sin pendumis pro malsukceso en amo antaŭ kvar jaroj. Ĉe la penso pri ŝi, li teruriĝis, kaj tuj sagis hejmen. Li ne plu dormis en la pomejo ekde tiu tago. La sekvantan jaron li forvendis la horton. Ĝis nun la voĉo ankoraŭ hantis lian menson kaj timo kaptis lin kiam ajn li rememoris tion.

La 6a de decembro, 2025


Iam antaŭe en iu vilaĝo vivis familio, kiu konsistis el gepatroj kaj filo. La filo, 10-jara, havis fantomajn okulojn kapablajn vidi fantomon. Estis antaŭvespero de la Novjara Tago laŭ la luna kalendaro. Bongustaj pladoj estis surtablitaj kaj la tuta familio ĝoje ĉetabliĝis.



Subite la filo jen ridegis jen ploregis. Tio multe konfuzis la gepatrojn. Tiuj demandis al li: "Kio okazis? Kio estas al vi, mia koro?" "Jen estas tiom multe da homoj! Iu karesis

min, alia kisis min, alia tiklis min kaj alia batis min", li diris. Je tio la gepatroj estis konsternitaj. Ili redemandis lin: "Kie ili estas? Kiel ni ne povas vidi ilin? Kiel ili aspektas?" "Jen ili estas ĉi tie, ĉirkaŭ la tablo", li respondis, indikante en la aero. "Jen li, maljunulo, blinda je unu okulo, karesis min. Jen, ŝi, maljunulino, kripla je dekstra brako, kisis min. Jen li, junulo, la sozio de mia paĉjo, tiklis min. Jen ŝi, knabineto, kun ruĝa denaska makulo sur la liva vango, batis min. Ŝi manĝegis la pladojn. Mi ne lasis ŝin manĝi, mi kovris ilin per miaj manplatoj, kaj tial ŝi vangofrapis min kaj tiris mian orelon." Tion aŭdinte, la gepatroj ekpanikiĝis. Ili rigardis ĉirkaŭen, sed neniun vidis krom ili tri. El tio, kion la filo priskribis, la patro konkludis, ke la karesinto estis sia mortinta patro, ke la kisinginto, sia mortinta patrino, ke la tiklinto, sia mortinta frato, kaj ke la batinto, sia mortinta filino. Li certis, ke la filo havis fantomajn okulojn kaj povis vidi fantomon. Post la vespermanĝo, li rakontis tion al sia edzino kaj foje-refoje admonis ŝin, ke ŝi ŝlosu la sekreton en la koro kaj ĝin al neniun malkaŝu. Kun la tempo, la filo grandiĝis, iom post iom ekkomprenis la homajn aferojn, kaj komencis senti siajn okulojn ne en ordo. Li tuttage estis moroza kaj dronis en larmoj. Fine li mortis en la aĝo de 15 jaroj.

La 8a de decembro, 2025



Iun vintran nokton de la jaro, kiam mi estis 11-jara, stranga okazo trafis min. Tiutage tuj post la vespermanĝo mi enbrikliĝis. Ĉirkaŭ la noktomezo, mi ne sciis, ĉu tio estis en sonĝo aŭ en duondormo, kiam mi aŭdis plorojn ekster la fenestro. Ili estis unue tre mallaŭtaj kaj poste laŭtaj. Mi malfermis miajn okulojn. Kiu ploris en la profunda nokto? Mi streĉis mian orelon dumlonge. Poste mi konstatis, ke tiu estas knabineto, kiu plorsingultas ekstere. La plorsingultoj estis spasmaj, interrompitaj de nazblovo. Je tio mi tuj fermis miajn okulojn. Mi tremadis tutkorpe kaj tute kovriĝis de ŝvito. Mi retenis mian spiron pro timo, ke mi estigos sonon. La plorsingultoj pli kaj pli altiĝis, kaj post longa momento abrupte ĉesis kaj formortis. Morta silento regis en la ĉambro. Post minuto sporada pepado de musoj sur la tegmentotraboj frakasis la silenton. Pro timo mi kuntiriĝis, kovrante per ambaŭ manoj miajn orelojn ...

Kvankam jam pasis multaj jaroj, tamen la neklarigeblaj plorsingultoj ĝis nun ankoraŭ tremas en miaj oreloj. ♦



Regularo de la Internacia Traduk-Konkurso “Vejdo” (2026)

Sub aŭspicio de UEA kaj kunlabore kun la redakcio de Literatura Vivo

- **Celo:** Honori la memoron de prof. Vejdo (Wei Yida) kaj stimuli altkvalitan tradukarton en Esperanto.
- **Organizo:** Oficiale rajtigita de UEA kaj kunorganizata de *Literatura Vivo*.
- **Partoprenantoj:** La konkurso estas malferma al ĉiuj esperantistoj tra la mondo.
- **Verkoj:** Akceptiĝas propraj tradukoj el **iu ajn nacia lingvo** en Esperanton. Ĝenroj inkluzivas poezion, mallongan prozon, rakontojn/mikro-novelojn, kantotekstojn, kaj artikolojn/eseojn.
- **Kondiĉoj:**
 - Maksimuma longo estas **1500 vortoj** po verko.
 - Nur **manfaritaj tradukoj** estas akceptataj; tradukoj faritaj de artefarita intelekto (AI) ne estas konsiderataj.
 - Ĉiu partoprenanto rajtas sendi maksimume **du verkojn**.
- **Sendado:** Verkoj devas esti senditaj al **info@literaturavivo.com** ĝis la limdato: **1-a de aprilo 2026**.
- **Ĵurio:** Konsistas el spertaj esperantistoj kun kompetento en literaturo kaj tradukarto, reprezentantaj diversajn naciajn lingvojn (angla, franca, hispana, rusa, ĉina, portugala, itala, hungara, pola).
- **Premioj:**
 - Unua premio (1 gajninto), Dua premio (3 gajnintoj), Tria premio (10 gajnintoj).
 - Konkretaj premioj estas provizitaj de UEA.
- **Rezultoj:** La fina rezulto estos publikigita dum la **111-a Universala Kongreso de Esperanto** en Graz, Aŭstrio, en julio 2026. Elektitaj verkoj aperos en la revuo *Literatura Vivo*.
- **Rajtoj:** La organizantoj rajtas publikigi la premiitajn aŭ elektitajn verkojn kun plena mencio de la aŭtoro kaj tradukinto.

En nomo de la redakcio de Literatura Vivo kaj UEA, ni kore invitas ĉiujn esperantistojn partopreni! contact: info@literaturavivo.com